
PACO



Baltie

OFICIALA ORGANO DE MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO (MEM)

ELDONO DE GERMANA DEMOKRATIA RESPUBLIKO (GDR)



4

1973

Malarmado kaj la problemoj de la natura medio

E. Feodorov (USSR)

Ni luktas kontraŭ vetarmado, por malarmado kaj paca kunekzisto de ŝtatoj, kiuj havas malsamajn sociajn sistemojn, prave konsiderante malarmadon kiel la nuran alternativon al monda termonuklea konflikto, nuran formon de kunekzisto sur nia planedo, dignan je la homo.
Fakte, la interago de la socio kaj de la homa medio nun maltrankviligas vastajn tavolojn de la loĝantaro de diversaj landoj. Multaj estas la sciencistoj, la publikaj kaj politikaj rimarkinduloj, kiuj tiuteme konigis sian opinion per deklaroj kaj artikoloj. Tiu problemo estis la temo de multaj sciencaj kunvenoj kaj oni ja scias, ke U.N. kunvokis specialan konferencon dediĉitan al la homa medio.
La esencaj demandoj, kiuj maltrankviligas la tutan mondon estas la nesufiĉeco de la naturaj riĉofontoj kompare kun la bezonoj de rapide kreskanta loĝantaro, unuflanke, kaj la homa agado kontraŭ la ĉirkaŭaĵo kaj speciale ties difektado, aliflanke.
Estas konate, ke la problemo de l'nesufiĉeco de la naturaj riĉofontoj akiris, de post Malthus, soci-politikan karakteron. Liaj adeptoj hodiaŭ asertas, ke la finaj riĉofontoj de la globo kompare kun la senĉese kreskantaj bezonoj de la homaro trudos ne nur limon al la disvolviĝo de la socio sed ke ekde nun tiuj bezonoj estas la kaŭzo de la malalta vivnivelo en la ekdisvolviĝantaj landoj kie la demografia kreskado ne iras samritme kun la ekonomia kreskado.
Mi ne intencas ĉikani tiuteme. Tamen, mi volus substreki, ke efektive, la historio lernigas, ke la kreskado de la ebloj por provizi la esencajn bezonojn de la homaro ĉiam antaŭiris kaj daŭre antaŭiras la nunajn kreskantajn bezonojn.
Certe, tio valoras nur kondiĉe ke ni kalkulu kun la tuto de la bezonoj de la tuta homaro kaj kun la ebloj kontentigi ilin per ĉiuj disponeblaj rimedoj sur nia planedo.
Mi kapablus min helpi per multaj ekzemploj por apogi mian tezon. Tiel, la kvanto de elektra energio, nun produktata por unu loĝanto, uzante ĉiujn ekzistantajn rimedojn, estas 20-oble pli granda ol tiu, kiun oni kapablis produkti antaŭ 100 jaroj per ĉiuj tiuepoke disponeblaj rimedoj.
Se ĉiuj agrikulturaj modernaj teknikoj akiritaj en multaj landoj povus esti uzataj en ĉiuj kampoj de la mondo, oni povus plene kontentigi la nutrajn bezonojn, ne nur de la nuna generacio de la globo sed de generacio ankoraŭ pli grava. Miaopinie, la laŭdira „verda revolucio", kiu nuntempe okazas, pruvas tion.

La plej gravaj mineralaj riĉaĵoj ĝis nun esploritaj daŭre kaj kvante pligrandiĝas por ĉiu loĝanto; la ebloj produkti ĉiujn speciojn de materialoj el diversaj krudaj materialoj same kreskas.
Certe, ni scias, ke la bezonoj de grandega majoritato de la loĝantaro de nia planedo estas ankoraŭ ne kontentigitaj rilate al la indikitaj ebloj. Ni scias, ke milionoj da homoj suferas pro malsato kaj ke la demografia kreskado de kelkaj ekdisvolviĝantaj landoj superas la ekonomian kreskadon. Tio ne reprezentas, tamen, rezulton de natura leĝo aŭ de manko de naturaj riĉofontoj, sed klariĝas per tute evidentaj soci-ekonomiaj kialoj. Speciale, la subevoluinta stato de la ekonomio de la koncernaj landoj estas rezulto de la longdaŭra kolonia ekspluatado dum kiu la naturaj kaj homaj riĉaĵoj servis la profiton de la koloniistoj. Sekve, la tuta kvanto de la naturaj riĉofontoj neniam malhelpis kaj nun ne malhelpas la disvolviĝon de la homaro.
Sed tiu situacio ne povas esti eterna. Fakte, la dimensioj de la tero same kiel ĝia maso povas trudi limon al la plej bona cifero de la loĝantaro eĉ okaze de efika kaj saĝa utiligo de la riĉofontoj de la planedo.
Estas apenaŭ konjekteble, ke oni povu ek de nun determini tiun limon kaj ĝian datfalon. La enhaveco de nia planedo estas ŝanĝa valoro senĉese kreskanta, kiu dependas de la utiligmaniero de la spaco de la tero kaj de ties riĉofontoj. Tamen, tiu enhaveco ne povas senfine pligrandiĝi. Tial, ni devas konscii, ke estonte, povus esti necese kontroli la demografian kreskadon de la planedo. Nur la estonto diros al ni ĉu tiu kontrolo estas destinita antaŭeviti la pligrandigon de la loĝantaro, aŭ male, ĉu estas necese malpermesi ĝian eventualan redukton. Unu el la plej bonaj kazoj truditaj al la ter-loĝantaro ne necese signifas la redukton de la nombro de la tuta homaro. Eble, ĝis tiam estos kreitaj dikaj orbitaj kosmaj korpoj, aŭ aliaj planedoj estos taŭgaranĝitaj por ilin ricevi.
Ĉio ĉi ne devas forgesigi al ni la problemojn pri la konservado kaj la saĝa utiligo de la naturaj riĉofontoj. Oni solvos tiun problemon antaŭ kiam la elĉerpiĝo de ĉiuj naturaj riĉaĵoj kontraŭstaros la daŭran evoluon de la socio.
La potenciala „sufiĉeco" de la naturaj riĉofontoj de la terglobo oni povas praktike efektivigi nur kondiĉe ke oni maksimume utiligu ĉiujn ĝiajn riĉaĵojn entute.
Tamen, ekzistas gravaj malfacilaĵoj, kiuj malhelpas la diritan maksimuman utiligon.
Fakte, la proprieto senigita je la naturaj riĉofontoj kaj je iliaj ekspluat-rimedoj ofte finiĝas per utiligado ne nur ne maksimuma sed avidegema de tiuj riĉofontoj, precipe, kiam ili estas ekspluatataj de eksterlandaj kompanioj kiel tio okazas en la landoj ekonomie dependaj.
Krome, monopoloj kelkfoje kreas artefaritajn bezonojn por la loĝantaro kies kontentigo deturnas atentindan parton de la naturaj riĉofontoj.
Esenca kialo, kiu klarigas la ne-racian utiligadon de la naturaj riĉofontoj kuŝas en la fakto, ke la loĝantaro de la subevo-

„Tio estus la fino", pentraĵo de Richter, Dresden. Zentralbild/Löwe



luintaj landoj, kiu estas nun la plej granda parto de la homaro, ankoraŭ ne posedas la taŭgajn rimedojn kaj ilojn, nek la kvalifikitajn kadrojn necesajn por efika valorigo de tiuj naturaj riĉofontoj.

La menciita faktoro kaj aliaj malhelpas la plej bonan ekspluatadon de la tuto de la naturaj riĉofontoj de nia planedo. Tiuj cirkonstancoj ankoraŭ pli malhelpas ilian kulturon. Kulturo speciale koncernas la naturajn renovigeblajn riĉofontojn: sensalan akvon, biologiajn riĉaĵojn de la kontinentoj kaj de la oceanoj, arbarojn, grundojn, atmosferan oksigenon ktp. Tiuj riĉaĵoj estas karakterizitaj ne nur de sia ĝenerala volumo sed de daŭra kreskado t.e. de la rilato inter la uzata kvanto kaj la renovigo per naturaj procezoj.

Nu ni utiligas preskaŭ ĉiujn formojn de la naturaj reutiligeblaj riĉaĵoj kies grado de utiligo pli kaj pli alproksimiĝas al la tuta valoro de la „enspezo" de ilia bilanco. Tiel, ni utiligas proksimume 70 % de ĉiuj surfacoj, kiuj taŭgas por agrikultura produktado per modernaj teknikoj, same kiel 50 % de renovigataj arbaroj, preskaŭ 10 % de la sensala akvo de la riveroj, konsiderindan parton de la kreskado de ĉiuj biologiaj riĉofontoj de la oceanoj sed ankaŭ esencan parton, t.e. proksimume 70 %, de la pligrandigo de la nombro de la ĉefaj manĝeblaj fiŝoj.

La bezonoj de la homaro pri naturaj renovigeblaj riĉofontoj senĉese kreskas. La rimedoj pri ilia ekstraktado fariĝas pli kaj pli efikaj kaj ni ne plu estas malproksime de la kompleta utiligado de la parto „enspezo" de la bilanco.

Ni jam kapablas redistribui, regionskale, hidraŭlikajn riĉofontojn, kiam ni kontentigas la bezonojn pri akvo en la plej loĝataj regionoj transportante la akvon de la aliaj regionoj de la lando; ni plibonigas gravajn agrikulgrandajn, surfacojn, ktp.

Nuntempe, la tuta homaro devas kapabli kulturon de naturaj riĉofontoj planedskale. La sciencaj kaj teknikaj realigaĵoj de la aktuala civilizacio ebligas, eĉ se nur eksperimente, fari tiajn aranĝojn.

Tamen, ĉiu komprenas, ke la ekzistantaj sociaj kaj politikaj kondiĉoj ne ebligas la praktikan realigadon de tiuj iniciatoj. Plie, estas neeble nun determini la utilecon aŭ oportunecon de tiu aŭ tiu-ĉi aranĝo laŭ la „homa" vidpunkto. La utiligado de la renovigeblaj riĉofontoj kaj ĝenerale ĉiuj faradoj de la homa socio havas daŭre pli grandan influon kontraŭ la media etoso. Tiamaniere, ni modifas la konsiston de la medio, ankoraŭ pli bone, ni modifas la bilancon formitan de la natura cirkulado de diversaj materialoj forigante parton de la materialoj el la natura ciklo kaj ankoraŭ plie, ni enmetas suplementajn materialojn, speciale, la industriajn forjetaĵojn infektantaj la atmosferon kaj la akvan medion.

Tiu infektado estas nun prave konsiderata, kiel unu el la grandaj maltrankviloj de la homaro.

Inter aliaj, la infektado de la riveroj, lagoj kaj rezervujoj de la kontinentoj estas la plej grava. Spite la fakton, ke pli kaj pli da entreprenoj instalas siajn proprajn elpurigad-ekipaĵojn, la sensala akvo restas la ĉefa faktoro por malfortigi la infektantan agadon de la industriaj forĵetaĵoj, kio kaŭzas la kreskantan bezonon de la defluo de la riveroj. Se la situacio ne fundamente ŝanĝiĝas, post 50 aŭ 70 jaroj, ni bezonos almenaŭ la duonon de la tutmonda riverega defluo por dilui la infektaĵon, kiu tiam estos en la riveroj kaj lagoj.

La polucio de la akva surfaco nuntempe ne plu estas la interna afero de tiu aŭ tiu ĉi lando. Ĝi fariĝis internacia problemo, kiam la riveregoj trairas la teritorion de pluraj landoj kaj prenas mondan karakteron ĉar granda parto de la maroj kaj oceanoj estas grave infektitaj.

Analoga situacio okazas en la atmosfero. La disvastigo en la atmosferon de la fumo kaj diversaj ĥemiaj komponaĵoj akiras ruinigan karakteron. Tiamaniere oni povas difini la situacion, kiu dominas en multaj urboj de Usono, Britio, GFR kaj aliaj landoj.


La industria polucio de la ekstera medio rapide progresas kaj okazigas gravan difekton kontraŭ la saneco de la homoj. Tamen, ĝia kompleta elimino estas tute ebla. La konvenaj sciencaj kaj teknikaj problemoj de tre longe estas solvitaj.

Estas tute eble konverti la produktadteknologion cele al utiligo de fermitaj teknologiaj cirkvitoj. Tiam ne plu estos kiuj ajn propagadoj en la ĉirkaŭaĵo. Tute male, multaj mineralaj riĉaĵoj estos konservataj aŭ efike utiligataj. Sed tio postulos grandegajn elspezojn por rekonverti multajn industriajn branĉojn.

Estas notinde, tiurilate, ke la industrio produktanta nukleaĵojn same kiel la atomaj centraloj funkcias nekompareble pli „pure" ol kiu ajn alia ĥemia industrio. Tio, pro la simpla kialo, ke komence de ilia disvolviĝo oni uzis la necesajn rimedojn por malebligi la eventualan eligon de radio-aktivaj produktoj en la ĉirkaŭantan medion kaj tio, spite la altan prezon de tiuj rimedoj.

Ni ankaŭ ne devas ignori, ke atentinda infektado de la medio estas okazigita de la milito. Nur la milit-pretigoj rezultigas multajn kazojn, bone konatajn de ĉiuj, de ne antaŭpensita infektado de la medioj okaze de nukleaj provoj, pro perdo de nukleaj bomboj, aŭ fuĝo de toksaj agantoj.

La utiligo de toksaj agantoj fare de la usonaj trupoj en Vjetnamio, kiel atestas speciala komisiono de eminentaj usonaj sciencistoj, rezultigis la detruon de



Sudvjetnamio, cikatrita de 25 milionoj da bombo-krateroj, laŭ takso de usonaj sciencistoj Pfeiffer kaj Westing.

Zentralbild

25 % de la arbaroj sur la sud-vjetnama teritorio. La uzado de ĥemiaĵoj en Hindoĉinio okazigis multajn viktimojn kaj la morton de centoj da pacaj loĝantoj. Tio multe transpaŝas tion, kion estus farinta kiu ajn industria infektado.

Ni ĉiuj scias perfekte bone, kiaj estus la ruinigaj efikoj, kontraŭ la homaro kaj la natura medio, rezultantaj de radioaktiva infektado sekve de monda termonuklea konflikto.

La irigacio de la grundoj kies kadenco daŭre akceliĝas kondukas al transformo de la akvo-cirkulado sur la planedo – oni kreskigas la forvaporiĝon sur la kontinentoj kaj oni malpliigas la defluon al la oceanoj. Tio povas ankaŭ influi la klimaton.

Mi dezirus pli detale pritrakti la problemojn pri la eventuala ŝanĝo de la klimato.

Ĉiuj scias, ke nuntempe oni ne malsukcese eksperimentas kun la celo influi kelkajn fenomenojn de la vetero.

Nia lando, ekzemple, reguligis teknikojn por antaŭeviti la hajlon. Ĉiuj landoj pli kaj pli sukcese eksperimentas por stimuli la pluvprecipitadojn, oni eĉ kapablis disigi nubojn. Niaj usonaj kolegoj penige laboras por neŭtrigi la disvolviĝon de la uraganoj.

Ĉiuj tiuj metodoj celantaj influi la meteorologiajn fenomenojn estas bazitaj sur ilia nestabileco same kiel sur la ebleco eksciti en la naturo spontanajn reagojn. Tiuj reagoj, ĝis nun, sukcesis nur surloke. Tamen, estas tute eble, ke la grandaj fenomenoj, kiuj okazas en la atmosfero kaj el kiuj devenas iu klimato estu mem kelkfoje ne stabilaj.

Ĉiu scias, ke la klimato de nia globo pli ol unufoje ŝanĝiĝis dum la geologia historio de nia planedo. La senteblaj ŝanĝoj de la klimato ankaŭ estis rimarkitaj dum la lastaj 20 ĝis 30 000 jaroj. Tiuj freŝdataj ŝanĝoj ne povas esti atribuitaj al la situacio de la kontinentoj kaj oceanoj, al la ŝanĝo de la subkliniĝo de

la ter-akso same kiel al aliaj analogaj kialoj. Ankoraŭ ne ekzistas teorioj rilataj al la ŝanĝo de klimato sed nombro da pruvaj konsideroj atestas favore al ĝia nestabileco. La konfirmo de tiuj ideoj povus havi bonajn kaj malbonajn sekvojn.
Bonajn, ĉar ili ebligus esperi la postan reguligadon de la vojoj kaj rimedoj por modifi la klimaton favore al la homaro. Malbonajn, ĉar la ŝanĝoj de klimato, eble ne dezirataj, povos okazi sendepende de nia volo.
La mekanismoj, kiuj kapablus elklikigi la delokadon de la tuto de la procezoj formanta la klimaton al alia plano rilate al la ekvilibro, povus esti konstituitaj per la ŝanĝoj de la stato de la tersurfaco, kiel, ekzemple, la detruo de la glacioj en Arkta Oceano kaj multaj aliaj. Estas prave supozeble, ke la altigo de la meza atmosfera temperaturo de 1° aŭ 2° povas okazigi kelkajn el ili.
Jam fariĝis banale paroli pri la eksterordinara potenco atingita de la nuntempa homaro pro la scienca kaj teknika progreso kaj ĝenerale pro la kreskado de la produktivaj fortoj. La agformoj super la naturo ĉi supre konsideritaj estas nur unu el la multaj trajtoj atestanta tiun potencon kaj tiun kapablecon por agoj, kiuj, pro sia amplekso, estas kompareblaj al la naturaj globaj katastrofoj aŭ superas ilin.
Ni rimarkigu ĉi-tie, ke ĉiu organismo kreita de la naturo disponas, krom ankaŭ la agkapablecon, rimedojn, kiuj garantias ne nur sian sendanĝerecon sed ankaŭ sian utilecon por tiu vario, aŭ pli bone, por tiu specio. Pli malpli fortikaj regulantaj aŭ protektantaj instalaĵoj integrale apartenas al ĉiu mekanismo kreita de la homo. Ili estas esence propraj al ĉiu organizita sistemo, ĉu al kampara bieno, entrepreno, banko, ĉu al planita nacia ekonomio de socialisma lando. Tamen, la homaro en sia tuto, nuntempe ne prezentas similan organizitan sistemon kaj ne disponas mekanismojn por regi la esencajn aspektojn de sia agado ĝenerale kaj de siaj faradoj kontraŭ la homa medio, speciale.
Tie, miaopinie, estas la ĉefa danĝero. Mi volus rememorigi, ke Karl Marx estis la unua, kiu atentigis pri tiu problemo, antaŭ pli ol 100 jaroj. „Se la kulturo", li diris en letero, „spontane disvolviĝas kaj ne estas konsci-maniere direktita, ĝi lasas dezerton post si." Estus malfacile trovi tiel klaran kaj resuman formulon pri la problemo, kiu maltrankviligas nin.
Ĉu oni povas indiki la daton post kiu la spontana disvolviĝado de la socio fariĝas netolerebla? Mi supozas, ke tian taksadon, ja tre proksimuman, oni povus eltiri el tre simplaj konsideroj.
Kelkaj okcidentaj esploristoj dum la lastaj jaroj klopodis pri problemoj rilatantaj la estonton de la homaro. Mi precipe aludas al s-ro Forrester (Usono) kaj al s-ro Peccei (Italio) kaj aliaj.



Multaj japanoj suferas pro la sekvoj de aermalpuriĝo. Jen maljunulo kaj knabino, suferantaj pro astmo kaj devigitaj regule preni okcigenon.

Ekzemple, s-ro Forrester, tiucele provas sin turni al la analizo de la sistemoj. Li ligas en unu sola ĉiujn ĉefajn aspektojn de la homa agado, la demografian kreskadon kaj mortokvanton, la utiligon de la naturaj riĉofontoj, la infektadon de la medio, la efikecon de investadoj, ktp. Taksante per diversaj vojoj, la multajn valorojn de la parametroj de ligiloj inter tiuj fenomenoj, li trovas, per multe da sufiĉe malsimplaj kalkuloj per komputoroj, unu aŭ alian formon de la venonta stato de la socio. La publikitajn rezultatojn oni ne povas kvalifiki optimistaj. Se la civilizacio devus disvolviĝi laŭ ritmoj analogaj al tiuj de la lastaj jardekoj, ni atingus, laŭ s-ro Forrester, la maksimuman demografian nombron ĉirkaŭ la 2030a jaro. Je la indikita dato, la infektado de la medio estos grandege kreskinta, la naturaj riĉofontoj estos elĉerpitaj kaj rezultigos multe pli altigitan mortadan procenton, kio kondukos post 20 aŭ 30 jaroj al 4 ĝis 5 foje pli granda demografia malpliigo.
La aliaj formoj de antaŭvidaĵoj lasas ekvidi malpli situaciojn. Tamen, ĉiu el ili antaŭvidas, ke post 50 aŭ 70 jaroj la homaro trapasos danĝeran situacion, kiam la elĉerpiĝo de la riĉofontoj kaj la infektado de la media etoso kondukos al rapida demografia malkreskado. S-ro Forrester kaj liaj kolegoj insistas pri la neceso pasi de la evoluo al la stabileco, al la antaŭgardo de la posta industriigo, precipe en la ekdisvolviĝantaj landoj, kaj ankaŭ al la ĉesigo de la demografia kreskado. Jen la ĉefa temo de lia esploro.
Mi turnis min al la kalkuloj de Forrester ne ĉar mi akceptas ilin. Oni povus fari iujn kontraŭdirojn pri lia taksado de la parametroj de ligiloj inter la diversaj fenomenoj de la socia evoluo el kiuj dependus ĝia posta irado.

Kial ni devas konsideri neevitebla la grandegan plimultigon de infektado de la medio, tial ke ni ek de nun disponas rimedojn por ĝin haltigi?
Estas gravaj kialoj por supozi multe pli gravajn kadencojn de kreskado, kaj ankaŭ seriozajn kvalitajn transformadojn koncerne la efikan utiligon de la naturaj riĉofontoj speciale prikalkulante la eblojn de ties kulturo.
La antaŭvidaĵojn de Forrester estas utilaj kiel ilustrado de tio, kion povas atingi la evoluo de la spontana civilizacio, ĉar katastrofa situacio povas multe pli frue disvolviĝi se oni akceptas la principon de la milito, ĝi povas pli malfrue pligraviĝi sekve de la malfavoraj ŝanĝoj de klimato.
El ĉio, kio antaŭas, mi kredas, ke mi povas eltiri la neceson pasi de la kulturo, kiu spontane disvolviĝas al la kulturo konscie direktita. La unuaj paŝoj tiucele estas la ĉesigo de la vetarmado kaj la malarmado ĉar ĝuste tie povas esti eltiritaj la necesaj rimedoj, unue por konverti la industrion por elimini la infektadon de la homa medio, por poste utiligi pli gravajn projektojn, kiuj koncernas la kulturon kaj altan rendimenton de la naturaj riĉofontoj.
Nur per la kondiĉoj de paca kunekzistado de la ŝtatoj kun diversaj sociaj sistemoj kaj plie, nur per ilia streĉa kooperado, oni povos certigi la necesan reglamenton pri la influo de la homaj faradoj kontraŭ la ĉirkaŭanta medio, kaj la kunajn rimedojn mondskale utiligatajn cele al la transformado de la medio profite al la tuta homaro. Nur tiakondiĉe oni povus determini la celojn je fora datfalo kaj difini la perspektivojn de la disvolviĝo mi ja diras disvolviĝo kaj ne de rigida stato de la homa socio.

El „Nouvelles Perspectives",
revuo de TPK. – CR –

Rudi Graetz

Dudek jaroj MEM kaj la esperantistoj de GDR

Dum la jaroj 1957/59 mi laboris en Islando kiel reprezentanto de la eksterlanda komerco de GDR. Iutage mi estis ĉe direktoro de librovendejo kaj vidis sur lia tablo eldonon de „Paco", kiu ĵus venis el la presejo. Kompreneble kun granda intereso mi legis ĝian enhavon. Tiu ĉi islanda eldono instigis min, havigi al mi ankaŭ aliajn jam eldonitajn ekzemplerojn de Paco, inter ili la numeron 5. Tio signifas, ke mi ankoraŭ nun posedas tiun ĉi „unuan presitan" numeron de „Paco", eldonita de svisaj laboristaj esperantistoj.

Ĝi entenas konatajn nomojn de GDR-esperantistoj kaj pruvas, ke jam ek de la fondo de Mondpaca-Esperanto-Movado GDR-esperantistoj aktive subtenis la celojn de la juna pacmovado per sia kunlaboro.

La Mondpaca-Esperantista-Movado fondiĝis per la iniciato de la aŭstria esperantisto, *Anton Balague*, en la jaro 1953. La 4an ĝis la 6an de septembro 1953 renkontiĝis en St. Pölten (Aŭstrio) ĉirkaŭ 40 pacamikoj el kvin landoj. Inter ili la estonta kaj nuna ĉefredaktoro de „Paco", k-do *William Gilbert*, kaj konataj pacbatalantoj kiel *Debeame, Lynn, Kvist, Wendl, Vokal, Sindl, Wagner, Krautschneider, Teufelsbrucker, Kral* kaj aliaj.

Tiu ĉi fondo estis necesa, ĉar inter la internaciaj Esperanto-organizaĵoj ekzistis neniu, kiu utiligis Esperanton kiel rimedon por la konkreta kaj aktiva pacbatalo. Do estis necese kolekti la progresemajn fortojn de la Esperanto-movado kaj envicigi ilin en la mondvastan pacmovadon.

Tion la GDR-esperantistoj bone komprenis kaj ili komencis aktive kunlabori, kiel en MEM kiel en la Germana Pacmovado. Jam dum tiu tempo evoluis diversaj formoj de aktivecoj por la paco kaj por la subteno de la Mondpaca-Esperantista-Movado. Per helpo kaj subteno de Germana Packonsilantaro diversaj esperantlingvaj pacmaterialoj estis dissenditaj en la mondon.

Grandan kaj sukcesplenan laboron evoluis nia k-do *Ludwig Schödl*. Kiel direktoro de lernejo en Neuruppin li faris per Esperanto tian modelan paclaboron, ke lia lernejo pro tio estis honorita per la nuna oficiala nomo „Lernejo de Paco".

La paclaboro de multaj GDR-esperantistoj ankaŭ estis rekonita per la organizo de sufiĉe granda oficiala delegacio de esperantistoj al la 44a UK de Esperanto en Varsovio, kiu okazis en la tempo de la 1a ĝis 8a de aŭgusto 1959. Kompreneble la dek delegitoj tie partoprenis la duan internacian kongreson de la Mondpaca-Esperantista-Movado kaj subtenis ties laboron.

Nia delegitaro estis bone akceptita de ĉiuj pacamikoj kaj informis pri la pacpolitiko de Germana Demokratia Respubliko. La tiama Ĝenerala Sekretario de MEM tial sendis sekvan leteron (dulingve) al la Packonsilantaro:

„Varsovio, la 3an de Aŭgusto 1959

Al la
Germana Paca Konsilantaro
Berlin W 8
Taubenstr. 1–2
Koran dankon por sendo de delegacio al nia konferenco. Ĝi bone helpis, atentigi pli ol tri mil esperantistojn de diversaj mondkonceptoj pri pacaj problemoj.
Anton Balague
Ĝenerala Sekretario de M.E.M."

Dum januaro 1960 per subteno de la Germana Packonsilantaro aperis la unua „Paco"-eldono de GDR. Ĝi estis dekpaĝa kaj 6 000 ekzempleroj trovis bonan eĥon ĉe multaj legantoj sur la terglobo. La sukceson de tiu eldono meritas ĉefe niaj pacamikoj *L. Schödl, K. Maier, W. von Waldowski* kaj la mortinta Nacipremiito profesoro d-ro *Georg Sörgel*.

Jam en tiu tempo okazis foiraj renkontiĝoj en Leipzig (Lajpcig), kiel ekzemple ankaŭ 1961, kiuj realiĝis en la senco de la pacmovado. En Leipzig edukitaj junaj kaj novaj esperantistoj dekomence laboris per Esperanto por la paco. Ili sciis, ke militoj estas eviteblaj kaj ke ili devas esti evitotaj.

Okaze de la Vjetnama Tago, la 20an de julio 1961 esperantistoj el GDR-urboj sendis protestleterojn kun multaj subskriboj al la Internacia Komisiono de Kontrolo en Vjetnamio, inter ili el Freiberg, Riesa, Radebeul, Noßwitz kaj aliaj lokoj. Pri tio raportis la gazeto „Vjetnamio marŝas antaŭen" n-ro 3/1961.

La UK-on en Sofia 1963 partoprenis multaj GDR-esperantistoj. Per helpo kaj subteno de la Germana Packonsilantaro ankaŭ tien veturis oficiala delegacio de GDR-esperantistoj, kiu aktive partoprenis la MEM-konferencon.

La abonantaro de „Paco" en GDR kreskis de jaro al jaro, dank' al la agado de esperantistoj en Leipzig kaj aliaj lokoj. Dum jaroj k-do *Rödel* el Leipzig estis la peranto por GDR kaj li fidele kaj precize dissendis „Paco"n al la abonintoj, ĝis la nombro de abonantoj post fondo de CLR tiom kreskis, ke necesis transpreni la dissendadon per la oficejo mem. Aktuale 400 GDR-esperantistoj abonas al „Paco".

La fakto, ke MEM klopodas kunlabori kun ĉiuj esperantaj kaj ne esperantaj organizoj, kiuj partoprenas la batalon por la paco en iu formo, siatempe helpis niajn GDR-esperantistojn trovi fruktedonajn formojn de kunlaboro kun la Packonsilantaro en GDR. MEM tiam kaj ankaŭ hodiaŭ eliras de la realaj historiaj faktoj kaj staras sur la pozicioj de la Monda Packonsilantaro, kies membro de prezidiumo estas k-do Aleksiev.

La GDR-esperantistoj pro ilia aktiva paclaboro tiam ne nur ricevis la rekonon de la Germana Packonsilantaro kaj aliaj instancoj, sed ili ankaŭ ricevis la subtenon kaj rekonon de eksterlandaj pacamikoj.

Kiam GDR-esperantistoj preparis la fondon de sia propra organizo, en taŭga formo en Kulturligo de GDR, ili kompreneble ankaŭ proponis intiman kunlaboron kun la Mondpaca-Esperanto-Movado, kaj eldonon de GDR-Paco unufoje dum la jaro. Depost sia fondo, MEM, montris pozitivan sintenon al GDR.

Kaj depost la fondo de Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR, je la 31a de marto 1965, la esperantistoj de GDR aktive kunlaboras en la Mondpaca-Esperanto-Movado. Ili de komenco identigis sin kun la enhavaj taskoj de MEM. Depost 1966 CLR estas rigardata kiel landa sekcio de MEM. En la sama jaro ankaŭ unuafoje aperis GDR-„Paco" en la nuna formato kaj aspekto, kiu ĝis nun presita en 7 000 ekzempleroj ĉiujare, trovis vastan eĥon en la tuta mondo.

La MEM-kunvenon dum UK en Budapest 1961 ankaŭ vizitis multaj esperantistoj el GDR. Tie ili havis la eblecon konatiĝi kun la prezidanto de MEM, k-don *Aleksiev*. Kompreneble la membroj de niaj delegacioj al la UK en Helsinki 1969, Wien 1970 kaj London 1971 kaj al la Kulturfestivalo en Budapest 1972 partoprenis la MEM-kunvenojn kaj renkontiĝojn. Dum la UK-oj niaj delegitoj parolis pri demandoj, kiuj koncernas la eŭropan sekurecon kaj aliaj pacdemandoj.

MEM ne izoliĝas de neesperantaj organizoj kaj tial inter aliaj partoprenis la Mondan Asembleon por la Paco 1969 en Berlin. Al la okpersona delegacio de MEM apartenis ankaŭ la fondinto de MEM, k-do *Balague*, kiu intertempe bedaŭrinde tro junaĝa mortis. Ni ĝojas, ke tie ni ankoraŭ havis la eblecon persone konatiĝi kun tiu ĉi modesta, aktiva kaj senlaca batalinto por la paco.

Dum tiu ĉi Asembleo ni ankaŭ havis unuafoje la eblecojn interŝanĝi persone opiniojn kun la ĉefredaktoro de „Paco", la kunfondinton de MEM, k-don *William Gilbert*.

Kompreneble la esperantistoj de GDR, kiel aliaj MEM-sekcioj, konstante subtenis la heroan batalon de la vjetnama popolo en ĉiuj por ili eblaj formoj. Neniuj Centraj Renkontiĝoj, seminarioj aŭ aliaj gravaj kunvenoj restis sen mon-

PACO

Paco –
de maro bolanta ondar',
blua okulo de lago.
Paco –
susuro de kverka arbar',
dolĉa aromo de frago.

Paco –
ĝojrido de nia infan',
tril' najtingala al rozo.
Paco –
labor' fruktodona por pan',
nokte trankvila ripozo.

Paco –
nek unu mortinta soldat'
sub funebranta saliko.
Paco –
olivo sur via manplat',
ŝultro de via amiko.

Homoj, ne lasu minaci al Ter',
Gardu vin mem de mortiga sufer'!

L. Jevsejeva

[El „Horizonto de Soveta Litovio" 2/1971]

---

tro de solidareco per rezolucioj kaj malavaraj monkolektoj.
La MEM-aktivecoj de la esperantistoj de GDR kreskis de jaro al jaro kaj nun post la 20jara ekzisto de nia porpaca organizo ni ĝojas, ke ni povis atingi per nia laboro, ke tre multaj legantoj de „Paco" troviĝas en nia socialisma respubliko. En MEM koncentriĝis dum la lastaj 20 jaroj respondeckonsciaj fortoj de la internacia esperanto-movado, kiuj sentas sin devigitaj al la batalo por la mondpaco. Nia ideologia sinteno al tiu movado esprimiĝas en la novaj direktivoj por la laboro de la esperantistoj en Kulturligo de GDR, akceptitaj 1972 dum la Centra Konferenco en Berlin, sub punkto II 3.:

„La esperantistoj de GDR estas kunbatalantoj de la Mondpaca-Esperanto-Movado (MEM), kiu intime kunlaboras kun la Monda Packonsilantaro, kaj subtenas la aktivecojn de MEM. Ili praktikas solidarecon kun ĉiuj popoloj luktantaj por sia libereco."

Unu el la klaraj celoj de CLR Esperanto en Kulturligo de GDR do estas, ankoraŭ pli fortigi la Mondpacan-Esperantistan-Movadon.

X-a Junulara Festivalo



Zentralbild

La renkontiĝo de la monda junularo servos al la paco

Berlin, ĉefurbo de GDR, en somero 1973 duan fojon estos gastigejo por la junularo de la mondo. Unua fojo ĝi 1951 estis mondfestivala urbo. 1951, kiam la urbo ankoraŭ estis forte detruita, la homoj ekkomencis konstrui novan vivon en nova ŝtato.
Tiam la gejunuloj aklamis al la kuraĝa juna francino Raimonde Dien, kiu sin ĵetinte sur la relojn malebligis transporton de armiloj. Ĉijare la aklamoj dediĉiĝos al la nigra floro de Alabama, Angela Davis, al la herooj de Vjetnamio. Ĉirkaŭ 300 000 junaj homoj el landoj de ĉiuj kontinentoj 1973 vizitos Berlin. El ili ĉirkaŭ 100 000 loĝos ĉe familioj de Berlin. Atendas la gastojn riĉa programo. Ankaŭ en la programkajero enestos la esperantista renkontiĝo sub la temo „Junaj esperantistoj por antimperiisma solidareco, paco kaj amikeco".
Ne nur la lukse presita magazeno „Junularo" en Esperanto estos donacita al la esperantistaj gastoj. Ankaŭ estos spekteblaj du novaj koloraj filmoj en Esperanto: pri la moderna junularo kaj pri la gastiga lando mem.
La junularo de la mondo kunprenos el la festivala urbo novajn instigojn, entuziasmon kaj optimismon.




125 jaroj de Komunista Manifesto:

ĈU INTERESA NUR POR KOMUNISTOJ?

Ĉu la manifesto hodiaŭ ankoraŭ aktualas? Ĉu nur interesa ĝi estas por komunistoj? La 125jara historio ek de la apero de tiu dokumento pruvas, ke la manifesto estis la unua prognozo por la evoluo de la homaro, por evoluo al paca socio: la komunismo.
Sendepende, ĉu kristano, komunisto aŭ alipensulo, la forton de la manifesto neniu povas ignori. Ĝi havas esencan gravecon por la tuta homaro. Ĝi unuafoje teorie bazigis novan sociordon, la socialisman, ordo kies landoj hodiaŭ jam produktas pli ol 40 % de la monda produktaro. Tiu sociordo do formis ŝtataron, kies influo je la evoluo de la homaro al paco estiĝis la plej granda kaj forta faktoro, ne ignorebla de tiuj, kiuj volas vidi.
Certe, oni povas demandi ĉu ne dum 125 jaroj la manifesto malaktualiĝis? Multo ŝanĝiĝis. Evoluis sociordo, tekniko, industrio. Ŝanĝiĝis la vivmaniero de la homoj. Sed, restas la fakto, ke ĉiuj, kiuj volis forigi la komunismon, idee kaj fizike mortigi ĝin, mem malaperis. Sed kreskas kaj kreskas la socialisma mondo sistemo. La realigantoj de la manifesta prognozo Marx kaj Engels ne estis fantaziuloj revantaj pri neatingebla ideala socio. Ili malkovris la leĝojn kondukantajn al humanisma, porhoma socio metante en la centron la socišanĝan rolon de la proletaro.
La proletaro, intime ligita kun la produktiloj, kiel plej granda klaso en la socio, estas la sola klaso, kiu havas intereson je la ŝanĝo de la socio, ĉar ĝi ne povas malgajni per tio sed sole gajni. Akirante la politikan regadon kaj konstruante propran ŝtaton, ĝi donas la kondiĉojn por tute malebligi militojn el la homa historio.
Per la apero de manifesto la komunismo fariĝas de utopio al scienca teorio, kiu realigeblas en la praktiko, kiel klare montras la homa historio ek de la Oktobra Revolucio 1917. La 125-a jubilea jaro de la apero de l'manifesto estu instigo por jam legintoj relegi ĝin, kaj por nelegintoj informiĝi pri sia enhavo. Ĉar hodiaŭ kiel antaŭ 125 jaroj validas la slogano „Proletaroj de ĉiuj landoj unuiĝu!" kaj modifita por la mondpaca movado „Pacbatalantoj de ĉiuj landoj unuiĝu!".

La komunista manifesto estas tradukita en la plej multajn lingvojn de la mondo, inkluzive Esperanto.



El la enkonduko al la „Komunista Manifesto":

Fantomo ĉirkaŭvagas en Eŭropo – la fantomo de l'komunismo. Ĉiuj potencoj de malnova Eŭropo kuniĝis por sankta pelĉaso kontraŭ tiu fantomo, la papo kaj la caro, Metternich kaj Guizot, francaj radikaluloj kaj germanaj policistoj.
Kie estas la opozicia partio, kiu de siaj regantaj kontraŭuloj ne estus prikriita kiel komunista, kie la opozicia partio, kiu al la pli progresaj opoziciuloj same kiel al siaj reakciaj kontraŭuloj ne estus rejetinta la brulsignantan riproĉon de l'komunismo?
Duoblo sekvas el tiu ĉi fakto.
La komunismo estas jam de ĉiuj Eŭropaj potencoj agnoskata kiel potenco.
Estas urĝa tempo, ke la komunistoj siajn opiniojn, siajn celojn, siajn tendencojn antaŭ la tuta mondo malkaŝe prezentu kaj al la fabelo pri la fantomo de l'komunismo kontraŭmetu manifeston de la partio mem.
Por tiu celo komunistoj de plej diversaj nacioj kunvenis en Londono kaj verkis la sekvantan manifeston, kiu en angla, franca, germana, itala, flandra kaj dana lingvoj estas publigigata.

Mondliteratura verko en Esperanto:

Bruno Apitz

„Nuda inter lupoj"

En n-roj 4 de „Paco" 1971 kaj 1972 ni publikigis partojn de la fama romano „Nuda inter lupoj" en la esperanta traduko de d-ro Karl Schulze, Berlin (GDR). La romano priskribas la sorton de arestuloj en la faŝisma koncentrejo Buchenwald (Buĥenvald), ilian konspiran laboron, iliajn suferojn, heroaĵojn kaj preparon por la liberigo de la koncentrejo. Subite aperinta infano kaŭzas neimageblajn danĝerojn por la Internacia Barakara Komitato, ĉar la arestuloj volas gardi la estaĵeton antaŭ la morto kaj samtempe ne riski la propran vivon. Ĉion-ĉi la romano en streĉkapta maniero majstre priskribas.
Fintine venas la lastaj tagoj de la faŝisma regno. Ĉu la brutuloj sukcesos neniigi la arestulojn antaŭ la propra fuĝo?
Sed jam la faŝisma estraro devas forlasi la barakojn, la lasta batalo, ĉu ĝi alportos la liberigon?

Kiam Riomand suprenpelis la unuan salvon, kiam la milobla krio eksplodis kaj la amaso furiozis trans la placo, Förste, ankoraŭ kuŝanta surtere sub la ŝarĝo de elĉerpiteco, eksaltis. Tra la fenestro li vidis la sturmon, kaj lia krio pro la nekredeblaĵo preskaŭ krevigis lian bruston. Jam dum ekstere la fera pordo krevante malfermiĝis, li rapidis eksteren, kaj – stumblante pro la kadavroj – kuris al la ĉelo numero 5.
Sovaĝe Höfel kaj Kropinski tamburis kontraŭ la pordo kaj kriis Förste reŝiris la riglaĵon, sed la ĉelo estis ŝlosita. Subite Bochow, Riomand, Kodiczek, van Dalen aperis. Vidante la kadavrojn kuŝantajn ĉirkaŭe, ili hezitis.
Bochow kriis en la duonlumon de la koridoro: „Höfel, Kropinski! Kie vi estas?"
„Ĉi tie! Ĉi tie!"
Förste sin ĵetis renkonte al ili. „La pordo estas ŝlosita, mi ne havas ŝlosilon!"
Bochow saltis al la ĉelo. „Estas mi, Bochow. Ĉu vi aŭdas min?"
„Jes, jes! – Ho dio mia! Herbert! Jes, jes, mi vin aŭdas!"
„Iru for de la pordo. Mi pafdetruos la seruron!"
Bochow eltiris la pistolon.
„Atentu, mi pafos!"
La pafoj krakis. Bochow pafis ĝis malpleniĝo de la ŝargujo. Per unuiĝintaj fortoj ili skuis kaj tiregis je la pordo. La rompita seruro ŝanceliĝis kaj krakeladis. Höfel kaj Kropinski sin ĵetis kontraŭ ĝi. La pordo salte malfermiĝis, kaj la du ŝanceliĝe falis eksteren. La viroj kaptis ilin. Spiregante Höfel pendis en la brakoj de Bochow. –
Centoj da arestuloj dume grimpis sur la tegmentojn, sur la vojoj ĉiuj intersvarmadis kaj interkonfuziĝis. Tie, kie la barilo estis videbla, la sovaĝe ekscititaj arestuloj vidis la elrompintojn rapidegi, penetri la turojn, vidis la batalantojn aperi sur la galerioj.
„Ili okupas la turojn!" Centoj jam kuris al la libera tereno ĉe la norda deklivo. En la valo en direkto al Hottelstedt brulis muelejo. En pli kaj pli mallongaj intervaloj ekstere terentondris la obusoj. Fumo leviĝis ĉielen. Armitaj per bastonegoj, ŝtonoj kaj branĉoj, kio en la tereno ĝuste trafis en iliajn manojn, la arestuloj kuregis al la neŭtrala zono, transgrimpis la moveblajn dorndratbarikadojn kaj kriante glitis tra la truoj. La kaptitajn SS-anojn oni forŝiris el la manoj de la batalantoj, ŝovis ilin tra la bariltruoj kaj sub la kriado de la amaso antaŭenpelis ilin en blokon 17 ĉirkaŭitan de dorndrato. Tie ĉi jam staris arestulgardistoj armitaj per batalakiritaj karabenoj. Kiel unuan kaptiton Müller kaj Brendel estis kondukintaj la tremegantan Zweiling-o en ĉi tiun blokon.
Pribula kaj lia grupo jam sturmis en la arbaron, sur la strato al Hottelstedt.

★

Intertempe Bochow kaj la kamaradoj de IBK [Internacia Barakara Komitato] kondukis la liberigitojn en la ejon de Mandrilo. La bunkro pleniĝis per batalantoj. Kelkaj portis la kadavrojn el la koridoro en la lavejon de la bunkro. Höfel kaj Kropinski sidis sur la falde-

Monumento de la koncentrejo Buĥenvald de prof. Fritz Cremer.



bla lito. Förste alportis al ili glason da akvo. Avide la elĉerpitoj trinkis la vigligan fluidaĵon.
Mesaĝisto alkuris. Li anoncis al Bochow la senrestan okupon de la turoj.
En superŝaŭmanta ĝojo Bochow premis Höfel kaj Kropinski al si. „Liberaj, liberaj!" li kriis en iliajn vizaĝojn kaj ridis, ĉar en tiuj ĉi minutoj nenio alia trovis lokon en sia brusto.
Kun la kamaradoj de IBK li rapidegis en la alian parton de la pordega konstruaĵo, en la ĉambron de Reineboth.
Supre sur la ĉefturo unu el la batalantoj deŝiris la svastikan flagon kaj suprentiris je la masto blankan tukon de ie alportitan.
Rapide Bochow sukcesis informi sin pri la manipulado de la radioaparato, li ekfunkciigis la mikrofonon, kaj lia voko penetris trans la barakaro en ĉiujn blokojn:
„Kamaradoj! Jen la venko! La faŝistoj fuĝis! Ni estas liberaj! Ĉu vi aŭdas min? Ni estas liberaj!"
Bochow plorsingultis, premis la frunton kontraŭ la aparato, kaj la superpotenca feliĉo kuniĝis al la larmoj, kiujn reteni li ne plu klopodis.
Sed en la blokoj la kunpremitaj homoj ekzaltiĝis. La flamo de la voko ekbruliĝis incendion de multmile voĉa krio! Ĝi ne finiĝis kaj ĉiam denove naskiĝante muĝis:
Liberaj! Liberaj!
La homoj ridis, ploris, dancis! Ili saltis sur la tablojn, altenŝiris la brakojn, kriis al si reciproke en la vizaĝojn, kriis, kriis, kvazaŭ frenezo ekestus inter ili. Ne estis plu halto. El ĉiuj blokoj erupciis! Ĉiuj sin ĵetis eksteren, kaj simila al ondo vipata de ventego la ebria amaso inundis la apelplacon.
Unu krio kaj unu ondego: al la pordego!
Ne por sensence ien rapidi. Nur por ĝui la ekestintan ebriecon, fine, fine flui tra la malamata, terura pordego, jubilante kaj ŝanceliĝante sin ĵeti en la etenditajn brakojn de la libereco.

★

La enorma jubilo eksterenŝiris ankaŭ ĉiujn, kiuj jus estis ankoraŭ ĉe Krämer en la bloko. Liberaj! Tiel granda estis la feliĉo ke ili subite lin forgesis kaj forkuris. Krämer ridis kaj insultis samtempe:
„Nin ili forgesis, la uloj, la damnitaj, forgesis nin kunpreni!"
Tiel sovaĝe li alkriis la etulon, ke ĝi ekploris laŭte kaj timplene. „Kriegu, jes, kriegu! – Venu, kriegu ekstere kun la aliaj! Ili ja ĉiuj kriegas. Ĉu vi ne aŭdas?"
Forgesante sian malforton, li prenis per la sana brako la kriegantan infanon kvazaŭ pakaĵon kaj ŝanceliĝis eksteren.
Survoje li estis kaptita de jubilantaj arestuloj. Ili volis lin subteni kaj forpreni de li la kriantan ŝarĝon.
„Manaĉojn for!" li ĵaluze kriegis; feliĉe kaj spiregante li supreniris la vojon kondukantan al la apelplaco.
Tie supre li jam vidis stari ĉiujn aliajn, inter ili Bochow, kiu estis senhelpa vidalvide al la ondego, kiun li provokis.
Kaj Krämer vidis – kaj lia koro estis haltonta pro sovaĝa ĝojo: „André!" li kriis. „André! Marian!"
Lia kriado ne trapenetris la muĝadon, sed jam ili lin malkovris.
„Walter!" Höfel ekjubilis kaj ŝanceliĝis renkonte al li, etendante antaŭen la brakojn, la ŝnuro ankoraŭ svingiĝis ĉirkaŭ lia kolo.
„Forprenu de mi la etulon, ĝi fariĝas tro peza por mi."
Nun la aliaj estis ĉe Krämer. Riomand kaj van Dalen apogis la falanton, Höfel forŝiris de li la infanon, kiu ankoraŭ pli timeme kriis, kiam la sovaĝe barba viro ĝin premis al si. Höfel ŝanceliĝis antaŭen, ŝajnis, ke li estis falonta sur la genuojn. Kropinski kaptis la infanon. Ridante, kriante, ŝprucante per stranga miksaĵo el germanaj kaj polaj vortoj li prezentis al ĉiuj la amatan pakaĵon.
Subite, tenante la infanon antaŭ si per etenditaj brakoj, Kropinski forkuris al la pordego, en la muĝantan torenton.
„Marian!" Höfel kriis post li, „kien vi kuras?"
Sed la vortico jam absorbis en si la feliĉulon.
Kropinski levis la kriantan pakaĵon super si, por ke la bolanta ondego ne ĝin premdifektu.
Kvazaŭ nuksa ŝelo la infano balanciĝis super la ondantaj kapoj.
En la amasiĝo ĝi kirliĝis tra la mallarĝo de la pordego, kaj poste la torento, ne plu retenebla, ĝin forŝiris sur siaj liberigitaj ondoj.

„Nuda inter lupoj aperos fine de 1973 en la internacia lingvo Esperanto. Ĝin eldonos la eldonejo Edition Leipzig, DDR - 701 Leipzig, Postfach 340, Germana Demokratia Respubliko.
Tien vi povas sendi antaŭmendojn aŭ informiĝi kielmaniere ricevi la libron en via lando. La prezo estos ĉirkaŭ 3 dolaroj aŭ egalvaloro. Ĉu vi estus preta helpi la disvendadon de la fama romano en via lando?

Ludwig Schödl

El dokumentoj kaj memoroj pri la laborista Esperantomovado

En aŭgusto 1932 kunvenis en Berlino, en Rosenthaler Strato, delegitoj el Germanio kaj el pluraj landoj por la fondkongreso de IPE (Internacio de Proleta Esperantistaro). Ne komparu tiun kongreson kun kongresoj de hodiaŭ! Tiam regis mondvasta krizo kaj do mondvasta mizero. Konsideru krome, ke tie kunvenis la reprezentantoj de la *laborista* E-movado, do la plej malriĉaj inter malriĉaj. La kunvenejo estis simpla salono, kie kutime okazis dancoj, grandaj kunvenoj aŭ konferencoj. La kongresanoj loĝis gaste ĉe la anoj de la Berlina grupo de la Germana Laborista Esperanto Asocio, la germanaj delegitoj ĉefe dormis sur pajlo en subtegmento en la domo, kie troviĝis la sekretariejo de GLEA, en Dircksenstrato 42. La kongreson ne patronis ŝtatestro, ne venis saluti la gastojn reprezentanto de la Berlina magistrato, nur – taĉmento de la polico, kiu severe kontrolis la dokumentojn de la danĝeraj komunist-suspektaj eksterlandanoj. Ankaŭ alia trajto tute diferencis de kutimaj internaciaj renkontiĝoj de esperantistoj: La kongreso estis intensiva, streĉa, tutsemajna laboro kun unutaga escepto: ĵaŭdon oni ekskursis. Ne centojn da km for per aŭtobusoj al diversaj direktoj laŭ plaĉo, sed per la subtera trajno al la urbranda Grunewald por plenigi la pulmojn per freŝa aero kaj por pli bone konatiĝi persone dum agrabla migrado. Jen okazis amuza ‚konversacio': El la stacidomo sin verŝis amaso da homoj, inter ĝi nia grupo, babilante en E. Berlinanoj provis diveni, kiun lingvon ni uzas. Inter ili ankaŭ estis junuloj, kiuj moke kaj arogante titoligis nin laŭ nazimaniero, laŭ kiu ja nur germanoj estis homoj. Niaj germanaj esperantistoj memkompreneble ĉion komprenis kaj certan tempon toleris tion, iom amuze, ĝis tute subite Berlinano de ni returnis sin kaj per plej originala berlina dialekto atakis: „Halt endlich deine Schnauze, sonst krichste ene in de Fresse, daß dir sämtliche Züge entgleisen!" (Fine silentu, aliel vi ricevos pugnon en vian vizaĝaĉon, ke ĉiuj viaj trajtoj (germane sinonimo por trajnoj) elreliĝos!) Vi certe povas imagi la perpleksecon kaj la ĝeneralan ridon por nia flanko.

Malgraŭ la modesteco de la kongresa eksteraĵo ĝi fondis unu el la plej fortaj E-organizoj. La fondo de IPE estis organizita de IUK, Internacia Unuiĝa Komitato. En ĝi gravan rolon ludis kaj senlace laboregis nia hungara kamarado Joĉjo Bata kun Manjo Bata. Joĉjo laboris tre racie kaj akurate statistike notis ĉion, kio povus foje interesi. De li ankaŭ devenas la sekva statistiko, kiu aŭtentike informas nin hodiaŭ.

La fortoj de la IPE – movado
Statistiko de IUK, aŭgusto 1932
(m = membroj, g = grupoj, gz = gazeto, l = lokoj, ĉ = ĉirkaŭ)
LEA-oj aliĝintaj al IUK
SOVETIO SEU m 6 000 g 190 gz BULTENO Mejdunarodny Yazyk
GERMANIO GLEA m 4 200 g 200 gz Arbeiter Esperantist, Esperantopioniro k 10 distriktaj bultenoj
FRANCIO FEO m 600 g 35 gz PROLETA ESPERANTISTO PEK-servo
BRITIO BLEA m 350 g ĉ 30 gz Ruĝa esperantisto PEK-servo
JAPANIO JPEU m 350 g 100 gz KAMARADO PEK-servo
BULGARIO BuLEA m 350 g 20 gz Mejdunerodei Yeryk
ĈINIO ĈPEU m ĉ 150 g 3 gz PROLETA ESPERANTISTO
USONO ULEA m ĉ 100 g 3 gz INFORMILO
BELGIO BLEA m 50 g 2 gz Belga Esperanto-proleto, Service Esperanto
Landaj UKoj (opozicioj) en reformistaj LEAoj
NEDERLANDO m ĉ 100 g 4 gz INFORMILO, A B C
NORVEGIO m ĉ 50 g 3 gz PROLETO
SVEDIO m ĉ 50 g 5 gz Ruĝa Esperantisto
ĈEĤOSLOVAKIO m ĉ 50 g 5 gz UNUECO
Opozicioj sen UKoj (terorlandoj)
POLIO m ĉ 250. *HUNGARIO* m ĉ 100.
Unuopuloj
LITOVIO 1 2. *DANIO* 1 2. *AŬSTRALIO* 1 3. *NOVZELANDO* 1 2. *SUDAMERIKO* 1 5 (3 landoj). *SUDAFRIKO* 1 1. *FINLANDO* 1 1. *JUGOSLAVIO* 1 3. *ITALIO* 1 1. *RUMANIO* 1 2.
Simpatiantaj LEA-oj
HISPANIO, PORTUGALIO PUIL m ĉ 200 g 4 gz proleta voĉo
ESTONIO ELEA m ĉ 50 g 2 gz ONTO
LATVIO Rig LES m ĉ 50 g 1
Ekster niaj vicoj *(reformistaj organizoj)*
NEDERLANDA NEFL m 1 700 g 55 gz LABORISTA ESPERANTISTO
AŬSTRIO ALLE m 1 000 g 60 SOCIALISTO
GERMANIO SEA m 1 000 g 80 AMIKECON
SVEDIO SLEA m 450 PROLETA ESPERANTISTO
NORVEGIO NLEA m ĉ 150 g 10
En SAT ne LEA-anoj ĉ 500 SAT-grupoj sendependaj ĉ 30
Al IPE – movado apartenas 9 LEAoj m 12 000, 4 UKoj m 250, 2 opozicio m 350, unuopuloj m ĉ 100, 3 simpatiantaj LEAoj m 300
Entute amikas 13 000 m (72 %), 600 lokaj grupoj en 18 landoj kun 33 gz (82 %)
Sub reformisma influo 5 000 m (28 %) en 300 l k 8 landoj gz 7 (18 %)

La centra organo de IPE estis INTERNACIISTO. Ĝi estis eldonata en Berlino, kie ankaŭ troviĝis la sekretariejo de IPE. Certe tio estis unu el la kaŭzoj de la profunda krizo de IPE, kiam en januaro 1933 la faŝismo dronigis ĉiun progreseman agadon en Germanio. El INTERNACIISTO fariĝis Sur Posteno. Okazis poste ankoraŭ du konferencoj de IPE, en julio 1934 en Lille – Francio, en 1937 en Parizo. Tria konferenco estis planita por Parizo en 1939, sed, se mi bone memoras, ĝi ne plu okazis. Jam en Lille plej grava temo estis, ĉu daŭrigi la agadon de IPE aŭ ĉu ne. La sovetian SEU reprezentis la fama sovetia verkisto Iljin. Plej fervora pledanto por restabiligo de la organizo estis nia nelacigebla, simpatia franca kamarado Marcel Boubou (Marsel' Bubu'). Estis ankaŭ li, kiu en la jaro 1939 ebligis la reeldonon de INTERNACIISTO, de kies nova serio aperis tri numeroj. La dua mondmilito ĉesigis ĉiun pluan internacian agadon. Kamarado Boubou ne senfare rigardis la invadon de Francio de germanaj faŝistoj. Tion pruvas, ke li, kamarado Marcel Bourgignon (Burginjon'), instruisto kiel Marcel Boubou, k.a. estis murditaj en faŝista koncentrejo Dachaŭ (Daĥaŭ). Kiel kamarado Jean Lezan (en PACO 1970, 9–10), mi demandas: Ĉu ne troviĝas kamarado de Orléans, kiu scias verki artikolon pri Marcel Boubou, certe unu el niaj plej noblaj pioniroj.

La politika situacio post la dua mondmilito ne plu estas tiu de la jaroj ĝis la milito. Milionoj da homoj, kiuj antaŭe ne atentis la avertojn, ke faŝismo signifas milito, mem spertis tion kaj hodiaŭ la movado kontraŭ faŝismo kaj por paco ĉirkaŭas homojn el plej diversaj sociaj tavoloj kaj mondkonceptoj. Ankaŭ la pacamaj esperantistoj konsciiĝis pri tio kaj kolektiĝis en MEM por aktive partopreni en la pacmovado per siaj propraj rimedoj. Foja retrorigardo en la historion de la laborista E-movado certe utilas. Same kiel Marcel Boubou (Marsel Bubu') ni luktu senlace por la subteno de la vjetnama popolo kontraŭ la usona agresanto, por paco en Proksima Oriento laŭ la rezolucio de UNO, por la suvereneco de ĉiuj popoloj en Afriko, kontraŭ la koloniistoj de Portugalio kaj la neokoloniistoj de FRG, Britio kaj Usono, por ke fine ĉie regu paco kaj ebleco por ĉiu popolo evolui senĝene!

L. Schödl
– CR –

KULTURA KALEJDOSKOPO

Omaĝe al poeto de revolucio
Ĉi – jare pasas 80 jaroj depost naskiĝo de Vladimir Majakovski. En Moskvo oni preparas en julio vesperon dediĉitan al la genia poeto. En la loĝejo de Asocio de Literaturistoj de USSR, funkcios ekspozicio „20 jaroj de la agado de Vladimir Majakovski".
Oni antaŭvidas ankaŭ organizon de internacia poezi-vespero en kiu partoprenos eksterlandaj verkistoj.

„Kio estas evento"
Tio estas komuna titolo de nova filma ciklo, kiun organizis la usona Muzeo de Moderna Arto kune kun Biblioteko de Nov-Jorko. En la kadroj de la ciklo estos montrataj kaj priparolataj nur diskutigaj politikaj kaj sociaj filmoj de sendependaj junaj filmistoj.

La legado en Pekino
La pekina ĵurnalo „Ĵenminĵipao" informis ke la ŝanghajaj studentoj, post protesto ĉe universitata estraro, akiris permeson por legado de eksterlandaj libroj, precipe de eŭropa kaj amerikana literaturoj el XVIII-a kaj XIX-a jartentoj.
Ni aldonu ke la permeson antaŭiris longaj diskutadoj pri tio, ĉu la apero de la fremdaj libroj kaj ilia legado, ne signifos restaŭradon de kapitalismo.

La teatro de 100 popoloj
Pli ol 540 profesiaj teatroj, inter ili 200 dramaj, prezentantaj jare kune kun turneaj trupoj 140 milojn de spektakloj, al kelkdekoj de milionoj da spektantoj – jen kelkaj ciferoj respegulantaj la atingopovon de la teatra vivo en USSR.
Pri forta la ligo de la sovetia teatro kun la socio atestas i.a. la fakto, ke proksimume 30 % da prezentadoj de profesiaj teatroj okazas turnee en vilaĝoj.
Serioza estas ankaŭ la partopreno de sovetunia teatro en la monda kultura vivo. Pasintjare 24 teatraj trupoj de USSR vizitis 33 landojn.

Morto de fama hungara virtuozo
En Budapeŝto mortis 64-aĝa, elstara hungara, mondfama pianisto Imre Ungar. La artisto, malgraŭ perdo de vidpovo en frua infaneco, atingadis grandajn sukcesojn en Usono kaj Eŭropo. Ungar estis laŭreato de la II-a Internacia Konkurso nome de Chopin (Ŝopeno) en Varsovio (1932 j.).
La blinda artisto posedis multajn premiojn kaj distingojn, kaj inter ili la titolon de „Eminenta Artisto de Hungara Popola Respubliko".
Imre Ungar estis fervora esperantisto. Dum siaj artistaj turneoj, li neniam forgesis viziti la esperantajn klubojn de tiuj urboj, en kiuj li koncertis.

Novaj interesaj filmoj?
La kreinto de „Love Story" Artur Hiller preparas novan filmon „Homo el La Manĉa", bazanta je „Don Kiĥoto" de Cervantes.
La ĉefajn heroojn en la filmo ludos kaj kantos konataj filmaktoroj: Peter O Toole (Don Kiĥoto), Sophia Loren (Dulĉinea) kaj James Coco (Sancho Pansa).
En Anglio baldaŭ aperos nova filma versio de la amromano inter Lady Hamilton kaj admiralo Nelson. La ĉefrolojn ludos Glenda Jackson kaj Peter Finch.
Angla kinematografio preparas ankaŭ tri filmojn pri Adolf Hitler kaj lia miljara „Germana Regno" La „fiheroon" ludos tri diversaj aktoroj.

Prilaboris Lena (CR)

Nia celo – Leningrad



Leningrado: Rigardo sur la placon de la dekabristoj. Zentralbild/Tass

Fine realiĝis malnova revo. Komence de junio 1972 startis nia trajno al Leningrad. Unu trajno el GDR inter pluraj aliaj ĉiutagaj. Tamen, ke ĝi ne estis nur unu inter aliaj, tio tuj montriĝis sur la perono. Malnovaj geamikoj ĉirkaŭbrakumis sin, novaj amikecoj jam tie naskiĝis. En la stacidoma halego estis instalita tribuno – salutvortoj interŝanĝitaj.
La 130 esperantistojn atendis kvin aŭtobusoj. Ili restis je nia dispono la tutan semajnon. Necesis traveturi la tutan urbon por atingi nian hotelon. Mi estis en Leningrad la unuan fojon, tamen tuj ĝi ŝajnis al mi proksima. Jen ni preterveturis la riveron Fontanka. Ho, tie ja troviĝas la Leningrada Packomitato, de kie mi regule ricevas poŝtajon, la ‚dua hejmo' de nia kara kamarado prof. Podkaminer, kiu nun sidis apud mi. Ni transis la deltobranĉojn de Neva. Jen la „granda", jen la „malgranda" Neva. Por mi ĉiuj estis grandaj. Stranga riverego: Nur 70 km longa, sed tiel larĝaj, rapide fluantaj, 20 m profundaj akvoj! Kiaj ravaj bordoj kun larĝaj avenuoj, parkoj, belegaj ŝtuparegoj, famaj konstruajoj! Ĉu efektive la caro Petro I konkeris ĉi tiun vojon al la maro per ŝipoj, inter bordoj de vastaj marĉoj?
Jen la Petro-Paŭlo-fortikaĵo ĉe la transa bordo. La oro de ĝia svelta turo brilis en la vespera suno. Antaŭ la fortikaĵo eta herbejo. Sur ĝi Leningrad-anoj en bankalsonoj ĝuis la unuajn varmajn sunradiojn de la jaro. Poste ni vizitis ĝin, memoris en la mornaj malliberejaj ĉeloj pri la herooj de la longa, liberiga batalo, inter ili la frato de Lenin.
Ne mankas monumentoj. Mi nur menciu tiun de Lenin, ĝuste antaŭ la finnlanda stacidomo, starante sur kirasaŭtomobilo, kie li en aprilo 1917 formulis la famajn tezojn, kiuj fariĝis la agadbazo por la partio en tiu tiel grava epoko. – Heroa historio, kien ni rigardu! Ĉie multaj interesitoj. Jen la Aŭrora!
Proksime ankaŭ la Vintro-palaco, kie krome la imponaj triumfa arko kaj la kolosa Aleksandro-Kolono memorigas la venkon de la rusa popolo kontraŭ Napoleono. Proksime de tie ni preterpasas la Astoria-hotelon, siatempe la plej luksan en la urbo, en kiu Hitler en septembro 1941 intencis festi sian venkon. La invitbiletoj jam estis presitaj. – Kion plej laŭdi pri la Izaak-katedralo? Sian vastecon? Ĉu la mozaikojn el juveloj? Min pleje interesis la 96 m longa nilona pendolo, kiu ĉiutage denove al miloj da vizitantoj demonstras la ĝustecon de la heliocentra mondkoncepto – tute aktuala pro la Koperniko-jubileo. – En Razliv ni vidis unue la statuon de l'sidanta Lenin, verkanta ŜTATO KAJ REVOLUCIO, la genian libreton, kreita en tempo de plej ega streĉiteco, leginda kaj legenda ankoraŭ hodiaŭ. Serĉate de lakeoj de la burĝaro, kiuj volis gajni la 200 000 or-rublojn, kiujn promesis al denuncanto la provizora registaro, Lenin tie kaŝis sin unue en la vilaĝo, poste en proksima arbaro en fojnujo. – Por ĉiam en memoro restos nia vizito de la Piskarevska-tombejo. Ĉirkaŭ duono de la miliono da viktimoj de la terura 900-taga sieĝo por ĉiam ripozas tie. Ĉiuj en grandaj amastomboj, sur kiuj nur unu ŝtono indikas la jaron. Kiom da tomboj, en ŝajne senfina spaco?! La korojn emociplenaj ni metis florkronon ĉe la Monumenton de l'Patrio kaj legis la skulptitajn vortojn: „Ĉi tie kuŝas la Leningrad-anoj, flanko ĉe flanko viroj, virinoj, infanoj. Ne eblas diri iliajn noblajn nomojn. Estas tro multe da ili, por ĉiam ŝirmitaj per la granito. Sed memoru, vi, kiu aŭskultas ĉe tiuj tomboŝtonoj – nenio kaj eĉ ne unu estas forgesita."
Ni ne forgesos ilin kaj ni sentas nin respondecaj por gardi la pacon kaj por helpi la popolojn tie, kie ankoraŭ nun imperialistoj faligas bombojn, ĝis la paco regos ĉie sur la tero.
Restus tiom por rakonti, sed mankas spaco. Ĉe la malgaja adiaŭo ĉiu esprimis ardan deziron: Ke tio ne restu la lasta vojaĝo al amikoj en amikan landon!


Ludwig Schödl

„Blua revolucio" en Hindio

Krom la „verda revolucio" oni intencas en Hindio ekkomenci ankaŭ „bluan revolucion". La nutraĵan deficiton en ĉi lando ne povas likvidi nur la evoluo de agrokulturo. La hinda registaro turnas ĉiam pli grandan atenton al la oceano, kiel la fonton de nutraĵo.
La vicministro de eksterlanda komerco A. C. George proponis komencon de „blua revolucio". Ĝi konsistos en evoluigo kaj modernigo de la hinda fiŝado. Speciale akcentata estos la evoluigo de mara fiŝista ŝiparo.

Se vi ne ŝatas „mini"

Kverelo pri mini-roboj kreskis en multaj afrikaj landoj ĝis ... problemo, oni povas diri de ŝtata graveco, kiun konsideras eĉ parlamentoj. Jen post severa malpermeso de portado de la kurtaj roboj en Ugandio (monpuno de 3–6 ugandaj pundoj, depende de kurteco de la robo) la problemo surpaŝis la forumon de kenia parlamento.



Zigzage tra la mondo

Multaj parlamentanoj de ĉi lando turnis sin al ministro de justeco kun demando rilate miniportadon. La ministro replikis, ke neniu rajtas dikti al keniaj virinoj per kio ili sin vestu, kaj se al iu en Kenio ne plaĉas la modo, li ne alrigardu mode (en mini) vestitajn virinojn.

Kontraŭ forkaptantoj de infanoj

Loĝantaron de suda Niĝerio maltrankviligis malaperado de infanoj en kelkaj landregionoj. Disvastiĝas informoj kvazaŭ la infanoj estas forkaptataj fare de sorĉistoj, kiuj mortigas ilin kaj certajn korpopartojn uzas por ritaj ceremonioj, aplikas ilin kiel „juju" – fetiĉo dum ceremonioj praktikataj for de la civilizita vivo, de lernejoj kaj hospitaloj, en misteraj kaŝejoj de ĝangalo. Multaj homoj kredas ankoraŭ ke la ceremonioj kapablas elpetegi favoron de la dioj, savi la vivon aŭ sanon. La niĝeria registaro komencis severan persekutadon de la krimuloj, kiuj, eluzante la malnovan kredon de loĝantaro kaj ĝian alliĝon al tradicio, provas riĉiĝi per superstiĉoj kaj homa naiveco. La publika opinio de Niĝerio postulas severajn punojn por la infanmurdistoj.

Prilaboris L. F. (CR)

Agresintoj malsukcesis pro rezisto de la popolo kaj internacia solidareco

La heroa batalo de Vjetnamio por paco kaj libero

La agresiva politiko de la usona imperiismo en sudoriento Azio estis ekde la fino de la franca koloniregado direktata al sistemeca torpedado de la Ĝenevaj Konvencioj pri Hindoĉinio el 1954-a jaro kaj havis la celon subpremi la naciajn liberigajn movadojn en ĉi teritorio. Per la Ĝenevaj Konvencioj – devigitaj de vjetnamaj patriotoj per venko super la franca okupada armeo en la decida batalo ĉe Dien Bien (Djen Bjen Fu) – estis donataj la kondiĉoj por daŭra paco en Hindoĉinio. La konvencioj agnoskis la sendependecon, suverenecon, unuecon kaj teritorian integrecon de Vjetnamio kaj fiksis popolrajte la naciajn fundamentajn rajtojn de la vjetnama popolo. Oni malpermesis la starigon de eksterlandaj militbazoj kaj liveradon de armiloj. Ĝis julio de 1956-a jaro en ambaŭ landpartoj balotoj devis okazi kun la celo de reunuiĝo. Usono rifusis aliĝi al la Ĝenevaj Konvencioj. Vaŝingtono estis subteninta la francan okupadan reĝimon en la jaroj 1950-a ĝis 1954-a per liverado de armiloj valorantaj 2,6 miliardojn da dolaroj kaj financinta en 1954-a jaro la francan kolonimiliton je 78 procentoj. Poste Usono akcelis la establon de reĝimo obeanta al Usono, la armadon de Sudvjetnamio kaj preparojn al militiro kontraŭ Demokratia Respubliko Vjetnamio.

Septembro de 1954:
Fondiĝo de la agresiva Sudorientazia Pakto (SEATO) inspirita de Vaŝingtono. Origine apartenis al ĝi Usono, Grandbritio, Francio, Nov-Zelando, Aŭstralio, Pakistanio, Tajlando kaj Filipinio.

1956:
Vundante la Ĝenevan Konvencion, Usono sendas 350 virojn da militpersonaro al Sajgono, kiuj tie transprenas kiel „konsilistoj" la instruadon de la puparmeo. Vaŝingtono plifortigas Ngo Dinh Diem je lia bojkoto de tutvjetnamiaj balotoj planitaj por 1956-a jaro. La „ekonomia helpo" de Usono por la kontraŭkomunisma sajgona reĝimo kreskas ĝis 250 milionoj da dolaroj jare.

1957:
La Internacia Kontrola kaj Prigarda Komisiono protestas kontraŭ la kreskanta armil-liverado de Usono al Sudvjetnamio, kie Vaŝingtono komencis la konstruadon de strategiaj stratoj kaj militbazoj.

Decembro de 1960:
La demokratiaj fortoj de Sudvjetnamio – 23 plejparte eksterleĝe laborantaj partioj kaj organizaĵoj – fondas la Fronton Nacian por la Liberigo de Sudvjetnamio (FNL). Ĝi unuigas la patriotajn fortojn, kiuj jam antaŭe kontraŭagis la kolonireĝimon kaj la Diem-diktadon. Per propra armeo ili perarmile ekbatalas.

Junio de 1961:
En Usono estas elverkata plano por „kontentigo de Sudvjetnamio dum 18 monatoj". Ĝi enhavas plifortigon de la sudvjetnamaj soldulaj taĉmentoj, la kreadon de „mortaj zonoj" ĉe la limoj de Sudvjetnamio, subfosajn kaj sabotajn agadojn kontraŭ DRV kaj la starigon de 1 600 „strategiaj vilaĝoj" por detrui la amasbazon de la liberiga fronto kaj izoli ĝian gvidantaron.

Februaro de 1962:
Fondo de usona militara komandantaro en Sudvjetnamio sub Generalo Paŭl Harkins ordonanta al 25 000 anoj de usonaj armeoj. Usono komencas sian „specialmiliton" kontraŭ la liberigaj taĉmentoj.

Julio de 1964:
Je 10-a de julio la gazeto „New York Herald Tribune" pri la preparo de detalaj planoj en Vaŝingtono kaj Sajgono pri bombatakoj al nordvjetnama teritorio.

Aŭgusto de 1964:
De 2-a ĝis 4-a de aŭgusto la usona detruŝipo „Maddox" plurfoje enpenetras la marteritorion de DRV. Je 5-a de aŭgusto la usona prezidanto Johnson asertas ke DRV-ŝipoj atakis la ŝipon „Maddox" en internacia marteritorio. Kiel „venĝon" li ordonas bombadon de urboj de DRV. Per la mensogo de la „incidento de Tongking" la usona imperiismo donas al si antaŭ la tutmonda publiko pravigon por la disvastigo de la milito en Vjetnamio. La usona kongreso donas al la prezidanto nelimigitajn plenpovojn por disvastigi la militagadon. La nombro de la usonaj „militkonsilistoj" estas plialtigitaj ĝis 50 000 viroj. (Post kvar jaroj – je la 20-a de februaro de 1968-a jaro – militministro McNamara devas konfesi ke la „Maddox" estis enpenetrinta marteritoriojn de DRV. En julio de 1970-a jaro la usona kongreso devas nenigi la „Tongking-rezolucion".)

8-a de februaro de 1965:
Komenco de la sistemaj grandatakoj de la usona aerarmeo sur teritoriojn de DRV.

7-a de marto de 1965:
La unuaj kompletaj usonaj bataltaĉmentoj – inter ili 3 500 mararmeaj infanterianoj – alvenas Sudvjetnamion.

Majo de 1965:
Krom la „militkonsilistoj" 5 300 da anoj de usonaj armeoj staras kun armi-

Ankaŭ por ili rekomencis la regula lernado sub packondiĉoj. Zentralbild



loj en Sudvjetnamio. La kongreso en Vaŝingtono disponigas 700 milionojn da dolaroj por pluaj plifortigoj.

Junio de 1965:
La kemia venenmilito en Sudvjetnamio estas intensigita. Ekzemple de 5-a ĝis 20-a de junio usonaj aeroplanoj epidemivenenas teritorion de 30 kvadrataj kilometroj, pro kiu 30 000 da homoj grave difektiĝas je saneco.

1966:
Usono samakute daŭrigas siajn aeratakojn kontraŭ DRV. Je 29-a de aprilo la aerdefendo de DRV pereigas la 1 000-an usonan aeroplanon.

1967:
Oni plialtigas la nombron de usonaj soldatoj starantaj en Sudvjetnamio ĝis duonmilionon da viroj.

Januaro de 1968:
Fine de januaro la sudvjetnama Fronto Nacia por la Liberigo (FNL) komencas sian atakaron ĝis nun plej grandan kontraŭ Usono. En streĉaj bataloj estas liberigataj vastaj landpartoj.

Marto de 1968:
En la sudvjetnama vilaĝeto Son My (Son Mi) usonaj fisoldatoj faras teruran amasmurdon. Pli ol 500 homoj, preskaŭ nur virinoj, infanoj kaj maljunuloj, estas brutece fimurdataj. Ventego de indigno trairas la mondon.

Marto de 1968:
La „Deklaro pri la minaco al mondpaco pro la disvastigo de la usona agreso en Vjetnamio" estas decidata de la partoprenantoj-ŝtatoj de la Varsovia kontrakto dum la Sofia kunsido de la Politika Konsilanta Komitato. La socialismaj fratlandoj plifirmigas „ke ili donas al la vjetnama popolo nelimigitan subtenon ankaŭ estontece. Ili donas ĉiun necesan helpon, inter alie ekonomian, kaj disponigos defendilojn, teknikajojn kaj specialistojn."

Junio de 1968:
Je 25-a de junio super DRV estas faligata la 3 000-a usona aeroplano.

Aŭgusto de 1968:
La nombro de usonaj soldatoj en Sudvjetnamio kreskis ĝis 540 000 da viroj je 1-a de aŭgusto. Plusaj estas 65 000 viroj de „aliancanaj" trupoj el Suda Koreo, Aŭstralio, Nov-Zelando, Tajlando kaj Filipinio.

Oktobro de 1968:
Pro masiva premo de tutmonda publiko Vaŝingtono devas je 31-a de oktobro ordoni la ĉesigon de la „bombado al Nordvjetnamio el aero, de sur maro kaj per artilerio". Samtempe oni anoncas pliakutigon de la usona militagado en Sudvjetnamio.

Januaro de 1969:
Je 25-a de januaro en Parizo komenciĝas Kvaro-Interparoloj pri politika reguligo de la vjetnamia konflikto, kiujn partoprenas reprezentantoj de la registaroj de DRV, FNL, Usono kaj Sajgona administracio. La delegitaro de FNL ĉe la Parisaj Interparoloj proponas programon por ampleksa solvo de la sudvjetnamia problemo.

Majo de 1969:
FNL konatigas konstruivan Dekpunktan Proponon por tutsolvo de la vjetnamia konflikto.

Junio de 1969:
Sur kongreso de la popolreprezentatoj de Sudvjetnamio de 6-a ĝis 8-a de junio la Respubliko Sudvjetnamio estas deklarata kaj la fondiĝo de Provizora Revolucia Registaro estas anoncata. La nova registaro deklaras sendependecon, demokration, pacon kaj neŭtralecon al sia programo. La RSV intertempe tenas plenajn diplomatajn rilatojn kun pli ol 30 landoj kaj aliajn ŝtatajn rilatojn kun 30 pliaj landoj.

Marto de 1970:
La Privjetnama Konferenco en Stokholmo decidas la fondon de Internacia Komisiono por la Esploro de usonaj militkrimoj en Vjetnamio. La bruteca militagado de Usono, nome tiaj amasmurdoj kiel en Son My, estis kaŭzinta tutmondan, gigantan protestondon, kiu plifortiĝis dum la sekvantaj jaroj.

Majo de 1970:
Dum la nokto al la 1-a de Majo ampleksaj taĉmentoj de usonaj trupoj kaj sudvjetnamaj solduloj invadas neŭtralan Kamboĝon. Fine de majo la nombro de la invadintoj jam estas 75 000 viroj. La enigo de la lando en la arenon de la usona agreso provokas akutajn protestojn en la tuta mondo.

Februaro de 1971:
Vundante la Ĝenevan Laoso-Konvencion de 1962-a jaro, 21 000 Sajgonaj solduloj subtenataj de usonaj armepartoj surprizatakas sudan Laoson je la 8-a de februaro. La laosaj liberigaj fortoj grave malvenkigas la invadintojn.

Junio de 1971:
La registaro de DRV prezentas naŭpunktan pacproponon en Parizo.

Julio de 1971:
La Provizora Revolucia Registaro de Respubliko Sudvjetnamio prezentas seppunktan pacplanon. Usono preteriras ankaŭ ĉi novajn konstruivajn paciniciatojn.

Decembro de 1971:
Malgraŭ la pacasertoj de la Nixon-registaro Usono plifortigas sisteme sian bombteroradon kontraŭ DRV. Je 26-a de decembro Nixon (Niksen) persone ordonas pliakutigon de la aeratakoj.

Januaro de 1972:
Jam dum la unuaj tagoj de 1972-a jaro Usono denove ekbombadas barbare Demokratian Respublikon Vjetnamion.

Marto de 1972:
Fine de marto/komence de aprilo la liberigaj armeoj de Sudvjetnamio komencas novan ofensivon kaj akiras grandajn sukcesojn. Usono plifortigas sian bombadojn al DRV en dimensio ĝis nun nekonata.

16-a de aprilo de 1972:
La krimaj aeratakoj al DRV estas pliintensigataj. Dum tiuj tagoj aparte la havenurbo Hajfongo estas ruinigata per B 52-bombaviadiloj. Ankaŭ multaj eksterlandaj ŝipoj estas domaĝigataj.

9-a de majo de 1972:
Nixon ordonas mini la havenojn de DRV. La bombterorado kontraŭ liberigitaj terenoj de Sudvjetnamio estas pligrandigata.

8-a de oktobro de 1972:
Por sukcesigi la konfidencajn interparolojn inter la speciala konsilanto de la registaro de DRV, Le Duc Tho (Le Duk To), kaj la sekureca konsilanto de la usona prezidanto, Kissinger (Kisinĝer), la vjetnama flanko denove prenas iniciativon kaj prezentas je 8-a de oktobro projekton de „Kontrakto pri la finigo de la milito kaj repacigo de Vjetnamio". Sed Usono prokrastas parafon kaj subskribigon de la kontrakto, kvankam tiu estas titolita, de prezidanto Nixon, kiel „kompleta", en komuniko al la ĉefministro de DRV, Pham Van Dong (Fam Fan Dong).


26-a de oktobro de 1972:
Je 26-a de oktobro la registaro de DRV informas la mondpublikon pri la stato de la intertraktoj kaj denove substrekas sian pretecon subskribi la kontrakton – kiel antaŭvidite – je 31-a de oktobro. Usono ne aperas al la interkonsentita subskriba ceremonio. Anstataŭe la bombadoj al dense popolumitaj teritorioj de DRV estas daŭrigataj.

18-a de decembro de 1972:
Usono subite ĉesigas la intertraktojn intertempe daŭrigitajn kaj oficiale anoncas ke ili plenampleske rekomencas la aermiliton kontraŭ DRV, postkiam Kissinger du tagojn antaŭe deklaris ke „nur 1 procento mankas" al paco. Strategiaj bombaviadiloj de la tipo B 52 tagnokte atakas dense popolumitajn teritoriojn de DRV, inter tiuj Hanojn kaj Hajfongon.

28-a de decembro de 1972:
Pro premo de la ŝokita mondpubliko kaj la grandaj perdoj de la usona aerarmeo Usono devas ĉesigi la bombadojn al la teritorioj de DRV norde de 20-a latituda grado kaj deklari sian pretecon daŭrigi la interparolojn en Parizo.

Daŭrigo pĝ. 15

Zentralbild/Tass



Jevgenij Jevtuŝenko

DEK TRI MILIONOJ DA TUNOJ

(El „Vjetnamiaj versoj")

Dek tri milionoj da tunoj
de mort', kunpremita en bomboj, –
sur bluajn spegulajn vitretojn –
rizkampojn en suna rebril',
sur la „veneciojn" vjetnamajn
kun la sekiĝantaj fiŝretoj
kaj sur la biciklon kun rozo,
kreskanta el ĝia stiril'.
Ĉu ne ĵus ja, ĉu ne nun
laŭ la strat' vilaĝa
ĉi rozeto naĝis kun
sia mastr' junaĝa?
Preter cindro kaj ruin'
kiel fera bubalido
gaje, haste kaj sen brido
la biciklo portis sin.
Pluv' miksiĝis al la rado,
kapen frapis, petolul',
al vjetnama kamarado
ĝi similis laŭ okul'.
La pedalojn kun obstino
la soldato turnis, ĉar
vokis lin ĉu amatino,
ĉu la juno al kampar'.
Ne kredante mem, ke viva,
estis li je miro – plena.
Io polietilena
pendis sur la kap' naiva.
Lin dorlotu paco, paco,
iom da rizet' kaj varm',
sed frapegis surda arm' –
bombo falis al la placo.
Kaj lumiĝis senkomprene
frunt' de l'morta kamarad',
kaj sin turnis, turnis ĝene
super korpo lia – rad'.
Kaj papera rozo brila,
volus, povra, en dolor'
al butono sonorila
bati por alarmsonor'.

Dek tri milionoj da tunoj:
de ĉiuj – fugasaj, globetaj,
termitaj kaj pinglaj – murdiloj
je ĉia efik' kaj kolor', –
sur bebajn lulilojn, similajn
al floroj en belaj korbetoj,
sur vekton kun plenaj kalikoj
de la fazeol' kaj dolor'.
Ĉu, plena de senco sekreta,
hieraŭ en la arbarsin'
surŝultre de tiu knabino
ĉi vekt' ne balancis ja sin?
Kaj dekstre, en pajla kaliko,
la koko kun unu okul'
konsciis pri sia morteco,
sed tenis sin firme, bravul'.
Maldekstre, en pajla kaliko –
jen sorto de vi, Vjetnami'! –
grenadoj kaj oraj bananoj
miksite rigardis al mi.
Min „Tjao, ljenso . . ."* ŝi mallaŭte
salutis, paŝante sen son'.
Lumanta, ŝancelis sin lampe
la juna vizaĝo sub non'.**
La kor' kunpremiĝis pro morno,
subita dolor' frapis min:
ĉu morgaŭ ne falĉos ŝin morto
sur pado ĉi de Ho Chi Minh?
Ŝi falos, pereos pro io,
vidata al ŝi en nebul',
lianojn kun teda pluvstrio
metante de l'vigla okul'.
Globeto – murdil' inĝenia
frapegos ŝin brusten. Al ter'
ŝi falos, spirinte neniam
en plena feliĉ' kaj liber'.
Kaj, polme premante la flikojn,
forpasos en plena malhel',
veante, ke siajn kalikojn
ne povis ŝi porti ĝis cel'.

kaj splitoj de l'vekto rigidos
sur lipoj, jam fridaj, kaj brust'.
Ĉu Moskvo, por ŝi nekonata,
ĉe l'fino vidiĝos al ŝi?
Ĉu manen tenilo grenada
de l'herb' etendiĝos al ŝi?
La spektron de l'ŝarĝo ŝi vidos
pendantan jam sur la arbust',
La koko, se tamen ĝi restos, –
tra fuma obskuro kaj blind'
ĉu brilos ĉe l'korpo per kresto,
simila al Kremla murpint'? . . .
Dek tri milionoj da tunoj . . .
Ĉu tro senprofita dektrio?
Dek tri milionoj da tunoj –
sufiĉa por pezo nivel'.
La vekto vjetnama fariĝu
pesilo de la Historio,
kaj pesu la pajlaj kalikoj
„donacojn" de l'brua ĉiel'.
Dek tri milionojn da tunoj –
sang-kaĉon de krima efiko
kaj tiujn rozeton, knabinon –
viktimon de krima agres'
arbitre ekmetu la Tempo
al tiu maldekstra kaliko
kaj ĉion ajn al tiu dekstra –
pli granda ne estos ja pez' . . .

El la rusa: *K. Gusev*

Notoj:

* „Tjao, ljenso . . ." – „saluton, sovetiano . . ." (Vjetnamlingve).


** Nono – vjetnama konusforma ĉapelo, kiun la poeto komparas ĉi loke kun lampŝirmilo.

„NE ESTIS TEMPO, KIU NE NASKIS SIAJN HEROOJN"

Pagodoj – historiaj klerigejoj de Horst Szeponik

Dum mia restado en la DRV mi vizitis ankaŭ la provincon Thanh Hoa. Nur kelkajn kilometrojn norde de la Ham-Rong-ponto, kiu transiras la riveron Ma kaj kiun oni defendis tiel heroe kontraŭ la usonaj bombaviadiloj, mi ekvidis sur altaĵo pagodon ĉirkaŭŝirmitan per bambustangoj. Masonistoj estis forigintaj bombodifektojn kaj murpentristoj kalkis la muraĵon. Tiu ĉi pagodo estas dediĉita al la fratinoj Trung. Multaj pagodoj kaj temploj memorigas pri la insurekcio[1]) de la du fratinoj en la jaroj 39 ĝis 41 d.n.e., kiu ja ne sukcesis, sed ne povas esti forviŝata el la memoro de la popolo.

Proksime de la teksindustria urbo Nam Dinh mi vizitis pagodon havantan la nomon de generalisimo Tran Hung Dao. Li estris la rezistan batalon kontraŭ la invadintaj armeoj de la nepoj de Ĉengis Ĥan, kiuj same provis subigi Vjetnamion. Post malsukcesinta unua provo en la jaro 1257 la ĉefĥano Kubilai sendis en la jaro 1284 armeon de duona miliono da militistoj sur tero kaj maro al Vjetnamio. Dank'al sia kuraĝo, inventemo kaj oferemo la vjetnama popolo kontraŭstaris tiun superpotencon. En la riveraj enmariĝejoj la vjetnamoj bategis fortajn, pintigitajn bambufostojn en la fundon. Ili ne superis la akvonivelon kaj pro tio la mongolaj ŝipanaroj ne vidis ilin. Apud la bordoj sin kaŝis vjetnamaj taĉmentoj. La invadantoj suprenveturante la riveron koliziis kun la nevideblaj fostoj, fiksiĝis aŭ estis en danĝero alfundiĝi. En tiu ĥaoso atakis la vjetnamoj el la embusko kaj povis deturni la unuan impeton de la mongolaj armeoj... Tiu okazo estas prezentita sur bildotabuloj kaj detale priskribita. Ĉiuj tiuj pagodoj ofte pli havas la karakteron de historia klerigejo ol de religia kultejo. Same kiel laŭ multaj aliaj herooj de la batalo pri sendependeco ankaŭ laŭ Tran Hung Dao oni nomis straton en Hanojo, kaj generalo Vo Nguyen Giap donis la nomon de tiu fama armeestro al certa ofensivo en la rezista milito kontraŭ Francujo.



La granda turo de Pho Minh Pagodo en la provinco Nam Ha, konstruita en la 13-a jarcento.

Zentralbild

La vjetnama historio ĝis hodiaŭ estas longa serio de bataloj por la nacia sendependo. Profunde ĝi formis la karakteron de tiu ĉi popolo. „Ni mobiligas ankaŭ 4 000 jarojn da historio, kiu hodiaŭ donas multajn impulsojn al nia justa batalo kaj estas fonto de patriotismo." Tion diris la historiisto prof. Pham Huy Thong, kaj la laboron de siaj kolegoj li nomis „arkeologa batalo".

Li memorigis pri la linioj de poemo, kiun skribis en la jaro 1428 la armeestro kaj poeto Nguyen Trai:

Mi, reganto laŭ ĉiela graco, proklamas:
Nur la justa milito donas bonfarton kaj feliĉon.
Ni volas batalantojn por liberigi la popolon, senarmigi la perforton.
Nia regno nomiĝas Dai Vjet[2]) –
lando, malnova kaj bela.
Lando kun riveroj kaj montoj,
kun limoj al ebenaĵoj, arbaroj kaj lagoj.
Lando kun kutimoj kaj moroj...
Dai Vjet vidis tempojn de florado kaj de disfalo;
do ne estis tempo, kiu ne naskis siajn heroojn.

[1]) Ekribelo de popolo kontraŭ tirana registaro [PIV]
[2]) Nomo de Vjetnamio dum la Tran-dinastio (1225–1400)

[El „Horizont" 52/72, trad. Dr. P. W. Ruff]

---

daŭrigo kaj fino de pĝ. 13

8-a de januaro de 1973:
Le Duc Tho kaj Kissinger denove renkontiĝas al konfidencaj interparoloj en Parizo.

15-a de januaro de 1973:
Nixon devas ordoni la ĉesigojn de ĉiuj bombatakoj al la teritorio de DRV norde de 17-a latituda grado el la aero kaj de sur maro kaj de la plua minado de la havenoj de DRV. La bombadoj al Sudvjetnamio pludaŭras.

23-a de januaro de 1973:
Le Duc Tho kaj Kissinger denove renkontiĝas en Parizo. La Kontrakto pri la ĉesigo de la Milito kaj Repacigo de Vjetnamio estas parafita. Ĝia subskribigo interkonsentiĝas por la 27-a de januaro en Parizo.

24-a de januaro de 1973:
La ĉefministro de DRV, Pham Van Dong, dignigas la kontrakton kiel „grandiozan sukceson en la batalo de la vjetnama popolo sur la militara, politika kaj diplomata frontoj. Ankaŭ estas giganta sukceso de la batalema solidareco inter la vjetnama popolo kaj la popoloj de la socialismaj fratlandoj kaj la popoloj de aliaj landoj de la mondo."

El „Neues Deutschland", trad. Michael Lennartz

USONAJ KRIMOJ EN VJETNAMIO

Ektimigante la tutan civilizitan mondon, Vaŝingtono krutege pligrandigis en ĝis nun neimagebla kvanto sian bomban teroron kontraŭ Vjetnamio en la dua duono de decembro 1972. Tio okazis en tempo, kiam la homaro optimisme kredis, ke Usono ĉiumomente subskribos la jam interkonsentitan kontrakton kun DRV pri interpaco. Tuj antaŭ tiu ĉi perfida eskalado de la Usona agresado membro de la Stokholma Instituto por Internaciaj Aferoj (SIPRI) prezentis teruran ĝisdatan bilancon de tiu ĉi milito. Raporto, kiu elvokas abomenon kaj malamon kontraŭ la imperiismaj agresantoj; la semajna gazeto „Die Zeit" („La Tempo") el FRG, el kiu ni prunteprenis tiun ĉi superrigardon, tamen ne trovis neceson juĝi pri la krimoj.

– la redakcio –

En la vjetnamia milito Usono ekzamenis en plej ampleksa maniero novajn militajn taktikojn kaj novajn teknologiojn.

Al la sekcio taktiko apartenas:

– ampleksa apliko de „aera kavalerio" (infanterio en heliokopteroj);
– la apliko de herbicidoj cele al neniigo de rikoltoj kaj arbaroj kaj de buldozo por la ebenigo de malgrandaj terzonoj;
– tielnomitaj „liberaj por ekpafado" zonoj por artilerio kaj aera armilaro, preskaŭ ne diferencante inter „civilaj" kaj „militistaj" celoj;
– apliko de „lacigogasoj" sur la batalkampo, kaj por la kompletigo de la konvencia pafkapacito kaj ankaŭ por infektigo de regionaj zonoj kaj kiel limiga rimedo;
– la meteorologia milito, la intenca produktado de pluvegoj;
– la translokigo de loĝantaro, kelkfoje kun posta detruo de sedlejoj per fajroj, buldozoj aŭ artilerio;
– enbataligo de soldatoj el Tajlando, (Suda-)Koreo kaj de Filipinio, monhelpoj por tn. fantomaj armeoj – ofte en dubindaj uniformoj kaj sub nekonata gvidado –, enbataligo de speciala aera trupo en Laoso, la subvenciata de CIA Air America;
– fine la selekcia murdigo de loĝantoj, kiuj havis rilatojn al komunistoj;

En la teknologia sekcio jenaj novaĵoj meritas atenton:

– 30 bazaj sistemoj por CS-gaso, tre forta „larmiggaso";
– flugantaj „fajroŝipoj" kaj flugantaj „kanonaj boatoj", kiuj heligas la noktan ĉielon kaj estas armitaj per minikanonoj (plurtubaj maŝinpafiloj kun eksterordinare rapida pafebleco);
– signalsondiloj, kiuj reagas je lumo aŭ varmo, cele al markado de personoj dumnokte;
– unua ekzameno de usonaj – „Terrier" – tero-aero-raketoj kaj de „shrike"-antiradarraketoj;
– vasta enbataligo de armiloj, kiuj nur direktiĝas kontraŭ personoj: kteneroj kun bombofaskoj, kiuj eksplodas en aero, sagobomboj, fragment- aŭ kuglobomboj ktp., stiritaj per laseraj radioj aŭ televidiloj bomboj;
– specialaj maŝinoj por taktika elaera esplorado kaj elektronika defendo, speciale super la Ĉinia Oceano kaj Nordvjetnamio, senpersonaj „mirabeloj"-aviadiloj por elaera fotografado kaj elektronika defendo; surteraj sensoroj por identigo de persona – kaj aŭtomobila trafiko malantaŭ la kontraŭula linio (tiuj ĉi sensoroj funkcias diversmaniere – sismometre, termografie ktp.) transdonas siajn informojn al flugantaj maŝinoj aŭ „mirabeloj", kiuj siaflanke ilin transdonas al surteraj komputiloj, kiuj poste iniciatas la elaeran atakon („elektronika batalkampo", „elektronika milito"). Sensoroj, per kiuj oni malkovras el la aero tunelajn sistemojn, same estis faritaj.

La efiko de tiuj ĉi batalmetodoj kaj novaj armilsistemoj trans 10 jaroj estas rimarkebla. Kompare: Dum la unua mondmilito nur kvin procentoj de ĉiuj militviktimoj estis civiluloj. En la dua mondmilito tiu ĉi nombro kreskis al 48 %, en Koreo eĉ al 84 %. Sed en Hindoĉinio estas proksimume 90 % de ĉiuj murditoj aŭ eĉ pli el la civila loĝantaro. Laŭ komunikoj de Pentagono en tiu ĉi jaro, ekde la 1-a de januaro 1961 estas mortigitaj en Hindoĉinio „863 577 komunistoj". Plejverŝajne temas ĉi tie plej ofte pri civiluloj. (Vunditoj en tiu ĉi komunikaĵo ne estas nomitaj). Laŭ plej lastaj kalkuloj de la Kennedy – Subkomitato por Civilaj Perdoj sole ekde 1965 en Sudvjetnamio estas mortigitaj 400 000 homoj kaj vunditaj 1 300 000. Supozeble do, pli ol unu miliono civiluloj pereis.

En la dua mondmilito usonanoj ĵetis super Afriko, Eŭropo kaj la Pacifiko proksimume 2 milionojn tunojn da bomboj, en la Korea milito 1950 ĝis 1953 entute estis preskaŭ 1 miliono da tunoj. Super Hindoĉinio sole de 1965 ĝis fine de septembro 1972 estis senŝarĝitaj proksimume 7 milionoj da tunoj, pli ol la duono sub la prezidenteco de Nixon.

Laŭtakse en la jaroj 1965 ĝis 1971 sekve de elaeraj atakoj en Hindoĉinio ekestis 26 milionoj da bombaj krateroj. 21 milionoj el ili situas en Sudvjetnamio. La per tio forigita teramaso estus dekoble de tiom, kiom estis elfosita, konstruinte la kanalojn de Suez kaj Panamo kune. Ĝi kovrus ebenon de 13 000 km² – dektrionon de Sudvjetnamio.

Estis dispafitaj inter 1965 kaj 1971 preskaŭ 7 milionoj tunoj da artileria municio, do pli ol en la bomba milito.

Estis disjetitaj miliardoj da flugfolioj en la operacioj de la psikologia milito super Hindoĉinio. Kalkulante la tutan



La „militobjekto" malsanulejo Bach Mai, detruita de usonaj aviadiloj.

Zentralbild/Kapfenberger



Kiel la usonaj agresintoj murdis en Vjetnamio.

Kripligitaj kaj senfoliigitaj arboj. Milionoj da hektaroj da arbara kaj kampara tereno estas detruitaj en Vjetnamio pro la usonaj bombadoj. Zentralbild

loĝantaron kun 49 milionoj, unu persono do ricevis proksimume 1 000 flugfoliojn.

El 90 000 tunoj da kemiaĵoj, kiuj estis enbataligitaj de la usonanoj, 7 000 tunoj estis CS-gaso, la resto senfoliigaj rimedoj. De 1962 ĝis fino 1970 estis tiom da rikoltoj neniigitaj, kiom povus nutrigi ĉirkaŭ du milionojn da homoj dum tuta jaro.

El indikoj de Pentagono sekvas, ke 20 000 km^2 da arbaro estis surŝprucigitaj kaj plejparte sensukiĝis. Per buldozoj ĝis nun aero de 3 300 km^2 arbaro kaj arbustaĵoj estis ebenigitaj.

Oni ankaŭ provis ekbruligi jam senfoliigitajn arbarojn per fajrobomboj kaj napalmo. Tiel en aprilo 1968 2 000 km^2 de la U-Minh-arbaro en Sudvjetnamio estis forigitaj de pli ol 70 fajregoj. La fajregoj furoris pli ol unu monaton.

Bomba milito, artileria pafado kaj neniigo de rikoltoj kaj arbaroj estis por pli ol 85 procentoj de ĉiuj fuĝintoj en Hindoĉinio kaŭzo por la forlaso de siaj sedlejoj. Proksimume unu triono de la popoloj de Sudvjetnamio, Laoso kaj Kamboĝo fuĝis – 6 el 17 milionoj da sudvjetnamoj, 800 000 ĝis 1 miliono el 2,8 milionoj Laosanoj kaj 2 milionoj el 6,7 milionoj kamboĝanoj.

De 1965 ĝis fino 1971 por la milito en Vjetnamio laŭ oficialaj kalkuloj estis elspezitaj 126 miliardoj dolaroj por rektaj elspezoj. Tio egalas proksimume po 3 000 dolarojn por loĝanto en Vjetnamio aŭ po 500 dolarojn por usonano. Surbaze de spertoj pri la kostoj de pli fruaj militoj – civitana milito, hispana-usona milito kaj unua mondmilito – estis prezentita en la Usona Kongreso kostofaakturo, laŭ kiu la monrimedoj por veteranoj kaj postvivantoj de la milito atingos tutan sumon kiu estos je 100 ĝis 300 procentoj pli alta ol la originala buĝeto de la tuta milito. Sekve de la pro milito ekestinta publika ŝuldiĝo tiu ĉi sumo altiĝos ankoraŭ je 10 ĝis 45 procentoj. En rilato al la dekalkuljaro 1971 do la milito en Vjetnamio povis kosti por Usono verŝajne eĉ 300 miliardojn dolarojn.

Krome Usono kovras ĉiujn kostojn por Koreaj kaj Filipinaj trupoj en Sudvjetnamio, por la Tajlandaj trupoj en Laoso kaj Kamboĝo kaj krome por ĉiuj oficialaj kaj neoficialaj militfortoj en Laoso kaj Kamboĝio.

La enbataligo de ĉasbombaviadilo kostas 12 300 dolarojn, tiu de telebombaviadilo de tipo B 52 kostas 45 000 dolarojn. Por la instruo de piloto oni bezonas 500 000 dolarojn. La 16-an de marto 1971 la defendoministerio komunikis, ke super Hindoĉinio perdiĝis entute 7 602 aviadiloj inter ili 4 318 helikopteroj (fine de aŭgusto 1972 jam estis 8 362, inter ili preskaŭ 4 000 faligitaj super Nordvjetnamio). La nombroj estas esence pli malaltaj ol tiuj, anoncitaj de la alia flanko. Hanojo asertas, ke ĝis 1972 super Nordvjetnamio estis faligitaj 4 000 maŝinoj, laŭ indikoj de Vietkong en Sudvjetnamio de 1961–1967 estis faligitaj aŭ surtere detruitaj 7 690 aviadiloj (verŝajne inter ili ankaŭ sudvjetnamaj aviadiloj). La militfortoj de Pathet Lao pretendas pri neniigo de ĉirkaŭ 1 000 aviadiloj inter majo 1964 kaj aprilo 1969.

Ekde 1965 2,3 milionoj usonanoj militdejoris en Vjetnamio. Laŭ la statistiko de novembro 1972 en Vjetnamio pereis 45 914 usonaj oficiroj kaj soldatoj, kromaj 10 287 ekster la militokazoj en akcidentoj aŭ pro malsanoj mortis, 503 522 estis vunditaj. Minimume 70 000, se ne eĉ 100 000 usonanoj fuĝis al Kanado por eskapi la militdejoron. La sudvjetnamia registaro (t.e. la Sajgona administracio – la red.) nombras la mortintojn de siaj oficialaj trupoj kun 164 642, sed militistaj fontoj de la usonanoj taksas la veran nombron esence pli alta.

[El „Horizont", trad. Dr. Hans Eichhorn]

Neniam la brutala kontraŭhumana karaktero de l'imperiismo evidentiĝis tiel klare, kiel dum la usona agreso en Vjetnamio. La krimojn faritajn dum la multjara eksterma milito la mondo neniam forgesos.

Flanke de la usonaj militinstigantoj estis konstruitaj pli ol 100 diversaj armiloj novtipaj, kiuj celas la nuligon de la paca, sendefenda civilularo, inter ili:

- „Boril-bomboj", aplikitaj unuafoje en oktobro 1968. Ili enpenetras antaŭ la eksplodo en la teron kaj mortigas homojn, kiuj sin kaŝis subtere.
- Minoj, trompkaŝitaj kiel fruktoj, sanitaraj bandaj-pakaĵetoj aŭ infanaj ludiloj.
- Plastaj-bomboj, ties splitoj en la homa organismo ne estas indikeblaj perhelpe de Rentgen-radioj.

La usonaj imperiistoj kredis, per „superbomboj" kaj elektronaj sistemoj devigi la vjetnamiajn patriotojn al obeo.

- Speco de „superbombo" estas la 7-milkilograma bombo, nomita „lekanteta murdigilo", kiu enmeze de la ĝangalo kaŭzas liberrazitajn areojn, grandajn kiel futbalarenoj.
- Bombaj aviadiloj aŭ la artilerio estis dirigitaj per komputeroj. Sensiloj „identigis" kamparulojn survoje al la kampoj kiel alvenantajn partizanajn grupojn kaj kaŭzis ilian ekstermon.
- En la Vjetnama Demokratia Respubliko en januaro 1972 usonaj aviadiloj atakis la ĵus finkonstruitan hospitalon en la urbo Than Hoa per laser-dirigitaj, novspecaj faskaj bomboj.

„Ne ekzistas krimoj al kiuj la imperiistoj ne estus pretaj, por daŭrigi aŭ restarigi ilian reĝimon super la popoloj en la iamaj koloniaj aŭ aliaj landoj liberiĝintaj el la katenoj de kapitalisma ekspluatado." (Leonid Breshnew)

[El „Horizont" trad. Erich Würker]

Friedrich-Schiller kaj la aktuala historio

KVAR JARCENTOJN POSTE...

de Rudolf Zimmermann

Friedrich Schiller, fama kiel verkinto de dramoj kaj poemoj, ankaŭ praktikis kiel profesoro pri historio en la germana universitato de Jena, kiu nun portas lian nomon. Krom la ampleksa poeta verkaro li postlasis prozajn verkojn, konsistantaj el prihistoriaj studoj. Unu nun ŝajnas speciale inda, ne esti forgesata, nome la studaĵo pri la „sinliberigo de Nederlandanoj de Hispanio". La humanismo de Schiller speguliĝas el la sekvaj citaĵoj:

„Dum kiam la fibrilaj agoj de gloremo kaj de ruiniga regpasio vekas nian admiron, des pli ĝin meritas okazoj, kie la turmentata homaro luktas por siaj plej noblaj idealoj, kie pariĝas la bona celo kun eksterordinaraj fortoj. Venkis la rimedoj de energia malespero super la teruraj artoj de tiraneco dum ŝajne senespera batalado. Granda kaj trankviliga estas la pruvo, ke ankoraŭ ekzistas helpo kontraŭ obstina pretendeco. Konsekvenca kontraŭstaro nuligas iliajn pereigajn intencojn kaj la ponardo en la mano de despoto malakriĝas pro la malkresko de ties monrimedoj."

Kiu leganto ne tuj memoras la ankoraŭ freŝan pasintecon en Hindoĉinio kaj speciale niajn heroe batalintajn gefratojn en Vjetnamio? „La popolo, ĉi tie surpaŝante la scenejon, estas la plej pacema popolo sur tiu ĉi kontinento kaj parte malpli taŭga al heroismo, ol ĉiuj najbaraj nacioj, kiu ankaŭ subtenas plej modestajn agojn. La cirkonstancoj postulis de ĝi surprizigan heroismon, kiun ĝi neniam antaŭe havis kaj poste havos. Ĝuste estis tiu heroismo, kiu faris tiujn okazojn senekzemplaj kaj instruigaj. Kaj dum aliaj intencas montri la superecon de la genio super la hazardo, mi kreos ĉi tie pentraĵon, sur kiu la mizero kreis la geniojn kaj la hazardo kreis heroojn."

Ne estis la intenco de Nederlandanoj, eksplodigi militiron kontraŭ la plej potenca regno de la mondo. Ankaŭ en Vjetnamio la popolo arde deziris, vivi pace sen konfliktoj kun aliaj landoj. Sed la kreita situacio en Vjetnamio postulis, ke la popolo devis sin defendi. Same kiel en Nederlando vivis gaja, diligenta popolo, en Vjetnamio vivas inteligenta popolo, kiu dum la pasintaj malpacaj jaroj jam ofte pruvis sian superecon. Daŭrigas Schiller: „Filipo la Dua (reĝo de Hispanio), la plej potenca reganto siatempe, kies timiga supereco admone kapablus absorbi tutan Eŭropon, kies trezoroj superis la komunajn riĉaĵojn de ĉiuj kristanaj reĝoj, kies ŝiparo regis en ĉiuj maroj; monarko, por kies danĝeraj celoj servis multnombraj armeoj, armeoj forĝitaj per longaj kaj sangaj militoj kaj harditaj per roma disciplino, entuziasmigitaj per nacia fiero kaj memoroj al gloraj venkoj, soifaj al honoro kaj batalakiroj kaj obeemaj al siaj gvidantoj – tiu timiga homo, sindonante al malmolkapa projekto, direktis ĉiujn siajn fortojn al tiu sola celo, kiun li devis rezigni je la vespero de siaj tagoj – Filipo la Dua, en milito kontraŭ malmultaj nacietoj, kiujn li fine ne povis venki."

Kiel antaŭ kvar jarcentoj; la despoto estis for de la milita scenejo. Sen kontakto kun la nacio, kiu defendas patrujon kaj liberecon. Ili nun kiel tiam malŝparas la posedon de la milito kaj malriĉigas siajn landojn, pro iluzio, ke ili fine povus venki tiun ĉi militon. Tiam kiel nun, dungitaj soldatoj, rabemaj kaj senkompataj, per ĉiu bato kreis novajn malamikojn. „Kaj kontraŭ kiaj nacioj", daŭrigas Schiller, „Jen pacema popolo, fiŝkaptanta kaj paŝtiganta, en forgesita angulo de Eŭropo, kiun ĝi pene gajnis de la marondaro; la maro, ĝia nutranto, ĝia riĉaĵo kaj turmenta zorgo. Sendependa malriĉeco estas ĝia plej grava posedo, ĝiaj famo kaj virto. – Jen bonkora, bonedukita popolo de komercistoj, ĝuante la fruktojn de benita diligenteco, atentante la leĝaron, garantianta bonfarton. Dum feliĉa kvieteco ĝi forlasas la malvastan cirklon de siaj bezonoj kaj soifas por pli altaj kontentigoj. Tiu nova vereco, kies ĝojiga mateno, ekbrilante super Eŭropo, ĵetas sur la kontinenton fruktodonajn radiojn en tiun regionon kaj la civitano ĝoje salutas ilin. Ne akceptas ilin la korpremita sklavo. Gaja petoleco, ofte akompanante la abundecon kaj la liberecon, instigas revizi la ĝisnunan opinion kaj disrompi ties malliberigan ĉenon." – Denove ni memoras niajn gefratojn en Vjetnamio, ili sin liberigis de japana okupacio, sed revenis la iama kolonisto. Denove la popolo luktis sukcese kontraŭ la agresinto. Malsukcesis la francaj trupoj, subpremi tiun bravan kaj ideoriĉan nacion. Ili forlasas tiun ĉi landon, sed per subaĉeto de dungitaj individuoj en suda Vjetnamio estas instalata reĝimo, reganta kontraŭ la interesoj de la nacio. Korupta kaj despota, ĝi alvokis en la landon usonajn trupojn, por ke ili povu ekspluati la popolon. Iam estis la nova religio la ŝajnkaŭzo de la konfliktoj, nun oni kulpigis la internacian komunismon. Ambaŭfoje tiuj militoj kontraŭ ŝajne malforta kontraŭulo devis garantii profiton. Ju pli da grenadoj falas, ju pli da armiloj perdiĝas, ju pli estus rekonstruata post la milito, ĉio estas profitdona... Sed ĉu tia kalkulo ĉiam estas ĝusta? Denove Schiller argumentas:

„Pendas super la popolo la punvergo de despotismo. Arbitra potenco minacas forigi la fundamentan kolonon de la popola feliĉo. La garantiinto de la leĝo fariĝas tirano. Simpla, neinfluita ŝtata tradicio, tiun popolon kuraĝas montri al la sinjoro super du Hindujoj malnovan kontrakton kaj avertas pri naturaj rajtoj. Oni nomis en Madrid ribeladon, kio en Amsterdam nomis laŭleĝa postulo. La plendantoj de la provincoj mendis diplomaton, sed Filipo la Dua sendis ekzekutiston. La sekvo estis milito. Senekzempla tiraneco atakas vivon kaj posedon. La malesperanta civitano, kiu havas du eblecojn morti, decidas por la morto sur la batalejo. Nacio, vivinta en superfluo, amas la pacon, sed atakita, ĝi fariĝas batalema. Nun ĝi ĉesas timi pro sia vivo, en kio ĉio mankas, kio ĝin faras vivinda. La ribelemo atingas la plej forajn provincojn; komerco kaj metioj malprogresas. Malaperas la ŝipoj el la havenoj, la artisto el sia laborejo, la kamparano de siaj dezertigitaj kampoj. Multaj rifuĝis al foraj landoj. Mil viktimoj mortas sur la ekzekutejo kaj pliaj miloj kotpremiĝas pro tiuj tragedioj, ĉar diece devas esti, morti por la nova religio..."

Ĉu ne tiam kiel nun, la sindonemo al nova ideo estis la instigilo por denove ekkapti la armilon por kontraŭi la senkompatan malamikon? Ĉu ne tiam kiel nun despota volo volas senkulpigi sin per mensogaj argumentoj kaj esperas trompi la homaron pri la veraj intencoj? Sed vanaj estis ĉiuj provoj, subpremi tiun bravan nacion, kiel Usono ĝis nun ne povis venki en Vjetnamio, subtenata de trupoj de la sudvjetnama diktatoro. En Nederlandoj unu homo, princo, fordoninte ĉiujn rajtojn kaj privilegiojn, organizas la kontraŭstaron:

„La riskas defendi la justan aferon per hazardludo sur la batalejo, sed liaj serĉitaj dungitoj kaj pacemaj kamparanoj ne povas kontraŭstari la furiozan atakon de lerta militistaro. Dufoje li gvidas sian senkuraĝan armeon kontraŭ la tirano. Dufoje la soldatoj lin forlasas, li spite ne malkuraĝiĝas. Filipo la Dua sendis al li tiom da helpantoj, kiel la avideco de sia peranto kreas almozpetulojn. Fuĝintoj, forpelitaj de siaj patrujoj, serĉas novan tian sur la tero kaj sur la ŝipoj de la iama malamiko, por satigi venĝemon kaj malsaton. Marpiratoj fariĝas herooj, rabistaj ŝipoj formas mararmeon kaj el marĉejo estiĝas respubliko. Sep provincoj samtempe disŝiras la ĉenojn. Nova juna ŝtato, potenca per konkordo, per siaj maroj kaj senespera situacio, solene deklaras nacion, sentronigas la tiranon kaj la hispana nomo malaperas el la leĝaro."

Ree nin instigas Friedrich Schiller, kompari la ribeladon de la nederlandanoj kontraŭ la jugoj de despotismo kaj hierarĥio, kun la luktado de niaj amikoj en Vjetnamio. La longdaŭra milito, la korupcio de la regantoj el Hispanio en Nederlandoj ruinigas la financajn rimedojn de Hispanio. La hispanaj dungitaj soldatoj ne ricevas salajron kaj forlasas la armeon, por batali kun la iama malamiko kontraŭ la hispanoj. Ni scias, ke pro la usona dolaro la konfido al Usono senbaziĝis. Nun devas helpi la bloko de la eŭropaj kapitalistaj landoj, firmigi la usonajn financojn. Kiel diris la financministro de Federacia Respubliko Germanio – „La inflacio ĉesos, post kiam ĉesis la milito en Vjetnamio!" – kaj la milito ĉesis, la valuta krizo ne.

La nederlandanoj ricevis fine neatenditan subtenon: „Francio, sen interrompi siajn rilatojn al Hispanio, sendis princon, por gvidi la nobelojn en Nederlandoj. La nederlandaj operacioj estis subvenciataj per franca mono. Elizabeto de Anglujo nur juste venĝis, ŝirmante la ribelojn kontraŭ ilia suvereno, kaj ŝia ŝparema subvencio nur sufiĉis, malhelpi la ruiniĝon de la respubliko. Tio siatempe estis gravega, por renovigi iliajn elĉerpitajn kuraĝon kaj esperon. Kun tiuj registaroj Filipo tiam ankoraŭ estis ligita per paca koalicio. Ambaŭ potencoj lin perfidis. Inter fortuloj kaj malfortuloj lojaleco ofte ne estas virto. La timito nur malofte ĝuas la delikatajn bendojn, ligantajn egalulojn. Filipo mem forigis la virtojn inter la reĝoj kaj levigis la malicon kiel Dion de sia ministraro. Eŭropo punis lin pro la misuzo de sia despotismo . . ."

Vjetnamio havas multajn simpatiantojn. Eĉ en Usono kreskas la opinio, ke la milito kontraŭ tiu lando estas maljusta kaj malpurigas la blazonon de Usono. Nia tasko estas, sanigi la vundojn, batitajn de la milito. Jam la kapitalistoj klare ekkonas la kialon de la mizera financa situacio en Usono. Iliaj admiro kaj simpatio por tiu agresantoj velkas, ĉar ankaŭ ili volenevole pagu la kostojn de tiu senĉesa kaj sensukcesa milito de Usono.

Usono, havis similan sorton kiel Hispanio, post sia militiro en Nederlandoj antaŭ kvarcent jaroj. La vjetnama popolo venkis. Kaj jam leviĝas la sudamerikaj respublikoj kontraŭ la ekspluatado pere de usonaj monopoloj. Jam ne plu fluas kelkaj fontoj de usona riĉeco. Jam malgrandaj landoj ne plu estas konvinkitaj, ke ŝirmo de Usono garantias sekurecon. Neniu lando deziras saman sorton kiel Vjetnamio. Usono perdis sian reputacion, kiel antaŭ 400 jaroj Hispanio. Kiel la historio ja havas paralelojn . . .

Kanto pri paco.

Muziko: D. Ŝostakoviĉ

Flirtas flagoj de paco triumfe en vent';
ilin farbis per sang' batalintoj.
Ja forpelis faŝismon impeta torent',
sed insiste avertas batalintoj:
  Gardu! La paco de la mond'
  estas de l'sorto ne donac'.
  Forta en ĉirkaŭmonda front'
  venkos militon la pac'.

Ne rezignas faŝistoj, per krima milit'
eternigi la imperiismon.
Sed jam pasas la temp' de sordida[1]) insid';
ĉiuj vojoj nun celas komunismon.
  Tamen – la paco de la mond'
  estas de l'sorto ne donac'.
  Forta en ĉirkaŭmonda front'
  venkos militon la pac'.

Sur la grenkampoj kreskas sufiĉe da pan';
laboruloj riĉecon produktas.
Povas vivi feliĉe jam ĉiu teran',
se l'popoloj por paca vivo luktas.
  Agu! La paco de la mond'
  estas de l'sorto ne donac'.
  Forta en ĉirkaŭmonda front'
  venkos militon la pac'.

[1] sordida – malpura (PIV)

Vortoj laŭ ideoj de Dolmatovskij
esperantigitaj de R. Rabenalt.

Irlandanoj – „blankaj negraĉoj" de Londono

La irlanda liberiga batalo estas la plej longa en la mondhistorio. Ekde 12-a jarcento la irlandanoj batalas kontraŭ la britaj okupantoj kaj iliaj komandantoj en Londono. Ekde 1968 la brita kolonia teroro denove furiozas eksterordinare brutale en la „blanka kolonio" de Anglio sur la „verda insulo".
Meze de 1972 la brita registaro provis subpremi la irlandan civitanrajtan movadon per 21 000 soldatoj, 27 infanteri-batalionoj kaj 30 „Centurion"-tankoj, lokigitaj en Londonderry. La trupaltesriga ŝipo „Intrepid" alportis helikopterojn. El la Federacia Respubliko Germanio estas ordonitaj al Norda Irlando 4 000 „Queen's Own Highlanders".

La murdkonto de Londono

30-a de januaro 1972: Ĉe demonstracio de la civitanrajta movado en Derry 13 personoj estas mortpafitaj. La nombro de la viktimoj de la kolonia teroro dum la lastaj tri jaroj plialtiĝis per tio je 200.
4-a de aŭgusto 1972: La brita kolonia armeo teroris la loĝantaron per amasaj domtraserĉoj kaj razioj.[1] La nombro de la mortviktimoj altiĝis en tiu tago je 500. Edward Heath, ĉefministro de Grandbritio, deklaris en parolado en la militista akademio en Sundhorst, la okupado de la katolikaj distriktoj fare de britaj trupoj estus „demonstrinta la plej altan gradon de ilia profesia kapablo".
8-a de aŭgusto 1972: 15-jaraĝa lernanto estas registrita kiel 501. mortviktimo. Je tiu dato ankoraŭ estas arestitaj 264 anoj de la civitanrajta movado en la koncentrejo Long Kesh.
12-a de aŭgusto 1972: la brutalaj ekscesoj de la britaj fisoldatoj daŭris. Ĝis tiam 505 mortintoj.
13-a de aŭgusto 1972: Denove pereigis la kolonia teroro du homojn. Bilanco: 507 mortintoj. La okupantoj estis ekipataj per ebonitaj kaj plastaj pafaĵoj. Ili daŭrigis siajn perfort-agojn en la katolikaj kvartaloj.
14-a de aŭgusto 1972: Ekstremuloj kaj britaj soldatoj denove pliintensigis sian brulmortigadon en Norda Irlando. La batalvolo de la civitanrajtuloj montriĝis nerompita. La nombro de mortintoj kreskis je 511.

Okupado estas ilia devizo


Izraelio, kiu jam antaŭ kvin jaroj agresis siajn arabajn najbarojn, insistas pri la politiko de anekso rilate al la okupitaj arabaj teritorioj. Ĝia arma etato kreskis intertempe je 40 ĝis 50 procentoj de la ŝtata buĝeto. Nur antaŭ nelonge la konsilisto de la registara ĉefino Golda Meir, ministro Gallili lakone deklaris: „Izraelio ne havas kaŭzon ŝanĝi sian politikon rilate al la arabaj teritorioj."

Februaro 1972: En la konstruajo de Internacia Ruĝa Kruco en Amman 150 fuĝintoj el Okcidenta Jordanio komencis strikon per nemanĝado. En deklaro ili konstatas: Ekde 1967 centmiloj da araboj devis fuĝi el la okupataj teritorioj. Miloj estis delokitaj en koncentrejojn. Centoj da araboj estis mortigitaj pretekste de agoj kontraŭ la elirpermeso.
Marto 1972: Izraeliaj aer- kaj tertrupoj enpenetris Sud-Libanion kaj murdis 50 arabojn.

Belfast: Ĉiutageco en Irlando. Kiom longe ankoraŭ? Zentralbild



Imperiismaj militbazoj en Mediteranea ĉirkaŭo



Junio 1972: Sub la preteksto de „minaco" flanke de arabaj rezistgrupoj en suda Libanio Dayan ekfunkciigis denove sian militmaŝinaron kontraŭ Libanio. 48 homoj estis murditaj.

3-a de julio 1972: Denovaj perarmilaj provokoj kontraŭ Libanio. Izraeliaj aerpiratoj atakis la vilaĝojn Deir al Aschair, Dibbin kaj Tel Ebel. Ankaŭ inter la civila loĝantaro estis mortigitoj. Izraeliaj militboatoj enpenetris proksime de la urbo Tyr akvaĵon sub libania suvereneco.

6-a de julio 1972: Izraelia artilerio dum unu kaj duona horo kanonis la libanian vilaĝon Kfar Shuba. Izraeliaj batalaviadiloj senpermese superflugis libanian teritorion. El Vaŝingtono publikiĝis: Usono liveros ankoraŭ ĉijare 36 aviadilojn de la pluevoluigita tipo „Skyhawk A 4 N" al Izraelio.

18-a de julio 1972: El Tel Aviv publikiĝis: La araba urbo El-Kuneitra sur la okupataj siriaj Golan-altaĵoj estos fordetruata. Ĉe tiu loko estos instalataj tiel nomataj „defendvilaĝoj".

La Usona konzerno North American Rockwell liveris kun permeso de Pentagono 100 teledirekteblajn bombojn al la izraelia aerarmeo.

25-a de julio 1972: Per peza artilerio izraeliaj trupoj kanonis dum du horoj la libanian vilaĝon Blinda kaj detruis plurajn loĝdomojn.

27-a de julio 1972: Artileria atako sur la libanian vilaĝon Jebel El-Druz kaj ties ĉirkaŭaĵo. Multaj domoj estis detruj kaj kultivitaj kampoj estis dezertigitaj.

30-a de julio 1972: Jena informo atingas en Novjorko la UN-sekurec-konsilantaron: La izraelia armeo denove atakis sirian teritorion per mitraletoj. Trupoj de Tel Aviv dufoje trapaŝis la libanian ŝtatlimon.

8-a de aŭgusto 1972: En tiu tago izraeliaj trupoj kanonis dekfoje sirian teritorion. Alia trupunuo kontraŭleĝe enpenetras la libian limteritorion kaj okupas ĝin.

10-a de aŭgusto 1972: Izraeliaj trupoj bombardas per grenadĵetiloj sirian teritorion. Du militaviadiloj enpenetras la aerspacon de Libanio.

Sudafrikio:

La rasapartigaj leĝoj donas al la Vorster-polico ĉiujn eblecojn por la ĉaso de la malhelhaŭta loĝantaro, batalanta por siaj civitanaj rajtoj. La rasista ŝtato uzas ĉe tio metodojn, kiuj similas al tiuj de la Hitler-a Gestapo. Atestantoj raportas pri kruelaj mezepokaj torturmetodoj en Namibia, okupita de Sudafrikio. En junio 1972 oni trovis amastombon proksime de Omindaungilo en Ovamboland en la norda parto de Namibia. Laŭ eldiroj de la informa direktoro de South West Africa People's Organisation (SWAPO), Andreas Shipanga, en la tombo troviĝas la kadavroj de pli ol 100 viroj, virinoj kaj infanoj, murditaj de la sudafrikia polico.

Eĉ la plej malgranda progresiva moviĝo estas respondata per brutala perforto flanke de la Vorster-diktaturo. Laŭ informoj de juristoj antaŭ OUN en Sudafrikio ekzistas tribunaloj, kiuj po tago 1 900 „finjuĝas" aferojn, t.e. ili prenas al si tempon de nur 20 sekundoj por unu akuzito. Po jaro estas 150 ne-blankuloj mortturmentitaj, 500 000 homoj kondamnitaj al mallibereja aresto kaj 50 000 homoj vipe traktitaj.

Rodezio:

„Niaj afrikanoj estas la plej feliĉaj de la mondo!" Ĉi tiu eldiro de preskaŭ nesuperebla cinikismo originas de la rodezia rasistestro Smith, fine de la jaro 1971. Sed la vero estas, ke Smith ekde 1965 transformas Rodezion en policŝtaton laŭ sudafrikia modelo. Nur 250 000 blankaj koloniistoj subpremas ĉirkaŭ kvin milionojn da afrikanoj. Jen la bilanco de tiu politiko fine de 1971: Inter 1965 kaj 1971 estis kondamnitaj – laŭ nekompletaj raportoj – minimume 180 afrikanoj al la morto. Pli ol 700 kontraŭuloj de tiu reĝimo je tiu tempo estas arestataj en koncentrejoj. Ĉirkaŭ 6 000 personoj estas ĵetitaj ĝis tiam en malliberejojn pro „politikaj deliktoj".

Kreskanta krimeco

En Usono altiĝis la krimeco en la jaro 1971, kompare al 1970 je 11 procentoj. Precipe la nombro de gravaj krimoj kreskis salte.

La nombro de rabaj atakoj pligrandiĝis dum la pasintaj 10 jaroj je 177 procentoj. Meznombre okazas po 39 sekundoj iu perforta krimo.

Tiel estis registritaj detale en la jaro 1971 laŭ meznombro:

- po 30 minutoj unu murdo
- po 13 minutoj unu perfortaĵo
- po 82 sekundoj unu perforta rabo
- po 86 sekundoj unu korpa atako

Kvankam por la jaro 1972 ankoraŭ ne ekzistas definitivaj nombroj, tamen la ĝis nun atingeblaj informoj montras, ke la krimoj en tiu jaro plue kreskis.

[1]) Malamikaj traserĉoj

[El „Panorama-DDR", trad. Jürgen Hamann]



Rudi Graetz

La konstruo de akvobaraĵoj en arabaj landoj

La inaŭguro de la hidroenergetika komplekso de Assuan okazis antaŭ du jaroj. 13 jaroj antaŭe la unua ŝtata prezidanto de la Araba Respubliko Egiptio, Gamal Abdel Nasser, metis la fundamentan ŝtonon de la giganta konstruaĵo kun la elektrocentrejo, apartenanta al ĝi. La finigon de la akvobaraĵo „Sad el Ali" fine de la jaro 1970 ne ĝisvivis Gamal Abdel Nasser. Malgraŭ ĉiuj malhelpoj, duboj kaj malamikeco li realigis la konstruon kaj verigis per tio la revon de la popoloj depost jarcentoj.

Je tiu tago sennombraj homoj pilgrimis al tiu konstruaĵo, kiu baris la akvon por la bonfarto de la homoj. Per sia laboro 35 000 Egiptoj kaj 2 000 sovetaj ekspertoj realigis la grandiozan projekton. Sur la krono de la baraĵo troviĝas aŭtostrato. Tie Nikolai Podgorni kaj Anvar el Sadat tratranĉis la blankan rubandon.

Jam kelkfoje la enorma konstruaĵo pruvis sian neceson kaj utilon. La alta baraĵo, kiu portas la nomon „Sad el Ali", jam en la jaro 1964 montris sian taŭgecon, ĉar sen ĝia ekzisto la tuta valo de la Nilo estus dezertiĝinta per superakvado. Ĝi ŝirmis la landon dum la lasta jaro kontraŭ sekeco, kiu sekvis la senpluvecon. Per la baraĵo sufiĉe da akvo estis disponebla, malgraŭ la fakto, ke la akvonivelo estis la plej malalta depost 60 jaroj. Kaj certe ĝi estus kaŭzinta similan akvomankon kaj malsategon, kiel dum la malsatjaroj 1913/14.

Egiptaj kaj eksterlandaj sciencistoj kaj inĝenieroj finis 1954 la projekton por la konstruo de la akvobaraĵo por bridi per ĝi la Nilon, por malebligi inundojn kaj la konstantan mankon da akvo. Sed kiam 1956 la realigo de la projekto devis komenci, Usono kaj Grandbritio retiris siajn kreditpromesojn. Per tiu ĉi ĉantaĝo ili intencis bremsi la progreseman evoluon de Egiptio.

Sed la 27an de decembro 1958 estis subskribita flanke de Soveta Unio kaj Egiptio kontrakto pri la ekonomia kaj teknika helpo ĉe la konstruo de altbaraĵo pri nova kaj pli efika varianto de la konstruaĵo.

Grandaj estis la penegadoj de la konstruintoj dum la jaroj de la konstruado en la dezerto. Sablo-uruganoj, 50 gradoj Celsius en la ombro kaj aliaj malfacilaĵoj danĝerigis la plenumon de la limdatoj. Sed la labor-intenseco estis determinita de la konscio, ke necesis finigi la mizeron de la egipta popolo. Samtempe miloj da neinstruitaj laboristoj fariĝis faklaboristoj dum la konstruo de la baraĵo. La grandeco de Sad el Ali ebligus enigi 17foje la Cheops-piramidon.

En la tria jaro post la solena ceremonio de la ekfunkciado de la akvobaraĵo videblas, kiajn ŝanĝiĝojn la akvopovoj de la Nilo alkondukis. De Assuan ĝis la Mediteraneo, de la bordo de la Ruĝa Maro ĝis la limoj de Libio estas sentebla la rapida evoluo. Eblas akvumadi 880 000 Feddan da tero dum la tuta jaro, 950 000 Feddan aldone estas kultivitaj kaj akvumitaj. Preskaŭ trioble pligrandiĝis la areo por la kultivado de rizo. En la retenita akvo de la nova „Nasser"-maro malantaŭ la baraĵo eblas kapti po jaro 7 500 tunojn da fiŝo. La kapacito de la baraĵa elektrejo estas dek miliardoj da kilovathoroj po jaro. Tio ebligas la plukonstruon de moderna industrio en Egiptio kaj signifas konsiderindan fonton por altigi la naciajn enspezojn utile al la lando kaj la bonfarto de la loĝantaro.

Pluaj 45 000 Egiptoj en la jaro 1973 ricevos novajn laborlokojn kaj per tio havos regulan laboreblecon. Tio ebliĝis pro la plukonstruo de gravaj entreprenoj, inter ili la metalurgia kombinumo Heluan. Tie dum marto 1973 duobliĝis la produktado. Nun tie produktiĝas ĉiujare 700 000 tunoj da ŝtalo. Plue la aluminio-uzino kaj la sterkofabriko de Nag Hamadi. Per tiuj ĉi fabrikoj Egiptio intencas altigi la valoron de sia industriproduktado al 1,82 miliardoj egiptaj funtoj. (Unu funto = ĉirkaŭ 10 markoj.) Tio estas kvinoble pli ol en la revolucia jaro 1952. La elektroenergia fonto por ĉiuj objektoj estas Sad el Ali. Projektitaj estas ankoraŭ i.a. du cementfabrikoj kun jara produktado de miliono da tunoj.


Tre grava por milionoj da vilaĝanoj, kiuj vivis ĝis nun sub malfacilaj vivkondiĉoj, estas, ke al iliaj simplaj loĝejoj nun venos elektra kurento. Al ili venas elektra lumo, radio, eĉ televido kaj aliaj akiraĵoj, kiujn ebligas la elektrifikado de la vilaĝoj. La akvumado de la kampoj permana aŭ perbesta estos anstataŭigota per elektraj pumpiloj. Tiu ĉi plibonigo de la vivnivelo de milionoj da kamparanoj ebliĝis nur per la subteno de Soveta Unio. Sen ĝia helpo multaj planoj nur restis aŭ restus sur la papero kaj la akvoj de la Nilo senutiligitaj forfluus laŭ la kapricoj kaj pasioj de tiu ĉi afrika riverego.

Ankaŭ la Suria Araba Respubliko daŭrigas sian rapidan evoluon de la industrio kaj la stabiligon de la agrokultura produktatado. En 1973 sole tri miliardoj suriaj funtoj estos investitaj por grandaj evoluprojektoj. Je la unua loko staras la finkonstruo de la Eŭfrat-baraĵo, kiu post la Assuan-altbaraĵo en la nuna tempo estas la plej granda hidroenergetika konstruejo. Tie laboras kelkmil sovetaj kaj suriaj inĝenieroj kaj gelaboristoj. La baraĵo estos fermata dum julio 1973 kaj fino de la jaro la unuaj turbinoj produktos elektran energion, kiu estos ege utila por la Suria Araba Respubliko. 640 000 hektaroj da tero estos akvumataj. 60 000 kamparanoj ŝanĝos siajn loĝlokojn, ĉar la ĝisnunaj areoj subakviĝos. Dum la konstruado de la akvobaraĵo kaj de la elektrostacio estis konstruata samtempe la urbo Tabka, kiu nun jam havas 45 000 loĝantojn. Ĝia kresko daŭras.

En Irak komencis je la 7a de aprilo 1972 la konstruado de la Tartar-kanalo. En la Badia-dezerto 470 sovetaj kaj 4 000 irakaj laboristoj komencis la konstruadon de tiu ĉi estonta ligilo inter Tigris kaj Eŭfrat. Kvar jaroj estos bezonataj por la konstruo de la kanalo, kiu havos longecon de 40 km. La larĝeco de la kanala fundamento estos 40 m. Necesas eksplodigi la malmolegan teron ĝis 30 m profunde. Per la kanalo eblos forkapti la timitan printempan inundon de la rivero Tigris kaj konduki ĝin al la Tartarlago, kiu kuŝas meze en la dezerto. Per ĝi eblos poste dum la sekeca tempo dum somero altigi la akvonivelon de la rivero Eŭfrat. La kapacito de la Talarvalo estas ankoraŭ pli granda ol tiu de la „Nasser-lago".

En Irak ankoraŭ estas projektita la konstruo de granda baraĵo proksime ĉe la limo de Iran, ĉe la Eŭfrat-urbeto Hadita. Malantaŭ la estonta baraĵo estos retenataj sep miliardoj kubikmetroj da akvo. Do preskaŭ tiom multe, kiel per la suria Eŭfrat-baraĵo.

La arabaj popoloj bezonas la pacon por siaj grandegaj konstruadoj. Sed la militemaj regantoj de Israelo instigitaj per la konstanta subteno de usonaj imperiistoj ankoraŭ ĉiam rifuzas akcepti la Uno-decidojn. Tamen, politika solvo de la problemoj en Proksima Oriento ne nur estas en la intereso de la arabaj popoloj, sed ankaŭ en la intereso de la israela popolo mem. Nur per tia vojo eblos tie sekurigi la pacon.



Zentralbild

900 milionoj da infanoj urĝe atendas helpon

El dekdu infanoj naskitaj en evoluantaj landoj, du mortas en frua infanaĝo – el la deko, kiu travivis, nur kvin vizitadas lernejon, kaj nur du finas ĝin.
En landoj de „tria mondo" nur ĉiu kvara infano profitas la kuracistan helpon. Meza pezo de azia infano estas je 25 % malpli alta, ol tiu de eŭropa.
En evoluigantaj landoj malsatas 300 milionoj de infanoj en antaŭlerneja aĝo, 16 milionoj malsanas je tuberkulozo kaj 11 milionoj suferas pro lepro.
Jen proksimumaj terurvekaj ciferoj pri kiuj disponas UNICEF (United Nation International Children's Emergency Fund). Ĝi kreiĝis 1946, kiel organizaĵo de senprokrasta helpo por infanoj en landoj detruitaj pro milito, en 1950-a ĝi transformiĝis je organizaĵo de daŭra helpo por infanoj en landoj de „tria mondo".
UNICEF portas helpon al 111 landoj, kaj 128 aliaj libervole pligrandigas per kotizoj la financajn rimedojn de ĉi utila organizaĵo, pri kiu iam U Thant diris, ke ĝia agado estas la plej efika kaj malplej diskutita el tiuj, kiujn entreprenas Unuiĝintaj Nacioj.
Pasintjare la fonduso de UNICEF ampleksis 65 milionojn da dolaroj, el kiuj 75 procentojn faras la kotizoj de registaroj. Resto estas privataj dotaĵoj de diversaj fondaĵoj, perlaboraj agadoj, ekz. vendado de festaj bildkartoj, kiuj alportas dumjare 4 milionojn. La organizaĵo helpas diversmaniere 100 milionojn da infanoj en la „tria mondo".
Dum 25-jara ekzistado, Fonduso de Helpo por Infanoj ekipis 55 000 centrojn de sano en 132 landoj – instruis 700 000 da pediatroj, flegistinoj kaj instruistoj, vakcinis kontraŭ ftizo ĉirkaŭ 400 milionojn da infanoj, garnis 250 laktejojn kaj manĝejajn establojn. Ne estas hazardo, ke la organizaĵo ricevis antaŭ 7 jaroj la Pac-Nobelpremion pro „disvastigo de frateco inter la popoloj".
La helpo de UNICEF ampleksas 100 milionojn da infanoj. Tio ne estas malmulta. Sed la cento estas nur dekono de 1 miliardo da infanoj urĝe bezonantaj helpon. Kia estos la sorto de tiu naŭcentmiliona infanaro? Tiu-ĉi pli ol kvarono de homaro? UNICEF strebas influi la evoluplanojn de apartaj landoj. Ĉiu ŝtato, en ĉiu pli, aŭ malpli bona plano konsideras la bezonojn de la infanoj. Estas grava, ke oni faru tion prudente, kun penso pri sociaj eĉ regionaj diferencoj. Temas ankaŭ, pri tio ke oni garantiu al la infanoj prizorgon en ĉiuj cikloj de ilia vivo.
La ŝtatoj de la tria mondo, la disvolviĝantaj landoj certe ne tiel frue kapablos mem solvi la urĝan, tragikan problemon sen pligrandigita helpo de UNICEF, sen helpo de tuta homaro. Tio ne estas landoj, kie la proverba „mono kuŝas surstrate".
En 1970-a jaro la mondaj elspezoj por militaj celoj estis 4 000 – foje pli altaj, ol la jara buĝeto de UNICEF.
Ĉu la astronomiaj sumoj uzotaj aŭ uzataj, por la organizita hombuĉado, por verŝado de homa sango, ne povus almenaŭ parte servi por enverŝado de viviga sango en la vejnojn de malfortigitaj etuloj?

Laŭ pola revuo „Kontynenty" prilab. Lena – CR –

Infana mizero en la kapitalisma mondo

Laŭ raporto, prezentita antaŭ nelonge de la Internacia Labororganizo (ILO) en Ĝenevo en la kapitalismaj landoj pli ol 43 milionoj da geknaboj en aĝo ĝis 14 jaroj estas „ekonomie aktivaj", do iamaniere profesie laborantaj.
En Usono la infanlaboro ja estas oficiale malpermesita ekde 30 jaroj, sed la 6- ĝis 15-jaruloj ĉi tie ankoraŭ ĉiam estas malmultekostaj objektoj de ekspluatado. Esploro de American Friends Service Committee montris, ke ĉirkaŭ 800 000 infanoj laboras ĉefe kiel pagataj sklavoj en la agrikulturo. Se la kampofruktoj maturiĝas, ĉiujare pli ol 300 000 geknaboj migras kun siaj gepatroj de unu federacia ŝtato al la alia por helpi por kelkaj cendoj ĉe la rikolto.

600 000 malgrandaj forkurintoj – problemo

Konsidere al la mizero, kiu kondamnas la infanojn al plena senespero pri pli bona vivo, en Usono ĉiujare ĉirkaŭ 600 000 neplenaĝuloj forkuras dehejme. Kiel timas la amerika ĵurnalo „News and World Report", tiuj ĉi malgrandaj eskapantoj pli kaj pli fariĝas nacia problemo. En Boston forkurintaj infanoj dormas la tutan nokton en aŭtomatrestoracioj. En la pli varma aero de San Diego ili dormas grupe ĉe la strando. De la rekaptitaj eskapintoj ĉirkaŭ la duono estas pli juna ol 15 jaroj, multaj eĉ ne estas 10- aŭ 11-jaraj.


„Foiro de maldikaj brakoj"

En Italio sennombraj en ega malriĉeco vivantaj familioj konsidere al la rapide kreskantaj kostoj por vivtenado vidas sin devigataj fakte vendi siajn infanojn, inter ili 11-jaraĝajn, al entreprenistoj. Pri tia „foiro de maldikaj brakoj" en Altamura en la provinco Bari raportis la gazeto „Corriere della Sera": La tuto memorigas pri sklavokomerco. La etuloj estas palpataj, frapataj kaj rigardataj de ĉiuj flankoj, ĉar la ĉefoj deziras dungitojn, kiuj kapablas bone korpe labori . . ."

Nigra merkato per beboj

Ne malpli abomeninda estas fakto, pri kiu raportis la semajn-gazeto „Giorni – Vie Nuove". Tiel en Italio ĉiutempe eblas aĉeti bebon por unu miliono da liroj, do por ĉirkaŭ 6 500 markoj. Privataj zorgoinstitutoj kaj hejmoj aranĝis metodan nigran merkaton de infankomerco.

[El „Panorama-DDR" trad. D. Dungert]



Profesoro Jürgen Kuczynski
Zentralbild/Hill

Sistemo kontraŭ humaneco

Prof. D-ro Jürgen Kuczynski, longjara direktoro de la Instituto por Ekonomia Historio ĉe la Akademio de Sciencoj de GDR, prezentis al la publiko la 40-an kaj lastan volumon de sia „Historio de la situacio de laboristoj sub kapitalismo". Tiu ĉi verko estas la unua kaj sola ampleksa verko, priskribanta la situacion kaj batalon de la laborantaj klasoj en la tuta kapitalisma mondo dum periodo de pli ol 125 jaroj.

La ses ĉapitroj de la dua volumo dokumentas la grandegajn ŝarĝojn, kiun la kontraŭhumana imperiisma socisistemo trudas al la laboranta loĝantaro. Du mondmilitoj kaj multnombraj lokaj konfliktoj, granda kaj ĉiam kreskanta ekspluatado de la laboristoj kaj de la koloniisme subpremataj popoloj, ruinigo de kamparuloj kaj de mezaj socitavoloj, misuzo de la scienco kaj sciencistoj, narkotikaĵoj kaj amasiĝo de murdado, rabado kaj aliaj perfortaj krimoj – ĉio tio estas nek hazardo nek ekscesoj, sed imanentaj fenomenoj de la imperiisma sistemo. „La militoj", skribas Kuczynski, „en kiujn la imperiismo pelis la homaron, mortigis proksimume 75 milionojn da homoj. Militoj kaj militpreparoj perdigis al la homaro ĝis nun proksimume 10 plenajn jarojn de paca industriproduktado. Tio signifas: Se ne estus faritaj militoj dum tiu jarcento, por la tuta homaro povus esti ĉiu sepa jaro libera jaro, sen malpliiĝo de la civila produktado – same kiel por ĝi ĉiu sepa tago de la semajno estis libera –, aŭ la homaro povus disponi pri la produktoj, kreitaj dum tiuj dek jaroj".

Same kiel en tiu ĉi kazo la aŭtoro dokumentas ĉion punkto post punkto: La tuta malfeliĉo kaj la tuta malbono, kiun la imperiismo kaŭzis kaj kaŭzas al la laboruloj, fontas el ĝia karaktero kaj ĝiaj leĝoj. Sekve neniaj ajn reformoj helpos malebligi pluan malfeliĉon kaj pluan malbonon. Por finigi „la regadon de la monopolisma kapitalo, kies kreaĵo estas la imperiisma socio", ekzistas nur unu vojo: la komuna batalo de ĉiuj laboruloj.

Tiu ĉi ekkono, kiun la aŭtoro peras al la leganto, ne estas nova. Sed novaj kaj originalaj, interesaj kaj legindaj estas ĉiuj jenaj faktoj, citaĵoj kaj argumentoj, kiuj kondukas al ĝuste tiu ĉi ekkono. Kiu do serĉas teorian kirason, praktike uzeblan por la batalo kontraŭ la malamiko de la homaro, al tiu ni rekomendu la plej novan verkon de Kuczynski.

[El Panorama-DDR, tradukis Berndt]

„Por la Paco" XI/1971

Nur hezite mi decidis legi la XI-an numeron de „Por la Paco" eldonita en Moskvo 1971, Esperanto-Komisiono de Soveta Unio, 88 pĝ.

Kial mi hezitis?

Estas al mi malagrable kaj streĉe legi tiajn malgrandajn presliterojn.

Tamen mi ne bedaŭras mian decidon. Mi konatiĝis kun detaloj de iama kaj nuna soveta historio, scienco kaj arto.

La 87 paĝa modesta kajero komenciĝas per la „Deklaro de la Soveta Registaro" pri la problemo koncernanta kunvokon de konferenco inter la nuklearmilojn havaj ŝtatoj, daŭriĝas kun la „Manifesto de Asembleo de la Tutmonda Packonsilantaro" de Budapeŝto dum aprilo 1972 kaj la apelo al ĉiuj internaciaj kaj naciaj organizaĵoj de batalantoj, militveteranoj, anoj de la rezist-movado, malliberuloj de faŝistaj prizonoj kaj koncentrejoj fare de Soveta Pacdefenda Komitato kaj Soveta Komitato de Militveteranoj. Sekvas kelkaj rakontoj pri herooj de la granda Patria Milito.

Impresa estas la raportaĵo de Lawell Tomas (Usono) pri Siberio sub la titoloj „Admirinda Nuno", „Fantazia Estonto", „Grandioza Skalo", „La Gravitcentro" kaj „Aŭdacaj Planoj".

Ne mankas poemoj, skizoj, nek kanto nek porinfanoj paĝoj! Por mi mem la plej valoraj eroj estas jenaj: La memoraj vortoj pri vivo kaj agado de estimata Profesoro Bokarev, la raporto pri Sejt-12 (E-tendaro en Baŝkirio) kaj la notoj de G. Korotkeviĉ pri siaj konferencaj tagoj en Berlino.

Resume: La kajero publikigas porpacajn klopodojn kaj montras la disvolviĝon kaj disfloron de Soveta Unio. Helpe de ĝi la Esperantistaro povas konatiĝi kun sovetaj homoj, problemoj, intencoj kaj politikaj klopodoj. Oni povas rekomendi tiun ĉi legindan kajeron!

Hella Sauerbrey, Berlin

Imperiismaj militoj dum la pasintaj 25 jaroj



Senkomente

Sekurec-Konsilio, Aŭgusto 1972: La ĉina delegito vetoas la akcepton de Bangla-Deŝo en UN.

– „La plej bela sporto estas la milito" (Carl Diem, en 1931). Carl Diem estis la ĝenerala sekretario de la Olimpikoj en Berlino 1936 kaj responsis pri la okcident-germana sporto de 1945 ĝis 1962.

– „Universala Atlaso" aperis en Pekino, en 1972. Ĝi aneksas unu milionon kaj duonon da kvadratkilometroj de soveta teritorio.

– CR –

Kelkaj rimarkoj pri lingvouzo en „Paco"

Kvankam ĝenerale klara kaj facile komprenebla, la lingvouzo en nia revuo ankoraŭ foras de perfekteco, kaj tio estas bedaŭrinda, ĉar nia revuo ludas relative gravan rolon kaj tio postulas ke ĝi havu altan nivelon, ne nur politikan kaj kulturan, sed ankaŭ lingvan.
Necesas do ke la redaktkomitatoj havu tre kompetentajn kamaradojn por la korekto de la tekstoj. Mi deziras fari kelkajn komentojn.
1) *Uzado de artikolo:* Slavoj ĝenerale ne scias uzi ĝin kaj emas ignori ĝin eĉ kiam ĝi estas absolute necesa. Germanoj, male, emas uzi ĝin kelkfoje kiam ĝi estas nenecesa. Estas konata la diferenco inter *„la kato dormas"* kaj „kato dormas" (sed slavoj ŝajne ne konas ĝin). Tamen estas rekomendite neuzi la artikolon kiam ĝi ne absolute necesas. Ekz-e „(la) ĵaluzo estas grava manko", ĉar oni ne povas tie-ĉi imagi *unu* ĵaluzon; *Francio, GDR,* ĉar ekzistas nur unu Francio, nur unu GDR. Tamen germanoj daŭre diras *„la GDR"*. Miaopinie tio validas nur en iuj kazoj, ekz-e se oni parolas pri *„la Francio de la laboristoj"*.
2) *Uzado de afiksoj:* Ŝajnas al mi ke Germanoj emas trouzi ilin. Onidire la germana estas tre preciza lingvo kaj eble pro tio Germanoj emas utiligi maksimume, en Esperanto, ĉiujn elementojn de precizeco. Modernaj aŭtoroj tamen emas utiligi lingvon pli vervan kaj pli koncizan, kaj mi kredas ke ili pravas. La kunteksto ankoraŭ foje sufiĉas ĝenerale por bone kompreni. Kaj kiam oni parolas pri la principo de neceso kaj sufiĉo, oni tro ofte pensas pri tio kio estas necesa sed forgesas tion, kio estas sufiĉa.
Ekzemple en tre multaj kazoj oni diras *evoluadi, gastemeco, ebleco, sufiĉeco, renkontiĝo ...* kiam *evolui, gastemo, eblo, sufiĉo, renkonto ...* en la kunteksto *ĝenerale* sufiĉas plenplene.
Mi trovis ankaŭ en pluraj n-roj de „Paco" la vorton „progresiva" (progresiva homaro) kiu tute ne taŭgas en tiu-ĉi kazo, ĉar ne temas pri homaro kiu *povas* progresi, sed pri homaro kiu *deziras* progreson, do kiu *emas* progresi, kio postulas la vorton *„progresema"*. Do tie temas pri rekonvena uzo de sufikso.
3) *Po:* Tiu-ĉi malfeliĉa vorteto estas preskaŭ ĉiam malkorekte uzata, ekz-e: „Veturi 100 km po-hore", dum oni devus diri: „Veturi po 100 km hore" ... Vere strangas, ke tiel ofte oni trovas tion fundamentan malkorektaĵon en nia revuo – kaj en aliaj!
4) *Neologismoj* (eterna problemo): Oni tro ofte renkontas neologismojn aŭ formojn, kiuj tute senutile faras la lingvon pli peza. Ekz-e: *okupacio, evolucio,* apelacio anst. *okupado, evolu(ad)o, apelo.* En la sama artikolo oni trovas *imperiismo* kaj la tute neregulan *imperialismo,* aŭ *koloniismo* kaj *kolonialismo.* Tiuj kritikitaj formoj troviĝas en vortaroj, sed prefere ni evoluigu la lingvon al pli da simpleco kaj pli da koncizo kiam tio eblas.
5) *Netaŭgaj vortoj:* Oni ankoraŭ trovas tro ofte vortojn kies reala signifo ne korespondas kun la kunteksto. Ekz-e: *bombardi* anst. *bombi* aŭ *bombadi, akcio* anst. *ago,* ktp.... ankaŭ *ĝentila* anst. *afabla.*

W. Gilbert
(C.R.)

„La kvardekunua"

La Komisiono pri internaciaj ligoj de sovetaj esperantistoj, Moskvo, eldonis 1972 en esperantlingva teksto la ĉefverkon de la granda soveta verkisto Boris Lavrenev, „La kvardekunua". Redaktis N. Danovskij, 80 pĝ., multobligita.
Boris Lavrenev, verkante dum pli ol kvardek jaroj rakontojn, novelojn, teatraĵojn kaj romanojn, elektis kiel temojn prefere la gloran kaj senkompromisan batalon de la revolucio. La nun al la internacia esperantistaro transdonita novelo raportas pri la sorto de ruĝarmea taĉmento marŝanta tra la senlima, vintra sablodezerto ĝis la bordo de l'Aral-maro, desegnas la oferplenan batalon por la nova sociordo, por la venko de la socialismo. Koincide kun la 50-a datreveno de la fondiĝo de Soveta Unuio ĉi-tiu novelo ankaŭ hodiaŭ havas aktualecon kaj meritas la atenton de ĉiu literaturamiko.
La tradukinto uzis tre interesan propran stilon. Vivplenaj vortpentraĵoj pruvas en konvinka maniero la riĉecon de la internacia lingvo kaj la neelĉerpeblajn esprimeblecojn perhelpe de ĝia vortfarado.
Do, kie estas lumo estas ankaŭ ombro. Evidente la tradukinto ne sufiĉe priatentis la postulon, ke Esperanto devas esti flue legebla, ke la tekstoj devas esti klaraj kaj facile kompreneblaj. Jen estas kelkloke la traduko pro troiga abstrakteco de diversaj vortformoj por multaj legantoj tro komplika.
Kelkfoje la leganto staras antaŭ lingva enigmo, kiel devas pruvi la sekvonta frazo sur paĝo 10: „... stopis per histrikita de fusiloj kun bajonetoj homa knedaĵo."
Plue la tradukaĵo enhavas vortkunmetaĵojn neordinarajn kiuj formas nekutimajn vortbildojn, p.e. sur paĝo 43: „etridi = rideti". Ambaŭ formoj estas uzitaj en la sama tekstparto. Aŭ ĉu ĝi estas unu de la preseraroj (ekridi), kiuj troviĝas ne malofte en la teksto aldone malfaciligante la legfluon. Alia ekzemplo troviĝas sur paĝo 12: „pendesegni = desegni kun peno". Kial la tradukinto ne uzis „pene desegni", ĉar la unuan momenton direktiĝas la leganto al la verbo „pendi".
Certe ĉiu progresema Esperantisto aprobas la uzon de neoficialaj vortoj, se ili estas necesaj. Nur ŝajnas ke en „la kvardekunua" tro multaj tiaspecaj vortoj „toporo, onisko, gofrita, ĥalatoj kaj tiel plu" sennecese ĝenas tujan komprenon. Presita la volumo certe fariĝus ankoraŭ pli alloga kaj atentiga.
Malgraŭ la menciitaj mankoj tamen la novela traduko estas vera fonduso en lingva kaj ankaŭ soci-historia rilato.

Erich Würker

Kuŝanta tigro

Eldonejo „Eesti Raamat" Talinn aperigis 1971 malgrandformatan luksan libreton [75 pĝ.] kun ilustrita kovrilo kaj kvar ilustraĵoj. La internajn kovrilpaĝojn ornamas griz-nigraj pentraĵoj de Picasso. Tiu ĉi decenta gustoplena eldono bonege konvenas al la 14 rakontoj de la ŝatata estona verkistino Lilli Promet sub la titolo „Kuŝanta tigro". Ili pritraktas preskaŭ nerimarkeblajn eventojn, delikatajn sentojn, profundajn pensojn kaj homajn motivojn, kiujn oni kutime prisilentas. Ĉiu rakonto instigas al enprofundiĝo kaj pripensado. La leganto mem estas devigata, serĉi la internajn motivojn, sortojn aŭ solvojn. Tiom da rakontoj – preskaŭ tiom da demandoj: Kial la iama kantisto perdis sian racion? Kial la nekatenita aglo ne forflugas? Kial la oficiro de la germana armeo postulas nur unu respondon de Pablo Picasso? Kial la germana militkaptito ne plu venis? Kiam mi estis traleginta la libron mi tuj denove komencis ĝin legi kaj nun ĝin, duafoje leginte, la interna esenco ankoraŭ ekfloris pli bele. Ĉu ne la amo de Madame Louise superas ĉiujn imagojn pri amo?
Ĉe la rakonto „Vandaloj" mi ne trovis la ĝustan respondon. Kia problemo! Kiel oni povas eduki infanojn el abomeno je militkrimoj kaj soldata bruteco?
La „Versfaranto" estas unika parabolo. Mi tre bedaŭras, ke mi ne povas legi la aliajn prozaĵojn de Lilli Promet, kiuj jam pli frue aperis, ekzemple „Nur pro pura amo", „Disĉiploj de la sankta arto", „Rozkolora ĉapelo" aŭ iu alia.

Hella Sauerbrey

Raymond Schwartz

Pri la origino de l'kanzono

Tio ĉi ne estas kurso. Mi ne intencas klarigi al modernaj homoj, kio estas kanzono. Ĉiu posedanto de la Plena Vortaro konas la difinon de kanzono.
Sed pri unu punkto mi deziras alporti informon.
Oni ĝenerale, eĉ en kleraj medioj, scias tute nenion pri la origino de l'kanzono, kaj se vi demandas: „Kiu inventis la kanzonon?", unuj respondos per stultajo, aliaj, pli modestaj, konfesos sian nescion. Nu, gesinjoroj, mi malkaŝas al vi: estis la negroj, kiuj inventis la kanzonon!
Por kaŝi sian nudecon, de ĉiuj tempoj la negroj portas ĉirkaŭ la talio larĝajn zonojn, kiujn kutime ili plektas el kanoj. Ĉar ili la unuaj havis la ideon fari zonojn el kanoj, oni povas aserti, ke la negroj estas la inventistoj de l'kanzonoj.
Kaj vespere, kiam milda venteto blovas susure sur la bordoj de Orinoko aŭ Kunene tra la negraj kanzonoj, ĉiu kano kontribuas sian tonon, kaj la tuto konsistigas ĉarman arion, kiun oni nomas – jes, vi divenis – kan-arion!
Kompreneble, ĉiu rajtas, garni sian zonon laŭ siaj preferoj kaj gusto. Unuj uzas rubandojn kaj bukojn, aliaj – florojn kaj bantojn. Sed kio utilas al la negroj por garni zonojn? –
La kanoj.
Kaj kio utilas al civilizitaj homoj, kiam ili volas . . . garnizonojn? –
La kanonoj.
Tie kuŝas la diferenco. Kaj estas bone tion scii.

EPIGRAMOJ de Sztaudynger

Konfeso de recenzisto
Pri viaj roloj mi sinceras:
En rol' de Ev' mi vin preferas.

Apelo
Lavu vin ĉiam, knabinoj,
Vi ne scias pri tag' kaj hor' de l'destino!

La unua demando
Kiam kreis Di' Adamon,
Li demandis tuj: „Kaj damo?".

La nuntempa Penelopo
Kokrante la edzon ŝi faris trikeron,
Nomtage ŝi donacis al li puloveron.

Atesto
Ne nur monumentoj
Atestas pri iu jarcento.



Zentralbild

Jürgen Kuczynski

Ĝis kiam ankoraŭ librojn?

En la jaro 1968 en GFR aperis verko titolita „Ĉu je la fino de la libro-epoko?", en kiu oni rigardis la libron kiel „nepostuleblan en la kadro de plenelektronigita kaj per komunikaj satelitoj ĉirkaŭata mondcivilizacio malŝparon de spaco, tempo kaj forto". Ne same senkaŝe sed iomete melankolie diris al mi mallonge post tio la ĉeflektoro de unu el niaj eldonejoj, kiu alproksimiĝas al la aĝo de 50 kaj amas sian laboron: „Mi esperas esti respondeca por libroj ankoraŭ ĝis pensiula aĝo – sed, ĉu post 20 jaroj libroj ankoraŭ estos publikigataj?"
Kiel do aspektos la vero? Ĉu ni ne plu bezonos librojn?
Kelkaj el la prognozistoj de senlibra epoko argumentas tielmaniere: Grandparto de la aperantaj libroj kaj revuoj neniam estas legataj de tiuj, por kiuj ili estis verkitaj. Neniu plu kapablas legi ĉion legendan. Oni nur pripensu: ĉ. 1 900 ekzistis proksimume 400 revuoj en 5 lingvoj, kiuj publikigis gravajn legindajojn por kemiistoj. Hodiaŭ estas pli ol 12 000 revuoj en pli ol 50 lingvoj. En Sovetunio, kiu tiurilate antaŭas ĉiujn aliajn landojn, laŭ ili la libro aŭ la revuo por naturscienculoj kaj teknikuloj jam nun ne plu gravas. Tie oni prilaboras pojare ĉ. 10 milionojn de dokumentoj, presitajn kaj nepresitajn, por retroveble registri la dezireblajn informojn kaj liveri la deziratajn.
Estas do vere imageble, ke post iom da tempo malaperos libroj aŭ revuoj, kiuj entenas ĉefe informojn, kaj estos anstataŭataj per informcentroj, kiuj eble eldonos senenhavajn, nur indikajn informfoliojn. Tio estus nur avantaĝa kaj altigus la nivelon de la ankoraŭ aperontaj libroj kaj revuoj, kiuj donus al ni pripensojn anstataŭ kolekton de faktoj. Sed oni imagu librojn kaj revuojn anstataŭitaj per informfolio, eldonitan de centra dokumentejo, kiu sub la gvidvorto „mi amas vin" peras po jaro 10 000 titolojn de lirikaj poemoj!
Do, libroj kaj revuoj ekzistos, ni diru, en la jaro 2 000, sed ege pli malmultaj ol ĝis nun, ĉu?
Eble, esperebIe, estos pli malmulte da revuoj – sed certe ne pli malmulte da libroj, tamen alia sortimento. Kaj tia aliigo de la sortimento ne nur povas esti utila kaj jesinda, ĝi eĉ estas historie sufiĉe kutima. Oni nur memoru, ke la beletro altigis sian proporcion en la katalogo de la Lajpciga foiro de 5,8 % en la jaro 1740 je 21,4 % en la jaro 1800, malfavore je teologio kaj religiaj edifoj. Tio certe ne estis malavantaĝo por la kultura progreso. Giganta estos la kultura progreso ankaŭ, kiam aperos anstataŭ 10 000 revuoj pri iu scienco, plenaj je malgrandaj utilaj kolektoj de faktoj nur ankoraŭ 100 kun inteligentaj problemelmontroj, kaj oni petas informojn pri faktoj de iu dokumentejo.
Sed ĉu oni produktos librojn en la hodiaŭe kutimaj kvantoj kaj kiel ĝis nun, en same primitiva, multekosta, materialraba maniero?
Oni konsideru: en la mondo nuntempe vivas pli ol 800 milionoj de analfabetoj kaj ĉ. 200 milionoj kiuj fariĝis analfabetoj ĉar ili estis nur iomete instruitaj pri legado kaj skribado, sed post la lerneja tempo apenaŭ havis okazon sperti tiun arton kaj pro tio denove forgesis ĝin. Kia bezonego ekestos, kiam tiuj homoj aŭ iliaj infanoj aperos sur la libra merkato! kaj kiam plua miliardo de homoj vivos en socia ordo, kiu ebligas kulturplenan pasigon de la libera tempo! kaj kiam en la socialisma ŝtataro la libera tempo estos plilongigita! Ne, la librobezono plu altiĝos, eĉ se la dokumentejoj transprenos parton de la ĝisnunaj presproduktoj.
Kaj se ni ĝenerale enkondukos la elektronan kompostadon, kiu ja hodiaŭ jam ekzistas, ni eĉ kapablos produkti librojn de la ricevo de la manuskripto ĝis vendado dum nur malmultaj tagoj. Restas nur ankoraŭ substitui la paperon per alia materialo, kiu estas malpli kosta kaj de pli bona meza kvalito. Tio estas grava tasko por la kemiistoj en la tuta mondo.
Ne necesas demandi „ĝis kiam ankoraŭ librojn?" sed pli bone „ĝis kiam ankoraŭ same primitivan libroproduktadon?", ĉar la libro restos. Ĝi havos pli valoran enhavon kaj aspektos pli kaj pli bele.
Cetere: Kompreneble ni bezonas ankaŭ pli da spaco por librobretaroj, hejme.

[El Weltbühne 6/1973 trad. Linde Knöschke]

Gandhi – la „patro de la hinda nacio"

Antaŭ 25 jaroj Mahatma Gandhi estis murdita

De d-ro Bianca Schorr

Mohandas Karamchand Gandhi sendube apartenas al la grandaj eminentaj personoj de nia jarcento. Lia influo je la nacia liberiga movado de la hinda popolo estis unika. La eĥo de lia efikado transiranta vaste trans la limojn de Hindio etendiĝas ĝis en nia tempo. Gvidantoj de la movado por la civitanoj rajtoj de la usonaj negroj, batalantoj kontraŭ la faŝisma apartiga politiko en Sudafriko, usonaj soldatoj, kiuj rifuzas la partoprenon en la krima milito kontraŭ la vjetnama popolo, ne lastvice apogas sin je Gandhi. Kiam en la jaro 1969 la tuta progresema homaro celebris la 100. naskiĝtagon de Gandhi, ĝi honoris lin kiel batalinton kontraŭ imperialismo, por mondo sen mizero, subpremado kaj milito.

Gvidanto de la nacio

Gandhi estis la plej influriĉa gvidanto de la hinda nacia movado – cetere gvidanto, kiu neniel estis nepridisputita. Li ne malofte konfuzis kaj malkontentigis siajn plej intimajn kunluktantojn same kiel siajn sennombrajn adeptojn, faris politikajn erarojn kaj suferis malvenkojn, kiuj longe okupegis la nacian movadon. Kaj tamen estas nemiskoneble, ke en decidigaj momentoj Gandhi akceptigis la de li rekomenditan politikon, ke li disponis ĝis la fino de sia vivo pri aŭtoritato ĝis tiam de neniu alia hinda politikisto atingita.

Kiel tio estas klarigebla? Ni scias de liaj samtempuloj, ke Gandhi elradiis strangan ĉarmon, kiun preskaŭ neniu povis eviti. Lia kapablo, gajni homojn por liaj ideoj, sendube estis eksterordinare granda. Firmeco, ofte intensigita ĝis severeco kontraŭ si kaj aliaj, kaj samtempe boneco eliris de li. Krome la profunda humaneco de lia naturo ligiĝis kun lerteco en la taktiko en la disputo, kiu rare troveblas samranga.

Kio kaŭzis, ke Gandhi fariĝis tiu nacia gvidanto par excellence, estis tamen unuavice aliaj faktoroj. Ni revoku la situacion en la memoron, dum kiu la politika efikeco de Gandhi en Hindio ekkomencis kaj post nelonge popularigis lin. Estis la tempo de la revolucia ekprospero post la unua mondmilito. La antagonismo inter la interesoj de la hinda popolo kaj la brita imperialismo evidentiĝis pli ekstreme ol iam. En la organizita nacia movado, staranta sub burĝa gvido kaj reprezentita antaŭ ĉio per la Hinda Nacia Kongreso, la maltoj de la propra ĝisnuna politiko kreskis kun la opozicio kontraŭ la subprempolitiko de la koloniaj mastroj. Samtempe unuafoje pli multnombraj amasoj spontanee ekvigliĝis; en la strikkampanjoj de la juna hinda proletaro kaj en longedaŭraj kamparanaj tumultoj ili manifestis sian volon, plibonigi sian situacion. La objektive necesa interligo de la organizita nacia movado kun la popolamasoj, fundamenta interna antaŭkondiĉo por la venko super la koloniismo, reale ebliĝis.

Ke en la sekva tempo la nacia movado kreskadis al potenca kontraŭimperialisma forto mobilizanta la amasojn, Gandhi faris eminentan kontribuon. Estis li, kiu per sia programo de „neperforta nekunlaboro" ekipis la nacian kongreson per nova metodo de la batalo kontraŭ la kolonia regado. Lia metodo permesis kaj neprigis la inkluzivon de la laborantaj klasoj kaj tavoloj en la nacian movadon per maniero, kiu estis akceptita de la burĝaj gvidfortoj. Ĝis tiam tiuj timevitis apeladi al la batalpreteco de la popolamasoj kaj fruktuzis ilin por la nacia movado. Gandhi montris al ili la vojon, starigi ties revolucian elanon tiel en la servo de la nacia movado, ke unuflanke tiu enorme gajnis je batalforto kaj aliflanke ne povis elgliti el la burĝa hegemonio.

La fidon de la simplaj homoj en sia gvido Gandhi akiris al si, okupante sin pri ilia mizero kaj bezono. Li identiĝis subjektive kun la ekspluatatoj kaj senrajtigitoj. Li intervenis je ilia flanko en socialaj konfliktoj. Unuan sensacion en Hindio li elvokis per la gvidado de movado de indigokamparanoj kontraŭ iliaj rektaj britaj ekspluatintoj. Post tiu kampanjo sekvis striko de la tekslaboristoj, kiu sub lia gvidado direktiĝis kontraŭ hindaj kapitalistoj, kaj kamparana movado kontraŭ troaltigita farmkotizpago.

Senlaca engaĝiĝo

En sia persona vivmaniero li solidariĝis kun la sorto de milionoj da homoj. Libervole li rezignis pri ĉia komforto, estis treege kontentiĝema en sia nutraĵo, vestis sin nur per simpla blanka kotontuko. Per ĉio ĉi li plenumis laŭ la opinio de la hinda popolo la tradician idealon de malegoisma servo kaj donis al ĝi samtempe politike ege efektivan novan enhavon.

La socialreforma agado de Gandhi baziĝis sur socikoncepto, kiu de sur etburĝaj-kamparanaj pozicioj praktikis akran kritikon pri la kapitalismo kaj serĉis la modelon por socio libera de mizero kaj ekspluato en la pasinto, en la antaŭkolonia vilaĝa komunumo. Respondis al ĉi tiu etburĝa-kamparana utopia socialismo, ke li aktive engaĝis sin por la revivigo de la hejma kaj vilaĝa industrioj; hejman ŝpinadon ekz. li deklaris nacia devo kaj organizis la bojkoton de britaj industrivaroj (precipe teksaĵoj). Li instigis la nacian kongreson, kompletigi la batalon kontraŭ la koloniismo per „konstruiva programo" de sociala laboro por la bono de la malsatantaj amasoj. Sed antaŭ ĉio por li estis la ĉefaĵo, veki la iniciativon de la amasoj kaj kuraĝigi ilin al sinhelpo en la senco de siaj socialreformaj strebadoj.

La „mistero" de lia amasinfluo do konsistis en tio, ke Gandhi konscie orientis sin laŭ la simpla homo, vivis ties vivon, parolis ties lingvon, esprimis ties konceptojn kaj esperojn, ke li faris la lukton kontraŭ malsato kaj mizero nacia programo kaj aktivigis sennombrajn kongresanojn por tiu tasko.

Tamen inter la humana strebo de Gandhi kaj liaj konceptoj pri la solvo de sociaj problemoj manifestiĝas profunda kontraŭdiro, kiun li ne kapablis supervenki. Li estis tro multe celanta, la batalforton de la amasoj, je kiuj li apogis sin kaj por kiuj li sentis sin responsa, ne lasi fariĝi revolucia renversa forto.

Lia granda historia merito ne povas esti malaltigita per tiu konstato. Sub la influo de Gandhi la hinda nacia movado plifortiĝis al potenca kontraŭimperialisma forto, kiu akcelis la fiaskon de la brita kolonia regado. Gandhi stimulis en sia subtretata popolo ne lastvice per sia propra ekzemplo novan konscion de la forteco kaj de la nacia digno, de la sentimeco kaj decidemo. Hindio adoras lin kiel la „patron de la nacio", kies filojn kaj filinojn li senĉese edukis al kuraĝaj, disciplinitaj kaj oferpretaj batalantoj.

[El „Horizont" trad. Dr. Schüler]

Demande de leganto: Eĉ trifoje la reprezentanto de Granda Britio en la Konsilantaro Por Sekureco de la Unuiĝintaj Nacioj uzis sian vetoorajton por malebligi rezolucion, kiu postulis efikajn agojn kontraŭ la rasisma blanka minoritata reĝimo en Sudrodezio. Sciante tiun ĉi fakton kaj multnombrajn aliajn ekzemplojn de imperiisma obstrukcia politiko, sekvas la demando pri la efektiveco kaj funkcia ebleco de la Konsilantaro Por Sekureco.

Kiam je la 26-a de junio 1945 la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj estis subskribita, la subskribintaj ŝtatoj sin devigis, kunigi siajn fortojn por gardi la mondpacon kaj internacian sekurecon. Por atingi tiun ĉi altan celon, oni kontraktis, kiel precipe akcentis la Preamblo de la Ĉarto, adekvatajn principojn kaj metodojn. El tio oni serĉu la klarigon, ke la membraj ŝtatoj de UNO transdonis al

La efiko de la Konsilantaro Por Mondsekureco

la Konsilantaro Por Sekureco kiel al la plej grava konstanta organo de la organizo de UNO laŭ paragrafo 24 de la UNO-ĉarto „la ĉefan respondecon por gardo de mondpaco kaj internacia sekureco". Diference al aliaj UNO-organoj laŭ artikolo 25 de la Ĉarto la Konsilantaro Por Sekureco rajtas akcepti devigajn decidojn, kiujn devas agnoski kaj realigi ĉiuj membroj.

En la Konsilantaro Por Sekureco kaj en UNO la ago de la kvin konstantaj membroj de la Konsilantaro Por Sekureco (Sovetio, Usono, Granda Britio, Francio kaj P.R. Ĉinio) havas eksterordinaran signifon. Ĉar decidoj de la Konsilantaro Por Sekureco, escepte pri procedurproblemoj, nur povas esti akceptitaj, se ankaŭ tiuj kvin ŝtatoj aprobis ilin unuvoĉe, la agpovo de tiu organo dependas de tio, en kiu grado interkonsentas aŭ akiras interkonsenton la kvin konstantaj membroj. Ĝuste tiu ĉi proceduro transdonas al la konstantaj membroj de la Konsilantaro Por Sekureco eksterordinaran respondecon, laŭ senco de la UNO-ĉarto kaj fidele al la principoj de la politiko de paca koekzistado fari ĉion, por ke la mondorganizo pruviĝu kiel efika instrumento por pacgarantio kaj popolinterkonsento.

Demandante la kialon de tiu ĉi principo de unuvoĉeco de la grandpotencoj kaj konstantaj membroj de la Konsilantaro Por Sekureco, kiu estas fiksita en paragrafo 23 de la UNO-ĉarto, tio estas klarigebla kiel rezulto de la internacia proporcio de la fortoj, kiu evoluis post la dua mondmilito. Tiu ĉi voĉdona principo rezultas logike el la neceso de paca koekzistado inter ŝtatoj kun diferencaj socisistemoj. Ĝi baziĝas sur popolrajta principo de suverena sameco de la ŝtatoj, sendepende de iliaj sociaj sistemoj kaj ĝi limigas la misuzon de UNO per la imperiismaj grandpotencoj. La rajtoj de la konstantaj membroj de la Konsilantaro Por Sekureco, kiuj rezultas el la unuvoĉprincipo, kondiĉas el ties granda respondeco por daŭra gardo de la mondpaco. Ĝuste tial la voĉdona principo de la Konsilantaro Por Sekureco fiksas, ke kontraŭ la volo de la kvin membroj de la Konsilantaro ne realiĝas valida decido (vetoorajto).

Kontraŭe al la kazoj de malhelpado de la laboro de la Konsilantaro Por Sekureco en tiel signifa regiono de forigo de rasismo en Afriko per la vetoo de imperiismaj potencoj Sovetio uzis sian pozicion kiel konstanta membro de la Konsilantaro Por Sekureco por gardado de suvereneco kaj sendependeco de la ŝtatoj.

Tiel ĝi ekzemple 1961 malebligis la imperiisman provon, akuzi Hindion post la liberigo de la portugalaj kolonioj Goa, Diu kaj Daman kiel agresanton. Ĝuste tiu ĉi kazo en la historio de la Unuiĝintaj Nacioj evidentigas, ke ne la unuvoĉa principo malutilas al la mondorganizo, sed la kontraŭ la Ĉarto aganta politiko de imperiismaj ŝtatoj. Sovetio ĉiam faris la pacgardajn principojn de la UNO-ĉarto al la bazo de siaj agoj en la Konsilantaro Por Sekureco. Ĉi tie ni ankaŭ serĉu la elirpunkton por ĉiuj tiuj provoj kaj proponoj de imperiismaj sferoj por reformi la UNO-ĉarton kaj la funkcion de la Konsilantaro Por Sekureco, kiuj celas finfine al reakiro de perditaj imperiismaj pozicioj.

La pli ol 25-jara historio de UNO pruvis, ke la sukcesa agado de la mondorganizo kaj de ties institucioj kondiĉas la striktan plenumon de la Ĉarto kaj de ties principoj, kiel deciditaj 1945 de la fondintaj ŝtatoj. Pro tio oni nur povas serĉi la ŝlosilon por pli granda efektiveco de UNO en tiu fakto, ke ĉiuj per la membriĝo al la mondorganizo akceptitaj libervolaj devoj estu plenumataj ĉiuflanke en la senco de la UNO-ĉarto. Ne necesas substreki, konsidere al iliaj pozicioj en la internacia vivo, ke tiu respondeco koncernas precipe la konstantajn membrojn de la Konsilantaro. La sperto de la plej nova historio pruvis, ke ĉiam tiam paco kaj sekureco povis esti garditaj, se tiuj agis unuece laŭ la devoj kaj ideoj de la UNO-ĉarto. Kontraŭe, ili spertis malutilon, se imperiismaj potencoj provis misuzi UNO-n kaj ties organojn kaj unuflanke subordigi ilin al ilia potencpolitiko. La afero Sudrodezio intense pruvas tion.

[Manfred Aussen en Horizont 4/73 trad. L. Schödl]

RECENZO

La horloĝisto de Djen Bjen Fu

estas la titolo de volumo de elektitaj vjetnamaj noveloj, aperinta 1971 en Hanojo (413 pĝ.). Tiu ĉi titolo ne precize karakterizas ĝian multflankan enhavon. Pli bone oni povus titoli ĝin „Aventuroj kaj homaj sortoj en milita tempo".

Sed oni ne atendu nur glorajn priskribojn de herooj aŭ famaj batalantoj! La noveloj pritraktas simplajn homojn en ĉiutagaj ĉirkonstancoj kaj preskaŭ nerimarkeblajn heroecojn de simpluloj el la periodo 1945–1964. Ĉiu novelo estas mozaikŝtono de la multflanka danĝerplena vjetnama vivo.

Oni konatiĝas kun la nova kooperativa vilaĝa vivo en la liberigita zono same kun la pramalnovaj kutimoj de la popolo kaj la mirinde alloga beleco de la pejzaĝo: „La adoptitino", „Du fratinoj" kaj „Vivo de artisto" estas tre delikatsentaj psikologiaj rakontoj, kiuj konatigas nin kun la enkreskiĝo en la novan kadron de la socialisma erao.

Kompreneble la plej multaj noveloj pritraktas militajn incidentojn kaj emociigajn kortuŝajn heroaĵojn de la plej diversaj homoj kaj viroj kaj virinoj kaj infanoj, kiuj nur vivas por pli bona socio sur libera kaj sendependa tero.

Ne estas facile, prijuĝi, kiu novelo plej bone plaĉis al mi. Ĉu „La gardisto de lumturo" de Biu Duc Ai, kiu montras per la sorto de nur unu homo la tutan historian evolucion de la lastaj jardekoj, ĉu „La geedzoj A Fu" de To Hai, ĉu „Lunhelo sur la arbaro", en kiu Nguyen Mink Chau rakontas la penan vivon de batalantoj kondukistoj de ŝarĝaŭtoj aŭ ĉu „Patrina koro" de Vu Le Mai aŭ „Sur la Vojo Nro 1" de Xuan Trink.

Ĉi-komence mi diris, ke la noveloj ne priskribas heroecojn? Mi eraris! Ili nur priskribas heroecojn. Ĉar ĉiuj homoj, partoprenintaj la rezistadon aŭ partizanmiliton jam estas herooj: La horloĝisto de Djen Bjen Fu, la vundita vilaĝa instruistino Horan, same kiel la juna pentristino Nguyet kaj ne laste la partianoj, kies atendeman paciencon kaj senbruajn sinoferojn oni prisilentas.

Vide al tiuj vjetnamaj suferoj la postulo de la homaro estu paco! Ĉiuj agu, por ke la paco venku!

Hella Sauerbrey

Pri gastlaboristoj kaj komerco de la morto

Amika respondo al „kontakto"

Ni gratulas la organon de TEJO pro tio, ke ĝi kuraĝe atakas iujn sociajn problemojn anstataŭ praktiki senfruktan silenton. Tutcerte la redakcio de „Kontakto" komprenos ke amika kritiko kelkfoje estas necesa.

Mi ekzemple ne povas konsenti kun la artikolo „Gastlaboristoj en la Oriento" aperinta en la No 3/1972. Tiu-ĉi artikolo estas „ŝtelita de eŭropa revuo". Oni ŝatus koni ĝian titolon kaj la aŭtoron. Diru al mi por kiu vi laboras, mi diros kiu vi estas... Tio estas speciale vera en la gazetaro!

Estas tute klare ke la aŭtoro intencis „demonstri" ke socialismo ne alportas kontentigan solvon al la nuntempaj problemoj. Tio estas la nuna taktiko de la defendantoj de kapitalismo, alpremitaj al defensivo. Fakte estas dirite ke „la planekonomio ne solvis la problemon de surpluso de la laborforto", ke „senlaboreco" (tiu honta plago de kapitalismo – NDLR –), „fakte ekzistas en *ĉiuj* (substrekita de ni) entreprenoj" (de la socialismaj landoj) „en la formo de nesufiĉa utiligo de la dungitoj".

Neniu pretendas ke socialismo solvis ĉiujn problemojn per sorĉo-vergo sed ne mankas la homoj kun la plej diversaj politikaj opinioj, kiuj konstatas veran ekonomian miraklon en la landoj menciitaj de la citita artikolo (t.e. la landoj de la Varsovia Pakto). Ili fakte saltis en kurtega tempo de stato terure subevoluinta al rango de moderna industria socio, plejparte malgraŭ neimageblaj perdoj kaj detruoj dum la militoj kaj malgraŭ al senĉesaj intrigoj de la imperiismo. En la jaroj 20-aj USSR estis tute sensanga post la „blanka" kaj la fremda intervenoj, kaj devis konstrui de A ĝis Z tute novan ekonomion, sensperte, kun popolo grandparte analfabeta. Kaj jam en 1941 ĝi devis suporti la plej gravan pezon de la hitlera agreso, kies krimoj kaj detruoj estas nemezureblaj. Kaj kion diri pri la martira Pollando? Kia estis la sorto de la mizeraj kamparanoj en Hungario, Rumanio aŭ Bulgario antaŭ nur kelkaj jardekoj? Necesis rediri tion, ĉar iuj personoj tro facile forgesas kion devis travivi tiuj popoloj.

Tio dirita, evidentas ke la artikolo reproduktita en „Kontakto" mezuras la „nesufiĉan utiligon de la dungitoj", la „produktivecon", la „ekonomian reformon" laŭ kapitalistaj kriterioj. Sed li simple montras, tute nevole, ke socialismo garantias laboron al ĉiu kaj pruvas sian humanisman karakteron, dum kapitalismo postulas maksimuman, nesuporteblan produktivecon kaj ĵetas la „surpluson" da laboristoj en senlaborecon kaj malesperon.

Mi ne pretendas ke la organizado de la laboro en la socialismaj uzinoj estas ĉie perfekta. Socialismon konstruas ne unu tutpotenca kaj neerarpova Dio, sed la homoj mem, kiuj ne estas perfektaj sed iom post iom perfektiĝas...

La esenca afero estas la jena: Produktiveco en socialisma socio progresas per pli bona organizado de la laboro, mekanikigo kaj aŭtomatigo. Tiele la maŝinoj servas la homojn, igas ilian laboron malpli peniga, ilian vivon pli feliĉa. Kaj kiam la produktiveco ebligas malpliigon de la labor-horoj, ne troviĝas „mastroj" por oponi tion en la nomo de siaj sanktegaj super-profitoj. Krome, la altiĝo de la viv-nivelo kreas kreskantan bezonon de varoj, kiu ne estas nuligita per konstantaj prez-altiĝoj. Kio estas pli normala kaj pli logika, kiel povus naskiĝi senlaboreco en tiuj kondiĉoj?

Tute prave la redakcio de „Kontakto" substrekis ke la fenomeno de laborista migrado en la landoj de l'Varsovia Pakto havas „liliputajn dimensiojn" kompare kun la migrado en la kapitalistaj eŭropaj landoj. Fakte ŝajnas ke en moderna socio, migrado de laboristoj, pro teknikaj kaŭzoj, estas certagrade neevitebla, eĉ sen fenomeno de „senlaboreco malantaŭ la fabrika pordego", kiu estas stranga interpreto de la realaĵo fare de la aŭtoro de la menciita artikolo.

Ankaŭ strange estas, ke li silentas pri la vivkondiĉoj de la gast-laboristoj en la socialismaj landoj. Ĉar sendube ili estas tute nekompareblaj kun tiuj de la enmigrintoj vivantaj en francaj ladvilaĝoj kaj ekspluatataj de senskrupulaj mastroj... Necesas por tiuj lastaj trovi alian vorton ol *gast*-laboristoj, ĉu ne?

Ankoraŭ necesas diri ke mi konas multajn laboristojn en mia lando, kiuj akceptus kun ĝojo la labor-kadencojn de la sovetaj uzinoj, kaj ili pro tio ne konsiderus sin kiel senlaborulojn „malantaŭ la fabrika pordego"!

Ĉiumaniere kapitalismo, kun siaj denaskaj difektoj: socia maljusteco, koloniismo, milito, senlaboreco, ktp.... estas putranta kaj devas cedi lokon al nova sociordo, t.e. al socialismo, kiun la popoloj konstruos en la kadro propra al ĉiu nacio. Spite al la misfamigantoj de socialismo, ne ekzistas alia vojo.

Ankaŭ mi ne povas konsenti kun la artikolo „Komerco de morto", kiu metas en la saman sakon ĉiujn registarojn sendistinge. Mi konsideras tion tro facila kaj demagogia.

Tro facila ĉar tio ĵetas vualon sur la esencan demandon: „Kiu kulpas pri la militoj?" Oni fakte ne povas serioze defendi la pacon se oni ne kondamnas tre precize la milit-instigantojn, se oni ne faras diferencon inter agresantoj kaj agresatoj, inter banditoj kaj honestuloj. Tia sinteno nepre kondukas al konfuzo kaj finfine servas la responsulojn de la konfliktoj kaj lasas la popolojn ideologie senarmaj kontraŭ novaj konfliktoj. Vole nevole.

Demagogia ĉar tio flatas la antimilitistan tendencon de la homoj ĝenerale sed ne donas al ili klaran kaj pravan perspektivon por la batalo kontraŭ milito.


La kulminon de nerespondeco atingas la menciita artikolo per la jena aserto: „Sur la podio de UN ili (Usono, Sovetunio, Britio kaj Francio) pledas por armistico, sed malantaŭ la scenejo ili vigle konkuras per liverado de armiloj kaj municio."

Ho, karaj vjetnamaj gefratoj, aŭskultu la konsilojn de viaj „samideanoj": Usono verŝajne ne agresis vin en via propra lando, vi ne devis akcepti la sovetajn raketojn, kiuj frapis la B.52-ojn, vi ne devis utiligi la malbenitajn armilojn senditajn de la socialismaj landoj, kaj sekve vi devis fariĝi poreterne la sklavoj de la usona imperiismo!

Jes, ni devas energie batali kontraŭ tiu falsa pacifismo, kiu konsilas al la popoloj ne fari diferencon inter amikoj kaj malamikoj. Ĉar la afero fakte estas tre klara. Al kiuj Sovetunio liveras armilojn? Al Vjetnamio, Egiptio, Sirio, Hindio, Kubo ktp...., t.e. al ŝtatoj, kiuj minacas neniun, kiuj devas alfronti minacojn, intrigojn aŭ invadojn kaj volas simple vivi libere kaj sendepende. Al kiuj la kapitalismaj ŝtatoj liveras armilojn? Al Israelo, Sud-Afriko, Hispanio, Portugalo, Greklando... t.e. al agresemaj, rasistaj, faŝistaj, koloniistaj ŝtatoj. La diferenco ne estas miriga: en la socialismaj landoj troviĝas neniu Bazil Zaharof, kiu amasigas enormajn

Ekspedicio „Ra – II"

Per sunboato en la pasintecon!



La papirusa boato Ra-II de Thor Heyerdahl. Zentralbild/Tass

Sensacio!
vokis la radioamatoroj sur la mallongaj ondoj, ĉar kelkaj el ili povis esti kvazaŭ kunŝipanoj pere de siaj radioamatoraj aparatoj . . .
Sensacio!
estis la fakto, ke la norvega esploristo kaj mondvojaĝanto Thor Heyerdahl estis surmare sur sia sunboato „Ra-II", 6 100 (ses mil cent!!!) kilometrojn de Afriko ĝis Ameriko . . .

Sensacio!
kriis la vendistoj de ĵurnaloj sur la stratoj en ĉiuj grandurboj de la tuta mondo . . .

Sensacioj!
skribis la gazetoj en la tuta mondo kaj montris fotografaĵojn de la papirusboato „Ra-II" kaj de la kuraĝegaj kaj entreprenemaj 8 internaciaj esploristoj.
El kiuj landoj venis en 1970 tiuj viroj?

- Thor Heyerdahl
  el Norvegujo
- Georges Sourial
  el Egiptujo
- Carlo Mauzi
  el Italujo
- Kei Ohara
  el Japanujo
- Adani Aip Othmani
  el Maroko
- Santiago Genoves
  el Meksikio
- Jurij Šenkoviĉ
  el Sovet-Unio
- Norman Baker
  el Usono

Ok nacioj, ok nesimilaj karakteroj, sed tamen regis preskaŭ ĉiam bona interkompreno. Kion skribis s-ro Heyerdahl pri tiu temo?
„Se usonano kaj ano el Sovet-Unio ne ofte povas bone ekkoni unu la alian, nun konatiĝis du homoj ĝisfunde!
Se estus araboj kaj judoj vere naturaj malamikoj, unu el la du viroj estus malaperinta en la atlantikaj ondoj!"
Internaciaj estis ankaŭ la laboristoj ĉe la konstruado de la dua sunboato, „Ra-II", kiun konstruis kvar Aymara-indiĝenoj el Bolivio: Demetrio, Jose, Juan kaj Paŭlo el vilaĝo ĉe la Titikaka-lago, kaj marokanaj laboristoj helpis.
La papirusboato estis 12 m longa, 5 m larĝa, 2 m alta kaj helpe de l'konstanta akvofluo en la Atlantiko kaj ĉe bona vento faris la sunboato 110, 130 kaj 150 km je tago. Ĝi estis tiel bone konstruita, ke neniu papiruso estis disrompita. Dum 57 tagoj (!!) estis „Ra-II" survoje trans la Atlantiko, de la haveno Safi en Maroko ĝis Barbados en la Okcidenta Hindio.

[Interligilo 2–3/1972]

---

profitojn sur la sango kaj la mizero de la popoloj.
Krome, ĉiu bone informita homo scias ke la socialismaj registaroj ekde sia naskiĝo konstante faris tre konkretajn proponojn pri solvo de la konfliktoj, paca kunvivado kaj malarmado. Oni ne povas diri ke ili renkontis grandan entuziasmon ĉe la kapitalismaj ŝtatoj. Oni do balau antaŭ sia propra pordo antaŭ ol serĉi polveron ĉe la najbaro. Feliĉe la Mondo evoluas, kaj notinde en Eŭropo tiu politiko komencas porti fruktojn. Same en Hindoĉinio la saĝa politiko de la socialismaj ŝtatoj, kune kun la kreskinta ondego da protestoj tra la tuta Mondo finfine devigis la usonan imperiismon forlasi siajn pretendojn: Provu imagi kio estus okazinta se en la Kremlo troviĝus la samaj militemuloj kiel en la Blanka Domo!
Ni do devas konstati kaj diri ke la socialismaj landoj, notinde Sovetunio, kune kun la progresiemaj fortoj en la tuta Mondo, estas forta baraĵo kontraŭ la frenezaj intrigoj kaj agresoj de la imperiismo. Neniam estis pli vera ol nun la aserto de Jean Jaurès (Ĵan Ĵores'): „Kapitalismo portas en si militon kiel nubo fulmotondron." La tuta homaro havas intereson en la unueco de tiu-ĉi fronto kaj sekve en la malvenko de ĉiuj konfuzigaj entreprenoj.

W. Gilbert

UNESCO – statistiko pri la lerneja klerigado.

El ĉiuj sur la terglobo vivantoj, kiujn oni taksas je 3,6 miliardoj da homoj, posedas laŭ statistikaj indikoj de l'UNESCO 650 milionoj lernejan klerecon.
1970 ekzistis en la mondo 780 milionoj da analfabetoj, inter ili 500 milionoj en la iamaj subjugitaj koloniaj landoj en Azio. Tiu nombro konformas al triono de ĉiuj sur la tero vivantaj plenaĝuloj. La procentaĵo de la analfabetoj kreskas nur malmulte, kompare al la pojare pligrandiĝanta tutmonda popolamaso.



Zentralbild

Bertolt Brecht 75 jaroj

Niajn bildigojn de la homa kunvivado ni prezentas por la ĉeriveraj kamparanoj, fruktokultivistoj, veturilkonstruistoj kaj sociaj revoluciuloj, kiujn ni invitas en niajn teatrojn kaj kiujn ni petas ne forgesi ĉe ni siajn gajajn interesojn. Tiamaniere ni volas transdoni la mondon al iliaj cerboj kaj koroj, por ke ili ŝanĝu ĝin laŭ sia bontrovo. La produktantoj estas la veraj infanoj de la scienca erao, kaj ĝia teatro ne povas ekmoviĝi, se ili ne movas ĝin.

Bertolt Brecht

Gerhard Rietdorff, elektristo en la Berlina Ensemblo

„Li estis tute simpla homo..."

Precipe dum la lastaj monatoj mi ekŝatis Brecht. Li estis tute simpla kaj modesta homo. Se oni renkontis lin en la korto, neniam, eĉ se li enprofundiĝis en interparolado, li estis tiom fora, ke li pretervidus laboriston. Ĉiun purigistinon li salutis jam en distanco de dudek metroj. Tion la laboristoj rapide rimarkis.

Mi ne scias, ĉu jeno estas grava: Kiam ni foje havis malbonan kritikon, Brecht parolis pri la gazetaro kaj diris: „Al mi estas tute egale, kion ili skribas pri mi, ke mi eble havas tro multe da kostumoj aŭ nur unu."

Se mi ne estis okupita sur la scenejo, mi eksidis en la spektantejo proksime de li kaj provis aŭdi, kion oni parolis ĉe la reĝisora pupitro. Kiam okazis miskomprenoj de teknika speco, mi kelkfoje eligis nevole iun rimarkigon. Tiam Brecht tuj turnis sin kaj demandis: „Kion vi celas? Diru do, kion vi pensas." Li estis akceptema al ĉiu objeto.

Dum diskuto pri la tekniko de teatraĵo iu demandis, ĉu ni denove ludos kun duona kurteno, kaj Brecht volis scii, ĉu tio gravas. La kolego respondis: „En teknika rilato memkompreneble", kaj al la demando de Brecht, ĉu estas pli malfacile aŭ pli simple, li respondis: „Por ni lumigistoj estas ege pli malfacile." Brecht tuj diris, ke tiuokaze oni povas konsideri la aferon, kaj ni ludis kun alta kurteno. Mi miris, ĉar mi ĉiam aŭdis, ke Brecht estas obstinulo.

1898	Naskiĝo de Bertolt (propre Berthold Eugen Friedrich) Brecht la 10-an de Februaro en Aŭgsburg.
1917	Abiturienta ekzameno, studado de medicino kaj natursciencoj en Munkeno.
1918	Flegisto en Aŭgsburg-a lazareto, dum la novembra revolucio membro de la Aŭgsburg-a soldata konsilantaro.
1919	Daŭrigo de la studado en Munkeno, kunlaboranto en la teatro de Karl Valentin, konatiĝo kun Frank Wedekind.
1922	Premiero de „Tamburado dum la nokto", distingo per la Kleist-premio.
1923	Dramaturgo en la „Kammerspiele" (Ĉambroludejo) en Munkeno.
1924	Engaĝo kiel dramaturgo de la „Deutsches Theater" (Germana Teatro) en Berlino sub Max Reinhardt.
1926/27	Komenco de la studado pri dialektika materialismo, frekvento de la Marksisma Laborista Lernejo (Germ. mallong. MASCH) en Berlino, kunlaborado kun Erwin Piscator, eldono de la unua poemaro „Die Hauspostille" (La edifa hejmlibro).
1928	Edziĝo al la aktorino Helene Weigel, premiero de la „Trigroŝa Opero", unua demonstro de la eposa stilo.
1929/31	Unuaj instruaj teatraĵoj, „Sankta Johana de la buĉejoj".
1932	Premiero de „La patrino" laŭ romano de Gorki, lasta verko ludita en Germanio antaŭ la potencuzurpo fare de la faŝistoj.
1933	Elmigrado tra Aŭstrio, Svisio, Francio al Danlando.
1935	Partopreno en la Internacia Verkista Kongreso por la defendo de la kulturo en Parizo, forpreno de la germana ŝtataneco fare de la nazia registaro.
1940/41	„Vivo de Galilei", „La bona homo de Sezuan", „Sinjoro Puntilla kaj lia servisto Matti", „La stopema kariero de Arturo Ui", tra Svedio, Finnlando kaj Sovetunio al Usono.
1942/45	„La vizioj de Simone Machard", „Ŝvejk en la dua mondmilito", „La kaŭkaza kretocirklo".
1947	Pridemandado fare de la „Komitato por la kontraŭbatalo al neamerika konduto", reveno al Eŭropo, unue Svision.
1948	Transloĝiĝo al Germanio, en la demokratian sektoron de Berlino, la hodiaŭan ĉefurbon de GDR.
1949	Fondo de la „Berlina Ensemblo", kune kun Helene Weigel. Unua enscenigo: „Patrino Kuraĝo kaj ŝiaj infanoj."
1951	Honorigo per la Nacia Premio de I-a klaso, nefermita letero al la Mondpaca Konsilantaro por kontraŭbatalo al plia milito.
1954	Distingo per la Internacia Lenin-Pacpremio.
1956	Mortinta la 14-an de aŭgusto, entombigo en la „Dorotheenstädtischen Friedhof" (tombejo de Dorotheenstadt) en Berlino. En lia loĝejo nun troviĝas la Bertolt-Brecht-arkivo. [El „DDR-Revue" trad. Dr. Karl Schulze]

Gisela May, artistino

La plezuro de la pensado

Brecht estas dramisto, kiu genie perceptis kaj valide formis la sociajn koneksojn kaj problemojn de la nuntempo. Mi sentas min speciale allogita al lia drama verkaro, ĉar mi vidas la ĉeftaskon de la aktoro en tio: de sur la scenejo havigi al la spektantoj ekkonojn pri la ĉirkaŭanta mondo, partoprenigi en la artaĵo samvalore iliajn prudenton kaj senton, kiel Brecht postulis, kaj peri al ili la plezuron de la pensado, de la plupensado.

Al la apartaĵoj de la poezio de Brecht apartenas, ke laŭ unika maniero li inkluzivis la kanzonon kaj la kanton en la dramoj, kaj ofte, skribante siajn poemojn, li dekomence konsideris la postan komponadon de melodioj por ili. Estante juna artisto, li mem komponis la muzikon por parton de siaj kantoj kaj prezentis ilin, akompanante sin per la gitaro. Ne estis hazardo, ke komponistoj kiel Kurt Weill, Hanns Eisler kaj Paul Dessau okupis sin pri liaj tekstoj. Kune kun Brecht ili kreis kanzonojn de nekomparebla grandeco, kiuj ege populariĝis en la tuta mondo kaj certe estas nepasemaj.

Georg Maurer, poeto

La homama sento ne mortas inter la homoj

La artista konscio, jam internaciiĝinta, kiu portas la nomon Brecht, batas plu – per precizaj, kvietaj batoj. La korpa koro de Brecht ne plu batas, ĝi estas rompita. Kial la cerbo ne volis akcepti ĉi tiun informon, kial la vortoj ripete diritaj tra la telefono „Brecht estas mortinta", restis en la orela konko ne trovante eniron, tio iom poste klariĝis al mi: la homamanto ne mortas inter la homoj, ĉar ili bezonas lin kaj tial ne lasas lin morti. Eĉ liaj plej amaraj vortoj estas ankoraŭ sunradioj, kiujn la vivantoj bezonas por vivi. La homamo de Brecht esprimiĝis ankaŭ jene: Poeto ankoraŭ juna kaj mi estis petintaj lin pri la permeso viziti lin. Li invitis nin al si je iomete antaŭ la oka, antaŭ ol oni ŝlosus la dompordon. Ni rapidis por esti akurataj. Ni ege miris vidi Brecht antaŭ la dompordo. Li surprenis la malkomfortaĵon atendi nin, por la kazo ke ni eble malfruiĝus. Li volis teni la pordon malfermita por ni. Tial ankaŭ ni volas ĉiam teni la pordon de nia spirito malfermita por Brecht.

(Vortoj de la poeto Georg Maurer, lirikisto, 1907–1971, okaze de la morto de Bertolt Brecht)

El la „Trigroŝa Opero"

Per kio vivas hom'?

I.

Mac:

Fieras vi, sinjoroj, pri la kono
de viv' sen peko kaj sen malbonfar':
Por ni unue gravas manĝo-dono
kaj poste eblas nur moraldeklar'.
Vi ŝatas vian ventron, nian bravon,
sed ĉiam prenu tion do real':
Nek truk' nek tromp' havigas al vi savon,
nur post la manĝo venas la moral'.
Unue do necesas doni panon
sufiĉan al povruloj en la manon.

Voĉo de malantaŭ la scenejo:

Per kio vivas hom'?

Mac:

Per kio vivas hom'? Nur per prirabo
de l'homo, per torturo kaj opreso.[1]
Per tio nur, ke li en sia kapo,
ke homo li, dronigas en forgeso.

Ĥoro:

Sinjoroj, do ne trompu vin l'imag':
La homo vivas nur per krima ag'.

II.

Jenny:

Vi nin instruas, kiam la sindono
de la virin' ne estas peka far'.
Por ni unue gravas manĝo-dono
kaj poste eblas nur moraldeklar'.
Vi diras, ke la honto havas gravon,
sed ĉiam prenu tion do real':
Nek truk' nek tromp' havigas al vi savon,
nur post la manĝo venas la moral'.
Unue do necesas doni panon
sufiĉan al povruloj en la manon.

Voĉo de malantaŭ la scenejo:

Per kio vivas hom'?

Jenny:

Per kio vivas hom'? Nur per prirabo
de l'homo, per torturo kaj opreso.
Per tio nur, ke li en sia kapo,
ke homo li, dronigas en forgeso.

Ĥoro:

Sinjoroj, do ne trompu vin l'imag':
La homo vivas nur per krima ag'.

[1]) opresi: tirane premegi (PIV)

La kanto pri la nesufiĉo de la homa strebado

I.

Hom' vivas per la kap',
la kapo ne sufiĉas.
Do provu nur, per via kap'
pedik' nur kontentiĝas.
Ĉar sufiĉe ruzas
homo ne en ĉi epok'.
Ĉiam lin konfuzas
trompo kaj mensog'.

II.

Hoj, faru planon nur
kaj estu granda lum',
kaj plian planon faru nur:
Ja vanas la cerbum'.
Ĉar sufiĉe mavas[1])
homo ne en ĉi epok'.
Sed nin ĉiam ravas
streb' al alta lok'.

III.

Nu, kuru post feliĉ',
sed trou ne la kur'.
Ĉar ĉiuj kuras post feliĉ':
feliĉ' postkuras nur.
Sufiĉe ja modestas
homo ne en ĉi epok'.
Tial strebo estas
nur memtrompa mok'.

IV.

Ne bona estas hom'.
Surkape batu lin.
Ĉar eblas, ke per batodon'
vi plibonigas lin.
Ĉar sufiĉe bonas
homo ne en ĉi epok'.
Tial vi admonas
lin per batoŝok'.

[1]) sordida – malpura (PIV)

Sceno el „Trigroŝa opero" de B. Brecht/K. Weill Zentralbild



Árpád Rátkai

MARX, LA INTERNACIA LABORIST-ASOCIO KAJ LA LINGVA PROBLEMO

En la ĉeĥoslovaka eldono de „Paco", N-ro 9–10, 1970, aperis artikolo de I. IVANOV (USSR), kiu pritraktas la en la titolo menciitan problemon: „Detaloj pri la lingvaj rezolucioj de la I-a kaj II-a kongresoj de la I-a Internacio." Pro la graveco de la temo ni citas laŭvorte liajn finajn konkludojn:
„1. La rezolucioj pri Universala Lingvo estis frukto de penadoj de la Prudonistoj.
2. Ili estis akceptitaj kontraŭ la intencoj de K. Marx (Marks). La konsekvencoj evoluis rapide. Post la Brusela Kongreso (1868), la ĝenerala Konsilio komisiis K. Marx kompili broŝuron kun la plej gravaj rezolucioj de la kongresoj. La broŝuro aperis en 1869 (The international working men's association) Resolutions of the Congress of Geneva 1866 and the Congress of Brussels 1868. (London 1868.); ĝi ne entenis rezolucion pri Universala Lingvo. Dum la Haga kongreso (1869), Guillaume (Gijom') kaj kelkaj aliaj personoj estis eksigitaj el la Internacio kiel Prudonistoj. Tiuj faktoj firmigas la du ĉi-suprajn konkludojn."
Merito de la Centra Redakcio estas la aperigo de la artikolo, ja ni forte sentas la mankon de la esploroj pri la loko kaj rolo de la Internacia Lingvo el ideologiateoria vidpunkto[12]) (ne temas nun pri la E-popularigaj verkoj, artikoloj). La artikolo de IVANOV eĉ ankaŭ nun, post plurdekjara evoluo de la vivanta Internacia Lingvo, estas preskaŭ unika, ĉar antaŭ li nur lia samlandano Ernest DREZEN (1892–1938) faris similan analizan laboron. Sed ŝajne la pretendoj de la „entuziasmaj verdstelanoj", kiuj atendas de ĉiuj politikistoj – iamaj kaj nunaj – kaj ideologoj „pozitivan sintenon" al la „sankta ideo", iom influis la aŭtoron.
Mi opinias, ke la artikolon ni devas akcepti kiel diskutoriginon, kiu precipe en la socialismaj landoj kaj inter la laboristaj esperantistoj en aliaj landoj devus veki reagon, ja temas pri la bazo de la rilatoj inter la revolucia laboristmovado kaj la internacilingva movado. Ni provu serĉi la unuajn rilatojn inter la lingvaj problemoj kaj la internacia laboristmovado, ekzamenante la artikolon de IVANOV.

La utopiaj socialistoj kaj Marx

Inter aliaj ankaŭ la teoriistoj de la utopia socialismo kreis universallingvan planon, aŭ emfazis la utilon aŭ neceson de ĝia kreo: Thomas MORE (Tomas Mor') (1516), Denis VAIRRASSE D'ALLAIS (Deni Veras Dale') (1667), Francois-Marie-Charles FOURIER (Fransŭa Mari Ŝarl Furje') (1843) kaj Etienne CABET (Etjen Kabe') (1842). DREZEN[1]) pritraktas ĉi tiujn planlingvistojn, sed ne distingas la esprimon „internacia lingvo" kaj la ceterajn. Fakte temis nur pri „racia lingvo" aŭ universala lingvo.
La junaj Karl MARX (1818–1883) kaj Friedrich ENGELS (1820–1895) – kvankam ili trastudis la tutan verkaron de la utopiistoj – ne reflektis ĉitiujn provojn, nek ili mem okupis sin pri la problemo. Ili direktis sian atenton al la sociaj kaj ekonomiaj instruoj de ĉi tiuj teoriistoj. Kaj inter ĉi tiuj nur akcesoraĵoj, epizodaĵoj estis la lingvistikaj planoj, imagoj, rimarkoj.
Anstataŭ fari, plani racian aŭ universalan lingvon, ili studis la evoluon de la vivantaj naciaj lingvoj, konstatis rilatojn inter la lingvoevoluo kaj la ekonomia kaj politika integrado, asertis ke siavice nepre devos veni lingvo nenatura, „artefarita" kvankam ĉi tiun aserton ili ankoraŭ ne uzis, eĉ ankaŭ la naciaj lingvoj jam estas parte tiaj. Kaj ĉion ĉi jam en 1845–46, en ilia komuna verko „La german ideologio":
„La natura kreskiteco de lingvo cetere estas nuligita en ĉiu alia plenevoluinta lingvo, parte pro la historio de la lingva evoluo el ekzistanta materialo kiel ĉe la romanaj kaj ĝermanaj lingvoj, parte pro la interkruciĝo kaj intermiksiĝo de nacioj kiel ĉe la angla, parte pro koncentriĝo de dialektoj en nacio, baziĝante je ekonomia kaj politika koncentriĝo.
Ke la individuoj siavice prenos ankaŭ tiun produkton de sia speco sub sia kontrolo, kompreniĝas per si mem."[2])

La etburĝaj socialistoj kaj la Universala Lingvo

En la 50-aj jaroj de la pasinta jarcento jam la etburĝaj socialismaj tendencoj regis en la rapide kreskanta laboristmovado, kaj inter ili la plej karakteriza kaj forta estis prudonismo. Ŝajne ili akceptis, kiel celon., la formadon de nova, socialisma sociordo, do, siamaniere ili konfrontiĝis al kapitalismo, direktis la atenton de la laboristaro al socialismo, kiel justa, senigita de la antinomioj kapitalismaj sociordo, anstataŭiginda kapitalismon.
Sed iliaj ekonomiaj kaj politikaj postuloj ne trapaŝis la kadrojn de kapitalismo, iliaj batalrimedoj ne taŭgis por ĉesigi la regadon de la burĝaro. Ilia babilaĉo pri socialismo fakte kaŝis ilian revon: ne proletiĝi, resti etburĝo kaj krei iel socion, regantan de la tutegalaj etburĝoj. Konklude ili detiris la laboristan klason de la konsekvenca klasbatalo, do fariĝis reakcia. Sekve la evoluanta laboristmovado devis ilin flankenpuŝi. Tio okazis kaj esence ankaŭ finiĝis en la 60-aj jaroj.
Malgraŭ ilia ĉefa trajto la prudonismaj instruoj kaj movado entenis ankaŭ efektivigeblajn, utilajn erojn ankaŭ por la revolucia laboristmovado, kiu transprenis la tiajn (ekz. la utiligon de la kooperadoj). Krome tute ne temis, ke la prudonistaro estis ia unueca reakciula amaso.
Kun iliaj nebulaj imagoj pri socialismo ili deziris ankaŭ la unuiĝon de la homaro. Laŭ la kutima etburĝa sinteno deziris efektivigi siajn imagojn tuj – aŭ rezignis pri ili. Kelkaj eĉ ne konsideris

la lingvan problemon pro sia hastemo, sed pli multaj opiniis ke antaŭe oni devus krei universalan lingvon, kiu forpuŝus, anstataŭus la naciajn.
Tute ne temis, do, pri internacia lingvo, kiu apud la ankoraŭ ekzistantaj naciaj estus la ilo de la internacia komunikiĝado ankoraŭ longe, ja ili ankaŭ la naciojn deziris tuj „aboli". Kiel etburĝa ideologio, kaj tendenco en la laboristmovado, ili neniam povis akcepti ke la unueca, sennacieca homaro, la universala, tute kontrolata lingvo, same kiel komunismo ne estas efektivigebla dum kelkaj jaroj laŭ la decidoj de organizoj aŭ personoj. Ili ne povis akcepti, ke eĉ jarcentoj devos pasi ĝis ili finformiĝos, rezulte de longa, nefacila evoluprocedo, tra multe da provizoraj misevoluoj, stagnadoj eble longaj – malgraŭ la intencoj de la uloj aŭ grupoj.
Sed la fina rezulto ne estas dubebla. Iam ankaŭ la lingvo estos tute sub la kontrolo de la homaro, tiam jam kiel universala. Universala, kiam la dispartiĝinta, subevoluinta socio de la pasinta jarcento, eĉ la nuna ankoraŭ ne povas prilabori, akcepti, eĉ ne bezonas.[3])

Marx kaj Proudhon

En la 50-aj kaj 60-aj jaroj la projektoj kaj proponoj pri la universala lingvo plimultiĝis – nur la socio ne deziris universaliĝi, eĉ akriĝis la naciaj kaj klasaj bataloj.
La laborista klaso komencis organiziĝi internaciskale. En la Internacia Laboristasocio (1864–1876) la scienca socialismo batalis kontraŭ la etburĝaj socialismaj tendencoj. Plej aktive la prudonistoj klopodis akceptigi siajn ideojn, eĉ komence ili estis majoritataj. En la jaroj 1864–68 la Ĉefkonsilio – gvidate de MARX – cirkonspektege, kongreson post kongreso luktis por la disvastiĝo de la teorioj de scienca, socialismo kontraŭ la ceteraj, ĉefe kontraŭ la prudonismaj.
En ĉi tiu situacio MARX trastudis la tutan verkaron de Pierre Joseph PROUDHON (Prudon) (1809–1865), kaj kritike analizis tion. Nur dum ĉi tiu laboro li priatentis la interlingvistikan studon de PROUDHON[4]). Ĝi estis ne politika, akcesora studo, kiu aperis ankoraŭ antaŭ liaj politikaj verkoj. MARX tamen atente studis ĝin, kaj en sia letero/artikolo, verkita okaze de la morto de PROUDHON, je la peto de Johann Baptist von SCHWEITZER (Ŝuajtzer), la eldonisto kaj ĉefredaktoro de „Sozialdemokrat", donas ĝian koncizan, trafan recenzon:
„Lia laboro de lernanto pri la ‚Langue universelle' montras, kiel senceremonie li kuraĝas sin ĵeti al la problemoj, por kies solvo mankis al li la pranocioj."[5])
Ke MARX ĉi tiel, „senceremonie", rifuzis sensciencan studon, estis tre favore al kontribuo por plua analizo de la lingva problemo, kaj ne hodiaŭa malavantaĝo, kiun ni devus kaŝi, kiel kelkaj opinias. Eĉ ĝi estas modelo: kiel ni devas pritrakti personojn, kiuj deziras „evoluigi" nian lingvon, „organizi" nian movadon, „kontribui" al nia literaturo – antaŭ ol lia „laboro" efikas.

Marx kaj la prasennaciistoj

La batalo kontraŭ prudonismo daŭris ankaŭ en la Ĉefkonsilio. Dum la kunsido de la 19-a de junio 1866 oni diskutis pri la „nacieca demando". MARX en sia letero al ENGELS jene interpretas la esencon de la diskuto:
„. . . la deputitoj de ‚juna Francio' (ne laboristoj) elpaŝis kun tio, ke ĉia nacieco kaj ankaŭ la nacioj mem ‚arkaikaj antaŭjuĝoj' estas. . . . Ĉion oni ensolvu en malgrandajn ‚grupojn' aŭ ‚komunumojn', kiuj denove ‚unuiĝon' (‚Verein') formas, sed ne ŝtaton. Kaj ĉi tiu ‚individuigo' de la homaro kaj la konforma ‚mutualismo' (reciproka interhelpo) okazas tiel, ke la historio en ĉiuj aliaj landoj devas ĉesi kaj la tutmondo devas atendi, ĝis la francoj maturiĝos por fari socian revolucion. Baldaŭ tiam ili plenumados antaŭ ni ĉi tiun eksperimenton, kaj la pluaj partoj de la mondo, obsedite de la forto de ilia ekzemplo, faros la saman. Akurate, kiel Fourier pretendis de sia modelfalanstero. Cetere tiuj, kiuj la ‚socian' demandon parigas kun la ‚superstiĉoj' de la malnova mondo, estas senescepte reakciuloj.
La angloj ridegis, kiam mi komencis mian paroladon per tio, ke nia amiko Lafargue kaj la aliaj, kiuj abolis la naciecojn, ‚france', do en tiu lingvo komunikiĝis al ni, kiun la $^9/_{10}$ de la aŭskultantaro ne komprenis. Plue mi celumis, ke Lafargue, ne konsciante ĉi tiun, la negacion de la naciecoj, ŝajnas, li komprenas, ke la franca modelnacio englutos ilin."[6])
Ni povas vidi kiel vere fantaziaj, nebulaj, sensciencaj teorioj intermiksiĝis kun la lingva demando. Jen la prauloj de la sennaciistoj – sen internacia lingvo!
Sed ni povas rimarki ankaŭ tion, ke MARX ne povis imagi la kunfandiĝon de la nacioj, la malaperon de la nacioj per „universaligo" de nacia lingvo.

La Ĝeneva Kongreso (1866)

Post du monatoj de la menciita diskuto en la Ĉefkonsilio okazis la Unua Kongreso de la Internacio (3–8 SEP 1866), la unua vere granda batalo kun la prudonistoj. En la fino de aŭgusto MARX verkis la „Instrukcioj por la delegitoj de la Provizora Centra Komitato. Diversaj demandoj."[7]), kiu entenis naŭ demandojn. IVANOV preskaŭ riproĉas lin, ke en ĝi estis nenia mencio pri universala lingvo. Envere tute ne konvenis en ĝila mencio pri iu ajn lingva problemo. MARX skizis la starpunkton planatan pri la ĉefaj politikaj demandoj. Li celis la ĉefan baton kontraŭ la prudonistoj, kiuj tiutempe damaĝegis la francan laboristmovadon.
La prudonistoj dum la kongreso elpaŝis kun tute reakcia, etburĝa programo. Kiel MARX resumas:
„Ili malrespektas . . . ĉian koncentrigitan socian movadon, do la tian, kiu ankaŭ per politikaj rimedoj (kiel ekz. per la leĝa malaltigo de la labortempo) povas atingi rezulton; kun la pretekso de la libereco, kaj la kontraŭregistareco aŭ kontraŭaŭtoritata individuismo – ĉi tiuj sinjoroj, kiuj ekde 16 jaroj silente toleris kaj toleras la plej mizeran tiranecon! – efektive la plej vulgaran burĝan mastrumadon predikas, nur ĵus en formo idealigita far Proudhon."[8])
Kaj la kongreso post akra diskuto akceptis la rezoluciojn, proponitajn de MARX. Dum la kongresaj diskutoj evidentiĝis, ke inter la prudonistoj maldekstra alo komenciĝas formiĝi, kiu tendencas al la vojo de la revolucia amasbatalo.
IVANOV citas el la raporto de J. CARD (Kard)[9]), laŭ kiu la demando pri universala lingvo aperis konekse kun memuaro de M. LENEVEUX (Lënëvë') pri simpligo de la ortografio de l'franca lingvo (!), kaj la kongreso decidis jene:
„La kongreso simpatias al tiuj societoj kaj al apartaj homoj, kiuj laboras je simpligo de l'franca ortografio por faciligi ĝian lernadon al tiuj homoj, kiuj ne posedas tempon sufiĉan por lernado, kaj ĝi aprobas tiujn homojn, kiuj penas verki Universalan Lingvon por firmigi la integradon de homoj de diversaj nacioj kaj fari ilin plej fruktodonaj por la feliĉo de la homoj."
Ni scias, ke MARX ne intencis meti en la tagordon ĉi tian demandon. Sed tio ne signifas, ke la rezolucio estis akceptita kontraŭ la intencoj de MARX – kiel konkludas IVANOV – aŭ laŭ ili. Ja MARX tute ne ĉeestis la kongreson. Sed ni certe povas konkludi, ke ne nur la prudonistoj apogis la rezolucion, sed multaj aliaj; aliokaze ĝi estus rifuzita. Aliflanke ni nepre devas aldoni, ke oni povas pravigi nur tiujn, kiuj restis minoritataj, kiuj kontraŭvoĉdonis. Internacia organizo tute ne estas kompetenta forumo por decidi pri la franca ortografio. Des pli ne internacia politika organizo. Kaj la aldono de nebula, senscienca ideo por krei universalan lingvon, neniel plibonigis la aferon. Kaj politike, kaj lingvistike domaĝa estis la akcepto de la rezolucio. Ĝi estis la venko de etburĝa influo, sed ne la fina venko.

La Lausanna (Lozana) Kongreso (1867)

Nun jam ĉirkaŭ la preparoj de la Lauzanna Kongreso (2–8 SEP 1867) akriĝe-

gis la batalo. La Ĉefkonsilio je la 23-a de aŭgusto 1867 decidis, ke projekton de la rezolucioj por la kongreso rajtas prepari nur la Ĉefkonsilio. MARX atentigis, ke la prudonistoj verŝajne provos igi la kongreson fariĝi diskutklubo, por dissplitigi la atenton de la deputitoj, por forrabi ilian tempon. Tial ili enmetis en la tagordon nur la du ĵusajn, ĉefajn demandojn de la tiama laboristmovado: 1. Kiaj politikaj rimedoj necesas, por ke la Internacio fariĝu la centro de la batalo por la liberigo de la proletaro? 2. Kiel decidi pri la demando de la laboristkredito?
MARX la 20-an de aŭgusto 1867 subskribis la raporton laŭtlegotan dum la kongreso, pri la agado de la Ĉefkonsilio en la jaroj 1866–1867. IVANOV mencias, ke nek en la tagordo, nek en la raporto troveblas kulturaj demandoj, nome la problemo de la universala lingvo. Rigardante la cirkonstancaron pli ĝuste estas diri, ke kompreneble ili entenas nenian mencion pri tiaj demandoj.
Sed la konjektoj de MARX efektiviĝis. La francaj kaj svisaj prudonistoj sukcesis akceptigi en la tagordon akcesorajn demandojn, problemerojn krom la planitaj du punktoj. Unu el iliaj sukcesoj estis, ke la bakuninista James GUILLAUME, svisa instruisto povis raporti pri la malfacilaĵoj de la franca ortografio (denove!). (Eblas ankaŭ tio, ke la tuta afero estis nur taktiko por akiri la voĉdonojn de kelkaj bakuninistoj.)
Kaj la kongreso devis pridiskuti la „fonografion" de GUILLAUME, eĉ kreis komisionon por prepardo de fina rezolucio. Sed la deputito Alfred A. WALTON (Ŭolton), prezidanto de la angla Nacia Reformasocio – tre progresema, kvankam ne marksisma organizaĵo –, proponis kompletigi la rezolucion per la vortoj „universala lingvo". La kongreso principe aprobis la ideojn de GUILLAUME, kaj la koncerna frazo de la rezolucio tekstas jene: „La Kongreso konsideras, ke universala lingvo kaj la reformo de ortografio estus bona afero por ĉiuj kaj forte kontribuus al la unueco de la popoloj kaj al la frateco inter la nacioj."[10])
Mi ne povis atingi la originalan francan tekston de la rezolucio, tial mi devas mencii ke Ernesto DREZEN tradukis ĝin iom malsame – el alia fonto: „La kongreso opinias, ke universala lingvo kaj reformo de ortografio estus komuna bonfaro kaj treege akcelus la unuiĝon kaj fratecon de la popoloj."[11])
Ĉu tiel, ĉu tiel ĉi, ankaŭ tiun ĉi rezolucion ni nur tiel povas apreci, kiel la antaŭan.

La Brusela Kongreso (1868)

La Brusela Kongreso (8–13 SEP 1868) jam rezolucie konstatis la malfortiĝon de la dekstra alo de la prudonistoj, kiu fakto respegulis la maldekstriĝon de la amasoj en Francio. Jam ne eblis enmeti en la tagordon sensciencajn, nebulajn imagojn de etburĝoj pri la universala lingvo kaj demandojn, kiuj ne koncernis la Asocion.
Post la kongreso, la 3-an de novembro, la Ĉefkonsilio komisiis MARX por kompili la anglan tradukon de la plej gravaj rezolucioj de la kongresoj ĝeneva kaj brusela. La broŝuro aperis (vidu la citon el la artikolo de IVANOV), sed ĝi ne entenis la rezolucion pri la universala lingvo – diras IVANOV. Kial ĝi entenus ĝin? – ni demandas.

La Haga Kongreso (1872)

La Haga Kongreso – kiu okazis nur en 1872, ne en 1869, kiel IVANOV diras – envere eksigis James GUILLAUME (1844–1916), kiu estis bakuninisto, ne prudonisto, kaj ne pro lia iama „fonografia" raporto eksigis lin, sed pro lia la Asocion diseriga agado, tute politika. Kaj li cetere dum la unua mondmilito fariĝis socialŝovinisto.
Kaj la prudonistoj? Ili jam sekve de la bruselaj teoriaj rezolucioj disiĝis. La maldekstra alo, la t.n. „kolektivaj prudonistoj", kiuj akceptis la ideon ŝanĝi la produktrimedojn al kolektiva proprieto, ankoraŭ grave rolis en la franca laboristmovado; kaj dum la Pariza Komuno, kaj poste. Paul LAFARGUE, la iama „prasennaciulo", kun Jules GUESDE (Ged) en 1879 fondis la marksisman Francan Laboristpartion, kaj fariĝis unu el la plej talentaj marksistoj.
Dume la dekstraj, la t.n. „ortodoksaj prudonistoj", la ĝisostaj etburĝoj tute malaperis el la politika sceno, kaj iliaj ortografiaj kaj universallingvaj klopodoj forgesiĝis.

Konkludoj

1. MARX (kun ENGELS) – konstatis, ke la lingva evoluo baziĝas sur la integrado ekonomia kaj politika
– (kun ENGELS) asertis, ke siavice devos veni ia „artefarita" lingvo, tute kontrolata de la homaro
– opiniis, ke nacia lingvo ne taŭgas por la tuta homaro

2. Dum la Unua Internacio (1864–1876) la etburĝaj socialistoj, ĉefe la prudonistoj kunligis siajn sensciencajn, reakciajn teoriojn pri la socio kun la fantazia, senscienca ideo de la universala lingvo. Kun la likvido de la etburĝaj tendencoj ankaŭ la ideo de la universala lingvo malaperis el la laborista movado.

3. Ni povas konkludi ankaŭ tion, ke la ĉi suprajn ni povas uzi ankaŭ en nia propagando, precipe inter komunistoj.

Árpád Rátkai

1) *Ernesto DREZEN:* Historio de la mondlingvo. Tri jarcentoj tra serĉado. EKRELO, Leipzig 1931 (Fotorepreso: Pirato, Oosaka 1967), p. 96.

2) *Karl MARX – Friedrich ENGELS:* Die deutsche Ideologie. Bücherei des Marxismus-Leninismus, Bd. 29. Dietz, Berlin 1960, p. 448. (Esperante citas Detlev BLANKE, Paco, 1971, no. 4, p. 34.) Hungare: *Karl MARX és Friedrich ENGELS* müvei 3. köt. 1845–1846, Kossuth, Budapest 1960, p. 419–420.

3) Pri la temo el lingvistika vidpunkto hungare: *Mario PEI:* Szabálytalan nyelvtörténet. Gondolat, Budapest 1966, p. 385–407. Angle: *Mario PEI:* The Story of Language, Revised Edition, J. B. Lippincott, Philadelphia and New York 1965.

4) *Pierre-Joseph PROUDHON:* Essai de grammaire générale. (Aperis en la libro *Nicolas-Sylvestre BERGIER:* Les éléments primitifs des langues. Besancon 1837.)

5) Hungare: *Karl MARX és Friedrich ENGELS* müvei 16. köt. 1864–1870. Kossuth, Budapest 1964, p. 22. (En la letero al SCHWEITZER, London, la 24-an de januaro 1865.)

6) Hungare: *MARX – ENGELS:* Válogatott levelek. 1843–1895. Szikra, Budapest 1950, p. 206–207. (MARX al ENGELS, la 20-an de junio 1866.)

7) Hungare: *Karl MARX és Friedrich ENGELS* müvei 16. köt. 1864–1870. Kossuth, Budapest, 1964, p. 171–179.

8) Hungare: *MARX – ENGELS:* Válogatott levelek 1843–1895. Szikra, Budapest 1950, p. 213. (MARX al L. KUGELMANN, Hannover. London, la 9-an de oktobro 1866.)

9) La première internationale (recueil de documents publiés sous la direction de Jacques Freymont), tome I. Génève 1962. Publication de l'Institut universitaire des hautes études internationales. N. 39.

10) Esperante citas I. IVANOV („Paco" No. 9–10, 1970, ĉeĥoslovaka eldono) el: Procés-verbaux du Congres de l'Assotiation internationale des travailleurs réunis á Lausanne 2–8 Sept. 1867. La Chaux-de-Fonds 1867. (kaj) Rapports lus au Congrès ouvrier réuni du 2 au 8 Sept. 1867 à Lausanne. La Chaux-de-Fonds 1867.

11) Esperante citas DREZEN el: *James GUILLAUME:* L'Internationale, vol. I. Paris 1905, p. 36. – en: *Ernesto DREZEN:* Historio de la mondlingvo. Tri jarcentoj tra serĉado. EKRELO, Leipzig 1931 (Fotorepreso: Pirato, Oosaka 1967) p. 97.

12) Rimarko de la redakcio: Komparu tamen: „Pri neceso kaj utilo de interlingvistikaj esploroj" de Detlev Blanke, en „Paco" 4/1972 (GDR-eldono) de la sama aŭtoro: „Kelkaj konsideroj pri argumentoj kaj argumentado", Paco 4/1971 (GDR-eldono) „Pri la historio de internacia laborista esperanto-movado", Paco 1969 (GDR-eldono)

– CR –

Rudolf Rakuŝa:

Metodiko de la esperanto-instruado

Gvidilo por instruantoj de la lingvo internacia. eld. Mladinska Knjiga, Ljubljana 1970, 189 pĝ. + XI

Sisteman priskribon de la metodiko de esperanto-instruado Rudolf Rakuŝa jam prezentis unuan fojon 1957 per sia libreto „Instrumetodo por Esperanto" kiu, prilaborita eniris la volumon „Esperanto kaj Lernejo" (red. P. Zlatner) 1959. Lia „metodiko" eldonita post lia morto, estas la plej ampleksa prezento de kolektitaj spertoj rilate arton de instruado de la internacia lingvo, kaj kiel tia unu el la bazaj faklibroj de Esperanto. La libro estas ĉefe dediĉita al la instruantoj de Esperanto en lernejoj, sed same utila por instruantoj en societaj kursoj.
Deirante de la konata fakto, ke la plej multaj Esperanto-instruantoj ne estas profesiaj instruistoj, Rakuŝa donas sufiĉe vastajn enkondukojn. En la unua parto li priskribas la *instruiston* de Esperanto, ties dezirindajn ecojn, sciojn. Sekvas la priskribo de la lernanto, liaj atentendaj interesoj, la diversaj kaŭzoj, kiuj lin kondukas al la interesiĝo pri la internacia lingvo. Sub la ĉapitro „specialaj problemoj" la aŭtoro prave atentigas pri kelkaj gravaj avantaĝoj de Esperanto, ĝia rolo kiel enkonduko en la fenomenon lingvo (ŝlosila lingvo), la relativa facileco ktp.
La rubriko „faka literaturo" peras skizon de la ĝis nun aperigita plej grava materialo.
Speciale por nepedagogoj estas valora la dua parto „ĝenerala didaktiko", la enkonduko en kelkajn bazajn demandojn de la lingvoinstruado. En la tria parto de sia libro Rakuŝa prezentas kiel „specialan didaktikon aŭ metodikon" la evoluon de la fremdlingva instruado laŭ la diversaj metodoj, prezentante la plej malnovan metodon, la gramatikan, same kiel la modernajn ĝis la laboro en lingvaj laboratorioj kaj la diskutata hipnopedio (lerno en dormo). Sekvas la pritrakto de la instruplano, kondiĉo por sistema instruado. Trezorejon da spertoj pri unuopaj praktikaj metodoj peras la ĉapitro „aplikado de la metodiko", kie Rakuŝa ankaŭ donas diversajn provlecionojn.
„Instruhelpiloj" kaj „liberaj aktivecoj de la infanoj" kompletigas la trian parton. Utila bibliografio kaj indekso plifaciligas la pluorientiĝon kaj trovon de specialaj problemoj aŭ temoj.
Certe la libro meritas en multaj punktoj diskuton. Kaj multo estas kritikinda. Tio estis ja antaŭ videbla. Ekzemple ŝajnas al mi, ke Rakuŝa tro miksas la „verdan ideologion" en sciencajn temojn. Parolante pri „misio", „espero kaj kredo" (pĝ. 7) kiel stimuloj de nia laboro la aŭtoro bedaŭrinde ofte identigas la esperanto-movadon kun iu homaron savanta unueca religio. Grava manko estas ankaŭ la ĝenerala neprecizeco de la bibliografiaj indikoj. Aŭ mankas eldonloko, aŭ eldonjaro (pĝ. 19, 33, 38). Estas cititaj iuj eldiroj sen preciza fontoindiko (33). La aldono „bibliografio" mem sur paĝo 179 estas ekzemplo de senzorga kaj supraja prezento. La komparo de Basic English kaj Pidgin (pĝ. 37) estas minimume malĝusta. Anstataŭ paroli pri „vivantaj lingvoj" (pĝ. 94) mi preferus „naciaj" por ne nutri la konatajn antaŭjuĝojn rilate esperanton kiel „mortan".
La libro ankoraŭ ne staras sur tiu scienca nivelo, kiel multaj naciaj metodikoj. Tamen ĝi estas sendube la plej bona ĝis nun pri metodiko en Esperanto publicita, kaj kiel tia sendube grava helpilo kaj proponinda por ĉiu instruanto de la internacia lingvo.

Detlev Blanke – CR –

RECENZO

„Kun Onklo Ho"

(Hanojo 1972, Fremdlingva Eldonejo, 400 pĝ.)
Ĉu eblas alilokigi monton kaj plenigi maron?

Jes! Sed kiamaniere?
Ho Chi Minh mem, la respektata gvidanto de la revolucia movado, revita idealo de la junularo vjetnama, la plej amata homo de la tuta vjetnama popolo iam, en iu arbarangulo de Vjet Bac, donis la respondon, poemforme, kiu rapide fariĝis la gvidilo de la tuta vjetnama junularo:
„Estas neniu laboro malfacila, nur mankon de persistemo oni timas. Alilokigi monton kaj plenigi maron kun firma volo nepre oni sukcesas."
Tiu-ĉi mallonga citaĵo karakterizas tiun homon, kies agado kaj vivo estas priskribitaj kaj eternigitaj en la volumo titolita „Kun Onklo Ho", eldonita 1971 en Hanojo. Sur preskaŭ 400 paĝoj oni trovas 21 rakontojn de 21 diversaj aŭtoroj, kiuj havis okazon labori kun li, proksimiĝi al li. La portreto de tiu, kiu restas eterne por la tuta vjetnama popolo „Onklo Ho", estas pentrita per la memoraĵoj kaj impresoj de liaj kunlaborantoj, kamaradoj kaj eminentuloj.
El la 21 rakontoj plej bone plaĉas al mi
la 9-a „Mia unua klaso",
la 12-a „Onklo Ho en Tan Trao",
la 13-a „Ses semajnoj en akompano de Onklo Ho",
la 17-a „Renkontiĝante kun Onklo Ho",
la 20-a „La gitaro de Onklo Ho".
Ili aparte taŭgas esti voĉlegotaj en klubvesperoj, kunvenoj aŭ solenaĵoj.
Traleginte la libron mi konatiĝis kun historiaj, politikaj kaj aliaj faktoj, mi profundiĝis en karakterizaĵojn de la vjetnama revolucio kaj antaŭ ĉio min impresigis ĉiuj homaj flankoj de la respektinda unika homo.
Migrante tra la mondo li observis la homojn kaj studis la cirkonstancojn en Francio, Britio, Sovetunio, Ĉinio, Tajlando kaj Afriko.
Tio, kio ĉe li plej plaĉas al mi estas sendube la familiareco en lia sintenado, la simpleco, la mildeco kaj la profundeco de liaj eldiroj. Dum lia tuta vivo, ĉu kiel maristo, kiel domservisto, neĝpurigisto, hejtisto, helpisto en hotelo kaj panbakejo, kiel fotokorektisto, kiel ĵurnalisto kaj redaktoro, pentristo, samekiel partia ĉefgvidanto kaj prezidento, li al ĉiuj estis ĉiam ĝentila, komplezema persista antaŭ dekmiloj da ŝanĝiĝoj. Lia sobreco estis proverba rilate al sia vivmaniero kaj manĝaĵo. Li tute gaje konsentis ĉiujn mankojn kaj malkomfortojn. Ĉiam li dividis kun siaj kamaradoj rigoran vivon kaj senlace kaj energie laboris de frua mateno ĝis la nokto.
Unu el liaj kunuloj diris pri Ho: „Kvankam la problemo pri armita lukto staris ĉe la unua plano de niaj okupoj, li ankaŭ atentigis nin pri aliaj taskoj, kiaj kreskigo de la produktado, likvido de la analfabeteco. Li forgesis nenion, flankenlasis nenien, eĉ la plej etan aferon, laŭŝajne sensignifa sed tre grava ..." Mi ne plu miras, ke oni arde amis kaj estimis lin. Nepre mi devas citi kelkajn eldirojn de liaj kamaradoj: „Li estis ĉiam simpla kaj kore afabla. Oni ŝatis aŭskulti lin, ĉar li sciis elokvente trakti ĉiujn temojn, de la ĉiutagaj laboroj ĝis la nacisavaj organizoj, de la simplaj aferoj ĝis la gravaj politikaj aferoj ... Ĉiuj liaj eldiroj estis simplaj, profundaj, facile memoreblaj kaj klaraj kiel suna tago, kiu kvazaŭ penetrus ĝis la fundo de nia koro."
Ofte li gvidis politikajn kursojn en la gerilbazo. Tie lie ĉiam rememorigis al la kursanoj la principojn de la sekreta agado, baziĝantaj je la principo de tri nenioj: „Al iu ajn, kiu faras demandon, vi estas petata respondi per tiuj tri nenioj: Mi vidis nenion, mi aŭdis nenion kaj mi scias nenion." Vere, li estis la plej sperta, elokventa instruisto, la plej lerta diplomato, la plej arda revoluciulo, la plej modesta, patra, homa homo de sia popolo!
Treege emociigaj estas la priskriboj el la plej doloriga epizodo de lia vivo revoluciula, kiam li devis elteni ĉiujn torturojn de la mezepokaj karceroj, veran kalvarion de 80-taga konsumlaciga piedirado, 14-monata mallibereco en trideko da kuomintangaj karceroj. „Tial malfortiĝis liaj kruroj kaj malakriĝis liaj okuloj. Sed, li gardis ĉiam sian tutan klarvidecon kaj sian tutan kuraĝon. La ferkatenoj, la punjugo, la veteraj ŝanĝiĝoj, la plej nigra mizero havis nenian influon je lia optimismo kaj fido je la fina venko de la revolucio ... Li decideme luktis kontraŭ ĉiuj malsanoj, kaŭzitaj de la nehumana mallibereja reĝimo. Li surgrimpis monton por ekzerci siajn malfortiĝintajn krurojn, li rigardis en la mallumon por pliakrigi

Geologio Internacia – Kolekto de originalverkoj en Esperanto. Volumo 2, pĝ. 144, 30, 5 × 14,5 cm, eld. 1972 Geoindustria n.p. en Praha, respondeca gvidanto: RNDr. Kiri Šindelár, CSc, ĉefa red. Josef K a v k a (Dr., CSc), teknika redakcio: Geologia Sekcio de ISAE. Eldonita okaze de la 24-a sesio de la Internacia Geologia kongreso en Montrealo 1972. La 1-a volumo aperis okaze de la 23-a IGK en Praha, 1968. Ĉar la klopodoj, celantaj enkonduki Esperanton kiel oficialan lingvon de la geologoj ne povis esti plene disvolvitaj pro la antaŭtempa finiĝo de la 23-a sesio, en Montrealo denove okazos seriozaj intervenoj plede por E.
Kion diru laiko pri tiu ĉi respektinda faka verko, ilustrita kaj plaĉe ekipita? Oni devas sincere admiri la laboron de tiuj, kiuj pretigis ĝin. Jen modelo de perfekta apliko de la Internacia lingvo sur kampo scienca. Traktatoj de aŭtoroj el Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio, GDR, Brazilo, Kanado, Hungario kaj nacilingvaj resumoj (i.a. en portugala, hungara). Unu ekzemplo: „Demetiĝa medio de la paleoĝis mezozoikaj sedimentoj en la baseno Piaui-Maranhão" (Brazilo). – Aldonita estas latinlingva listo „Elementa grammatica linguae Esperanto" (Cailleux kaj Pumpr).
Ricevebla ĉe ĈEA por 24 Kĉs plus afranko.

[El „Starto" 6/72, Praha]

Mi serĉas materialon pri la diversaj rezistomovadoj kontraŭ la Naziaj Okupantoj dum la dua mondmilito. Ĉu vi havas senperan informon, aŭ ĉu vi scias, kiu en via regiono havas? Ĉu vi konas iun ajn, kiu partoprenis la rezistomovadon? Se jes, mi multe taksus vian helpon. Mi ŝatus scii pri agoj de la movado kaj ĝeneralaj objektivoj. Mi ŝatus scii ankaŭ pri revenĝaj agoj de la Nazioj.
Mi estas dek ses jaraĝa, studentino, kaj volas kompili materialon por seminario. Antaŭdankante vian helpon Shirley Boschen, 195 Partridge Road, Pittsfield, Mass. 01201/USONO.

---

siajn okulojn. Fine pro firma volo kaj revolucia energio li sukcesis venki ĉiujn fizikajn dolorojn" ... Li estis vivanta ekzemplo de granda energio kaj tiu energio simbolas senmezuron kaj nekontraŭstareblan forton, kiu kapablus mobilizi ĉies korojn tiam, nun, kaj ankaŭ estonte.
Jes, mi nun tute komprenas la vjetnaman popolon, kiu decideme batalas malgraŭ ĉiuj malhelpoj plenumante la ordonon: „Nenio alia, krom la venko!", celante la nacian sendependecon, la popolan liberecon, la feliĉon de la popolamaso, la marŝon al socialismo.

Hella Sauerbrey

Kie aboni al „Paco"

Aŭstrio:
S-rino A. Sindl, A-3108 St-PÖLTEN-WAGRAM, Traiseng 26 — 50 š.

Belgio:
Edm. Lödör, 385 Brusselsesteenweg, 9001 GENTBRUGGE — 100 f.

Britio:
P. Hewitt, 3, Elmdale, Madeline Rd., PETERSFIELD – HANTS. — 50 np.

Bulgario:
Bulgara MEM-Komitato, Bulv. Ĥristo Botev No. 97, SOFIA — 3 l.

Ĉeĥoslovakio:
Ĉeĥa Esperanto-Asocio, MEM-sekcio, Poštovni Schránka 8, PRAHA-2 — 30 k.

Danlando:
Egon Starup, Vingstoften 34, 2730-HERLEV — 10 k.

Finnlando:
Erkki Järvinen, Ukonkivenpolku 2, I. 68 00440 HELSINKI 44 — 8 m.

Francio:
Fédération espérantiste du Travail, 179, rue Ordener, 75018 PARIS (p.k.k. 902-52 PARIS) — 15 f.

Germana Demokratia Respubliko:
Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de DDR, 108 BERLIN, Charlottenstr. 60 — 5 m.

Hungario:
Hungara MEM-Komitato, BUDAPEST-VIII, Keneyérmezö utca 6 — 36 f.

Italio:
Rag. Leone Costantini, Via G. C. Matteuci 1, 20.162 MILANO

Japanio:
Humaki Hidea, PO Box 17, EDOGAWA-TOKIO (Japana Pacdefenda esperantista asocio) — 1 000 l.

Jugoslavio:
Dim. Bjelanoviĉ, str. Zahumska 23/6, 18/I. 11000-BEOGRAD — 2 r.

Kubo:
Raul Juarez-Sedeño, Apartado 570, CAMAGÜEY — –

Nepalo:
Keshab Ran Joshi, Esperanto-societo, 10/319, Bhosiko Tole, KATHMANDU — –

Norvegio:
Nenning Nielsen, TÜRVIKBYGD — 10 k.

Peruo:
Ildefonso Nuñez, Calle 2 de Mayo 796, CAJAMARCA — –

Pollando:
Pola Esperanto-Asocio, ul. Jasna No 6, WARSZAWA — 35 z.

Popola Respubliko de Koreo:
Korea Esperanto-Asocio (s-ro Sin Gosong), Poŝtkesto 16, PJENJANG — –

Rumanio:
S-rino Irma Fülop, str. Calan 12, etj I, SIBJU — –

Sovetunio:
Unuiĝo de sovetaj societoj de amikeco kaj kulturaj rilatoj kun aliaj landoj, *Esperanto-komisiono*, Kalinina 14, MOSKVA K-9 — 2 r.

Mondpaca Esperantista Utilaj Adresoj

Prezidanto: Nikola Aleksiev, Nezabravka I, blok I, vhod II, SOFIA-13 (Bulgario)
Ĝenerala sekretario: Tomáš Balda, Revnice 416/23, PRAHA-ZÁPAD (Ĉeĥoslovakio)
Centra administranto: Ivan Canev, Bulgara MEM-komitato, Bulv. Ĥr. Botev 97, SOFIA (Bulgario)
Kasistino: s-ino Germaine Roux, 47150-MONFLANQUIN (Francio)
Centra redaktoro de „Paco": William Gilbert, 30, rue Croix-Montoire, 37100 TOURS (Francio)
Prezidanto de la eldonkomisiono: Helmut Fuchs, Hohe Str. 33, 83 PIRNA (GDR)

GRAVE! Nepre skribu al la koncerna adreso laŭ la temo pritraktita, t.e. al la prezidanto pri fundamentaj politikaj problemoj al la ĝenerala sekretario pri organizaj problemoj, al la centra administranto pri administraj kaj financaj aferoj, al la kasistino por pago de kotizoj (koncernas la landajn perantojn), al la centra redaktoro pri redakciaj aferoj, al la prez. de la eldonkomisiono pri eldonproblemoj (notinde pri eldonplanoj de „Paco": koncernas ĉefe la landajn perantojn). Ni ne povas garantii sekvon al leteroj kaj dokumentoj senditaj al maltaŭga adreso aŭ traktantaj diversajn problemojn.

SE VI SENDAS AL „PACO" TEKSTOJN, bv. uzi kiel eble plej koncizan stilon, zorgi pri korekta lingvo, tajpi kun duobla interspaco, nur sur unu flanko de la papero. Ne havante tajpilon, oni skribu per bone desegnitaj literoj. Se vi sendas fotojn, ili devas esti interesaj, teknike bonaj, kontrastaj.
Raportojn pri interesaj kaj aktualaj okazintaĵoj oni skribu *tre koncize* kaj sendu *senprokraste.* Informojn pri okazontaj manifestacioj (esperantistaj, porpacaj) oni sendu almenaŭ 6 monatojn antaŭe.

La insigno de MEM

Nepre aĉetu la belan insignon de MEM fabrikigitan de nia MEM-sekcio en Ĉeĥoslovakio. Formato 9 × 18 mm, 4-kolora. Vere digna simbolo de MEM. Tuj mendu ĝin ĉe via MEM-sekcio!

Informo de la C.R.
Numero 5 de Paco 1973 aperos en Japanio.

Lasta amo

Ĉe mi ĝojeg' aperas
ĉar vi ne plu koleras.
Dolor' foriĝis kiel vento,
denove regas amo-sento.

Pri vi mi zorgos nur de nun!
Al vi ridetu nur FORTUN'!
Vi estu mia ĉio,
la sola nur pasio!

Vi ŝajnas min juvelo,
vi indas je duelo.
Forrestu ĉiu ŝtorma vent'!
Ŝatata lasta mia dent'!

Wilfried Hofmann



Bulgario

Dez. koresp. membroj de la esperanto-societo „Balkan-stelo", p.k. 90. *Trojan*

Dentkuracisto, 50-jara, dez. koresp. Alis Konstantinova, *Pomorie*, str. Samuil 12-a

Junulara klubo de internacia amikeco, kolektive kaj individue, dez. aranĝi reciprokajn vizitojn. Adreso Mladejki dom, Interklub, *Šumen*

Lernantino, 5-a klaso, Dimitrina Jirkova Zaševa, *Targovište*, kv. Iztok, bl. 13

El la urbo *Ruse* dez. korespondi:
Diana Vitska, str. Br. Obretenovi 13, pri ceramiko, arto;
Venelin Vitski, 39-j., str. Br. Obretenov 13, pri arkeologio, fotografio, historio de la transporto;
Verka Dimova, str. P. D. Petkov 11, pri pentroarto, bk;
Margarita Stojanova, bulv. Ang. Gecov 52-b, p.k. 17 pri kino, poezio;
Donka Geneva, bulv. Lenin 163

Dez. koresp. membroj de la esperanto-societo *Svištov*, dez. komunan foton kun amikoj de aliaj landoj, sendas esperantajojn.

Teknikisto, 35-jara, pri fotografado, kinoamatoroj, filatelio, kol. bk., Conjo Borisov, *Sevlievo*, str. Bakston 21

Lernantino en 9-a klaso, kol. pm, bk, Antoaneta Nikolaeva, *vilaĝo Opaka*, Targovište-distrikto

Lernantino, 17-jara, pri estrada muziko, Cenka Borisova Alexandrova, ul. Topolnitsa, W. 11, *Targovište*

ĈSSR

16-jara junulo dez. koresp., kol. fromaĝglumarkojn, Jaromir Hinicica, Šimackova 27, *Ostrava 2*

DR Vjetnamio

Fervora filatelisto, dez. koresp., interŝ. pm el ĉiuj landoj pri la temoj: ruĝa kruco, sporto, kosmonaŭtoj, eminentuloj, turismo, popola arto, famaj pentrajoj . . . Skribu al Dang Tran Hoan artpentristo, 50 P.hang Gai (Gac) *Hanojo*

GDR

Radiamatoraj-esperantistoj (HAMs, SWLs-interesatoj) kontaktu Michael Lennartz (DM-5542/D, *DDR - 172 Ludwigsfelde*, Eschenallee 45

Junpioniroj (9-jaraj), bk, tutmonde, Skribu al Margot Michel, Pestalozzi-Oberschule, Kl. 3b, *DDR - 8312 Heidenau*

Junulo, 23-jara, kun ĉ.l. pri ĉ.t. speciale pri lingvoj. artoj, filatelio, Eberhard Küttner, *DDR - 9262 Frankenberg*, PSF 15

Kiu povas helpi? Serĉataj estas por kompletigo jenaj numeroj: Germana Esperantisto, jarkolekto 1924, n-roj 1, 2, jarkolekto 1929, n-ro 12, Hungara Esperantisto, jarkolekto 1968, n-roj 5–12. Helpemuloj skribu al Jürgen Hamann, *DDR - 705 Leipzig*, Püchauer Str. 3

Lerneja esperanto-grupo, 12 geknaboj, 13-j kaj plenkreskula grupo 8 amikoj, 18–55-j, dez. koresp. pri turismo, pacmovado aliaj temoj, bele ilustritaj bk, resp. garant. Skribu al Esperanto-grupo „La ponto" – Ronneburg, (Kurt Heeg), *DDR - 9622 Fraureuth*, str. Fritz-Heckert-Ring 70

Dez. koresp. kun juna familio pri harmonio inter la popoloj, infanedukado. Wieland Kochte, *DDR - 8019 Dresden*, Wartburgstr. 15

Hispanio

Gejunuloj dez. korespondi. E.K.U.S. ĉe A. Grau, Felix Amat, 72, *Sabadell (Barcelona)*

Hungario

Serĉata la disko kun Himno de Riego, (p.e. 410022, 580001 aŭ 560061) de Csüllög Georg, *Vestö*, Mikszath Kalman 32

Lernanto dez. korespondi. Gyula Kovacs, *6100 Kiskeenfelegyhara*, Hunyadiu 4

Inĝeniero, 50-jara, en angla, germana, Esperanto, Josef Vegh, *1065 Budapest VI*, Bajcsy Zsilinsky ut. 33, III, 6

Inĝenierino, 25-jara, en angla, germana, Esperanto, Maria Szantpeteri, *1124 Budapest XII*, Tormalja ut. 19, I

Oficistino, 19-jara, kol. bk, diskojn, Boros Katalin, *F-5123 Jaszarokszallos*, Halasa ut. 21

Lernantino, 8-a klaso, dez. koresp. Daniel Helga, *H. 7300-Komlo*, Arany Janos ut. 8

Jugoslavio

Elektristo, 32-jara, kun germanaj amikoj pri sporto, turismo, fotografado, popolaj kutimoj interŝ. insignojn, amatorajn fotojn, suvenirojn. Mirko Zlatkoviĉ, *22240 Šid*, Str. Save Šumanovica 46

Mongolio

Lernanto de 10-a klaso serĉas internacian korespondon, kol. pm, insignojn, bildkartojn, artkartojn. N. Gambaldorĝ, *Ulan Bator*, 20. Schkola, klaso 10 b

Rumanio

43-jara viro korespondemas tutmonde, Emilo Radu, Str. St. Gheorgiu 33, *Tg. Mures*

Juna intelektula familio dez. kontakti familion havanta 2–5-jaran esperanto-parolantan infanon kaj deziranta fari reciprokajn vizitojn. Skribu al Alexander Bubu Tausciue, str. 23 August 39, *Suliva* jud. Tulcea

Studento dez. koresp. kun GDR-esperantistoj, kol. pm. Florian Bociort, *Timisoara*, Piata Nicolae Balcescu Nr. 5

Pollando

Laboristo, 24-jara (laboranta en aŭtomobila fabriko), dez. koresp. kun ĉ.l. pri fotografio kaj turismo. Antoni Dorosz, *Nowy Las* 25 pow. Nysa

Instruistino por piano dez. korespondi. Nina Klodas, *Orla 40*, Pabianice

Dez. koresp. Katerina Nejman, ul. Betonowa 51, *Lodz* (Ruda)

Dez. koresp. kun studentoj Adam Jagla, gvidanto de la Klubo Esperanto, *Poznan*, str. Fredry 7

Instruistino, 22-jara dez. koresp. kun la tuta mondo pri literaturo, geografio, kino, teatro k.s. Dez, interŝ. bk, diskojn. Dorpta Blacharska, *Sobotka*, str. Kosciuszki 25, pov. Vroclavo

Ĉe Pola Esperanto-Asocio en Bytom ekzistas Komitato Organiza de Esperanto-Muzeo, petanta alsendon de esperantajoj, malnovaj libroj fotoj, jurnaloj k.s. Komitet Organizacysny „Muzeum Esperantckie *Bytom*", ul. Browarniana 6

Esperanto-Kluboj el Pollando
Esperanto-Klubo en *Szczecin*, str. Wawrzymaka en Oficira Klubo funkcias ĉiumekrede 18^{00}–20^{00}

Klubo Esperanto-Turisma „Esperantujo"
Bytom, str. Browarniana Nr. 6, Pollando, Tel. 816 026
Prezidanto: S-ano Jozef Rogowski, dez. kunlaboron. Klubvesperoj okazas ĉiulunde 16–21-a horo.

Deziras korespondi
Zespoł Wokalny „Ataraksinoj", *Bytom*, str. Seromskiego 25

Ataraksestro. Janusz Tywoniuk, *Bytom*, str. B. Prusa 44/10

Danuta Uryga, *Bytom*, str. Pl. Słowiański 6/12

Aleksandra Ciepał, *Bytom*, str. Kopernika 12/6

Eva Sroka, *Bytom*, str. Fałata 24/1

Jrena Psyk, *Bytom*, str. Słoneczna 29

Monika Piszczek, *Bytom*, str. Gen. Dąbrowskiego 16

Dorota Pomykała, *Bytom*, str. Powstanców Warszawskich 43/9

Urszula Pomykała, *Bytom*, str. Wowstanców Warszawskich 43/9

Klubo Turisma „Esperantujo", *Bytom*, str. poczt. nr. 264 Pollando

S-ano. Józef Rogowski, *Katowice*, str. Brynowska 62/5

Monka Maria, *Swiętochlowice-4*, str. Boczna 1

Gryczek Piotr, *Bytom-5*, str. Konstytucji 62/3

Anna Kalin, *Bytom*, str. Francuska 3

Gerhard Sapok, *Gogolin-3*, str. Krapkowicka 49

Esperanto Informejo „Esperantujo", *Tarnów*, str. J. Krasickiego 9

S-ano. Józef Zielonka

Danuta Lange, *Bytom*, str. Eistreichera 10/3

Romuald Wolski, *Bytom*, str. Chrobrego 8/3

Dymek Andrzej, *Bytom-9*, str. Ormowców 59/11

Laszuk Jan, *Bytom*, Chełmonskiego 22/14

Rutniewska Jolanta, *Bytom*, str. Kwietniewskiego 11/4

Henryka Wrońska, *Bytom*, str. Wolności 3/6

mgr Florentino Tyblewska, *Bytom*, str. Matejki 10/12

Stefania Cicha, Bytom, str. Armii Ludowej 6/15

Otrębnik Dorota, *Bytom*, str. Rogowskiego 71

Maria Nigieł, *Bytom*, str. Odrzanska 102

Joachim Gora, *Piekary Śl.*, Oś. Wieczorka 103/III/19

Zuzanna Gora, *Piekary Śl.*, Oś. Wieczorka 103/III/19

Rogowska Barbara, *Katowice*, str. Brynowska 62/5

Józef Rogowski, *Bytom*, skr. poczt. 264

Walter Kapoł, *Bytom-8*, str. Jaskółcza 17

Fabjaniak-Szołno Barbara, *Warszawa*, al. Zjednoczenia 48/3

Maria Wolska, *Bytom*, str. Chrobrego 8/3

Teresa Król, *Bytom*, str. Odrzanska 32

Roman Figel, *Bytom*, str. Koniewa 31/50

Skrabut Marek, *Bytom*, str. Akacjowa 4/2

Perfecki Zygmunt, *Bytom*, Piekary Śl. Bytomska 2/6

Dzialoch Jolanta, *Bytom*, Pułaskiego 26/1

Kwoka Aurelia, *Bytom*, str. Chorzowska 14/E

Kwoka Alina, *Bytom*, str. Chorzowska 14/E

Józef Olender, *Bytom-7*, str. Manifestu Lipcowego 28/A/13

Krzysztof Horodecki, *Gliwice*, str. Styczynskiego 7/2

Henryk Hawrylewicz, *Gliwice*, str. Orzeszkowej 22/7

200 gejunuloj en aĝo 16–30 jaroj deziras korespondi en esperanto kun germanaj gejunuloj pri ĉiuj temoj, interalie pri reciprokaj vizitoj. Adreso: Junulara Esperanto-Rondo, *Wrocław-17*, str. Dubois 3, Pollando

F-ino Witosława Mazur, *Chorzów*, Cmentarna 6/7 serĉas por la loka E-grupo korespondantojn el GDR. Skribu senhezite – respondo garantiata!

Juna pola geedzparo deziras korespondi kun sovetaj esperantistoj. Interŝanĝas esperantaĵojn, diapozitivojn, reciprokajn vizitojn ktp. Adreso: Wanda kaj Edward Wojtakowski, *Wrocław-2*, Poŝtkesto 312, Pollando.

La 17-an de junio 1973 la Klubo „Esperantujo" en *Bytom* organizas „Silezian Esperantistan Renkontiĝon". Skribu al Klubo Esperantujo Bytom, skr. poczt. Nr. 267

Komitet Organizacyjny Muzeum Esperanskie, *Bytom*, skr. poczt. Nr. 267 serĉas kontakton kun GDR-esperantistoj

Zespol Wokalny „Ataraksinoj" estas esperanto-kanzon-ensemblo, kiu serĉas kontakton kun GDR-esperantistoj. Skribu al K.Z.A. *Bytom*, str. Zeromskiego 25

26-jara komencanto dez. koresp., interesiĝas pri piedira turismo, faŭno, flaŭro, kol. bk, pm, serĉas amikojn el GDR: Lech Tomaszewski, *Wrocław*, str. Klara Zetkin 28 1.4

Inĝeniero, 37-jara, komencanto dez. koresp. kun GDR-esperantistoj. Skribu al Inĝ. Marian Kwolek, *Krakow-N.H.*, Na Lotnisku 21/128

Soveta Unio

Lernantino, 16-jara, pm, literaturo, muziko, Vida Buzilianskaite, *Astru 4*, Panevejis-6

Lernantino, 15-jara, bk, Scajeva Lena, ul. Demejoĥina N 27–40, *348016 Voroŝilovgrad*

Lernantino, 16-jara, libroj, muziko, kol. pm bk, Violeta Griniute, str. Nemuno 143-13-a, *Klaipeda-10*

Lernantino, 16-jara, muziko, libroj, Malle Kamberg, *200009-Tallin*, Päikese pst. 69a. Estonio

Gejunuloj (18–24 jaraj) pri ĉ.t. Skribu al Vladimir Zibenkes, *Tjumenj-9*, ab/ja 8

Dez. koresp. Anna Ĥoroŝto, *340025-Doneck*, str. Kollontaj 172, (18-jara)

Lernantino, 14-jara, kun ĉiuj landoj, bk, insignoj, Olga Korjovskaja, str. Kominterna 3, *240018-Doneck*

Inĝeniero, bk, Levontin Anatolo, *Ĥarkovo 3*, placo Teveleva 2/2, loĝ. 101

Studentino, 19-jara, Ŝkirko Nataŝa, *Ĥarkovo 120*, 605 mikrorajon 60, loĝ. 7

Studentino, 18-jara, bk, Stepanenko Svetlana, *Ĥarkovo-45*, str. 23 aŭgusto 6, loĝ. 18

Studento, 17-jara, bk, Ostapenko Aleksej, *Ĥarkovo 78*, str. Karazinal 2, loĝ. 2

Inĝeniero, 45-jara, bk, Ŝierŝova Roza, *Ĥarkovo 50*, placo Fejerbaĥa 6, loĝ. 4

Inĝeniero 33-jara, bk, Artemenko Garri, *Ĥarkovo 121*, 606 mikrorajono 1, loĝ. 9

Lernantino, 17-jara, bk, Goltelova Nataŝa, *Ĥarkovo 38*, 1-a popereĉnaja 5, loĝ. 3

Rondeto de Internacia Amikeco en mezlernejo dez. koresp. kun gelernantoj el GDR. Skribu al A. I. Masenko, *357739 Kislovodsk*, Candera 9–63

Flegistino medicina, 38-jara, dez. koresp. pri ĉiuj temoj. Zita Kvietkiena, Taikos prospektas 19A-1. *Klaipeda*, Litova SSR

Pri popolaj kuracmetodoj (fizikaj, akvovarmo, nafto ktp.) dez. koresp. d-ro P. I. Tanlov, *Soĉi*, ul. Oŝtrovskij 67–68

Studentino, 19-jara de politeknika instituto. dez. koresp. pri muziko, filmoj, pm. Danuta Balĉiunaite, *233031 Kaunas*, Žurrinto g. 6-1, Litova SSR

16-jara knabino dez. koresp., interŝanĝi pm. bk, esperanto-libroj Gintarie Liatukaite, *232005 Vilnjus*, Krovikos 9-a-19, Litova SSR

Studentino de Litova lingvo dez. koresp. pri literaturo, muziko. Aranauskaite, Line, 507 ĉambro, II Koruko, stud. - 39 - *Vilius - 34*

Historiisto deziras korespondi: Ĥvorostin Stepan Konstantinoviĉ, UdSSR, *190000 Leningrad*, ulica Sojnza Svjazi, domo 20–24

Junulino, 17-jara dez. koresp. tutmonde, kol. bk, insignojn, interso por literaturo. Gudaityte Laima, Krantines 10–40, *232040 Vilnius*

Juna inĝeniero dez. korespondi. V. Andrejev, Abonkesto 98, Centro. *Ĉeljabinsk 454000*

Anja Vojnaroviĉ komunikas: Mi estis malsana dum 6 monatoj post mia operacio kaj ne povis respondi leterojn. Mia nova adreso Anja Vojnaroviĉ, *353860 Priazovska* poŝto Primorsko-Aĥtarska rajnono, Krasnodarska obl.

Instruisto de matematiko, 49-jara, gvidanto de E-kursoj por komencantoj serĉas korespondamikojn el ĉ.l. pri instruado ŝako, vivmanieroj k.a. temoj. Grigori Gercikov, *483310 Alma-Atinskaja* obl. *Talgar-2* Kommunistiŝeskaja 278, Kazaĥa SSR

Norden, Kaius (40-jara), rentgenlabora laboranto, Adr. USSR Estonio, *Viljandi*, str. Kôrgemäe 7–2. Kun foto k. filmamatoroj

Maidessoo, Leili (32-jara) medicina flegistino, Adr. USSR Estonio, *Viljandi*, str. Lohu 25, Pri ĉt.

Veri Maie (32-jara) medicina fratino, Adr. *Viljandi* raj. Jämejala hai gla, USSR Estonio, Pri ĉt.

Konsand, Leida (42-jara) medicina flegistino, Adr. USSR Estonio, *Viljandi*, Vôidu pst. 14-a

Kôiv, Tiiu (25-jara) akuŝistino, Adr. USSR Estonio, *Viljandi* rjn. Halliste-Kulla

Korts, Eda (34-jara) biologia-biokemiistino, *Viljandi* rjn. Jämejala haigla, USSR Estonio

Klasman, Vaike (31-jara) medicina flegistino, Adr. USSR Estonio, *Viljandi* Meeme 4-2

Laos, Alfred (50-jara) laboratoria laboranto, Adr. USSR Estonio, *Viljandi* rjn. Jämejala haigla

Rohula, Asta (46-jara) dieta flegistino, Adr. USSR Estonio, *Viljandi*, Kingissepa str. 61-2

Bibliotekestro, pm., monerojn, monbiletojn, Viktors Laŝkovs, *Cesis*, str. Lbedeva 28-18, Latva SSR

Lerneja E-rondeto kaj Klubo de Amikeco dez. koresp. kun eksterlandaj lernejaj kluboj. *310128 Ĥarkiv-128*, Sadovaja 7, ŝkola n. 78

Modsalonino, 22-jara, bk, Vivian Karner, *Tallin 200029*, Sutiste 3–130

Ekonomistino, 38-jara, kun ĉ.l., bk, Anna Serunina, *200007 Tallin*, Koidu 89-27

Lernanto, 19-jara, Paut Toivo, Suur-Karja 18–45, *2000001 Tallin*

Inĝeniero, 31-jara, pri e-problemoj, lingvoj, fotoarto, kol. e-literaturon, fotofakverkojn, diskojn, Miĥail Kirillov, *Moskvo V-321*, Tjoplyj Stan-3, 37-301

Juristo, 39-jara, Elmar Ratassepp, *202500 Valga*, Kesemoli 3-1

Esperanto-Klubo, Estona SSR, *202400 Tartu*, Kalevi tän. 24

Lernantino, 17-jara, Ülle Rüm, *200029 Tallin*, Tammsaare tee 119-34

Teknikisto, 21-jara, Jurij Logvinenko, *235000 Jonava*, ab. kesto 12, Litova SSR

Dez. Korespondi junulino, 20-jara, Podkoritova, Galina, Svoboda, 121-7 *Ĉeljabinsk-454091*

Por si kaj por siaj belegaj klubaninoj dez. amasajn korespondproponojn E-instruisto Daniel Kolker, S-Kolcevaja, 20-149, *330058 Zaporoĵe*

Lernantino, 14-jara, Ekaterina Ostaparĉenko, str. Novostrojka 3, *Doneck-340024*

Lernantoj, 15–17 jaroj, dez. koresp. kun soc. landoj, Ŝilutes raj. *Ŝvekŝnos* vid. m-la

70 gelernantoj kaj 10 geinstruistoj de mezlernejo komencis lerni Esperanton. Skribu multnombre al: „KID" Esperanto, Ŝkola N. 150, str. Armavirskaja, *340074 Doneck*

Junulino, 20-jara, pri ĉ.t. Berdnikova, Ljuda, str. 6 fabriĉno-zavodskoj 26, *Ĉeljabinsk, 454049*

Deziras Korespondi Tutmonde
12–17 jaraj anoj de E-grupoj en la lernejoj: „KID"-Esperanto, Palaco de pioniroj, str. Artjoma, *340086 Doneck*, USSR

„Kid"-Esperanto, Ŝkola N. 76, str. Petrovskogo, *340092 Doneck*, USSR

„KID"-Esperanto, Ŝkola N. 76, str. Petrovskego, *340025 Doneck*, USSR

Klubo „Drujba" (Esperanto), Ŝkola N. 109, str. 40 jaroj de Ukrainio, *340046 Doneck*, USSR

„KID"-Esperanto, Ŝkola N. 153, str. Korolenko, *340901 Mospino*, USSR

Paut Toivo, Suur-Karja 18–45. *200001 Tallin*, Estona SSR, 19-jara, lernanto k komencanto, deziras korespondi kun ĉiuj landoj kaj interŝanĝi bk

Anna Sergunina, Koidu 89-27. *200007 Tallin*, Estona SSR, 38-jara, ekonomistino k komencanto, deziras korespondi kun ĉ.l. kaj interŝanĝi bk

Kvardek komencantoj (15–25 jaraj) deziras korespondi pri ĉiuj temoj kun ĉiuj landoj. Respondoj certaj. Adreso: Kazaĥa SSR, *Talgar*, Dom Kulturi. Esperanto, al Grigorij Gercikov (gvidanto).

Litovio, *Panevéjis - 6*, 9 vid. inokykla, internacia klubo „Amikeco" (lernantoj 14–17 jaraj) dez. korespondi.

35-jara instruistino Regina Miller dez. kor. Adreso: Litovio, *Panevizys*, Nemuno 20–31

Ni serĉas seriozan korespondanton, kun kiu ni povu vere kunlabori: aranĝi konkursojn (pri niaj landoj, E-o ktp.), interŝanĝi interesajn materialojn pri niaj landoj, urboj famajoj kaj tp. Nia anaro estas plejparte gelernantoj kaj gestudentoj, kvankam ankaŭ E-veteranoj estas niaj klubanoj. Skribu al A. S. Melnikov, ab. j. 233, *Rostov-Don*, USSR

Svedio

Jan Vedevik, Poste Restante, *40101 Göteborg 1*, 55-jara sola oficisto, pri ĉiuj temoj, speciale literaturo, arto, interŝ. fotojn, bk

Eldoninto de tiŭ ĉi numero:
GDR-MEM-sekcio Kulturligo de GDR / asocia sekretariejo (Centra Laborrondo Esperanto de GDR). Redakcio: 108 Berlin, Charlottenstrato 60, Telefono: 22 59 91. Respondeca redaktoro: Detlev Blanke, Redakcia komisiono: Otto Bäßler, Dr. Hans Eichhorn, Rudi Graetz, Rudolf Hahlbohm, Rainer Knapp, Willi Vildebrand, Redakcia fino: 20a Februaro 1973. Aperas ĝenerale 6 foje dum jaro, ĉiu- foje kiel eldono de alia MEM-landa sekcio. Presejo: Grafischer Grossbetrieb Völkerfreundschaft Dresden, Betriebsteil Meissen.

3700 - 36



Zentralbild

Wolfgang Speer: Gefratoj